

# The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 15ŝ (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 5ŝ.



---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.  
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.  
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

---

No. 50 (130)

MELBURNO

Jan. - Feb., 1966

---

## LANGUAGE — THE LAST BARRIER

(by I. T. Maddern, Head Master, Morwell High School).

Everywhere throughout the world the old barriers of geography, and distance, separating the peoples of the world, have been thrust aside. We can travel to the other side of the world in a matter of hours, and our voices can be heard instantaneously even in the most distant regions. Yet one barrier remains, the barrier of language. Of what use is it to travel to a foreign country if the difficulties of language still separate us from the people of that country? Of what use is it if our voices can reach simultaneously every country in the world, but our words cannot be understood? Our speech remains empty noise, and does not become communication.

To overcome this last barrier the world needs a common, simple, but effective help language or second language. "Lord, what fools we mortals be!" The language, Esperanto, has already been given to us free, and we are stupid enough not to use it. United Nations has stated quite clearly that the idea of a common second language such as Esperanto is in line with its ideals of world inter-communication and understanding, and has invited member countries to experiment with the teaching of Esperanto and to report the results of the experiment. Why have the English speaking countries ignored this invitation? Our countries, recognized as leading members of U.N., should have been the first to respond.

Since Governments and Education Departments and responsible authorities have failed to take up the challenge to overthrow the last barrier, the Australian Esperanto Association has decided to attack the matter in a practical, forthright and determined manner.

The only way in which the international language of Esperanto can fulfil its designed purpose is for it to be introduced into the schools of the world as a regular subject. In two or three years, or at most in one generation, the world would become fully articulate, all peoples communicating easily and freely with one another. Some of the more progressive schools have already demonstrated the possibilities of Esperanto. For example, it has been introduced

into Morwell High School, and this school is now in regular communication with schools in twenty other non-English speaking countries.

A head master in a school in Turku, Finland, sent us a set of picture-slides and a tape-recording of 45 minutes duration, showing us and describing to us, in Esperanto, scenes and life in his country. That has given us an idea. We are now busy preparing twenty tape-recordings on twenty different themes ranging from Australian geography to the Australian educational system, and these tapes are to be sent round our twenty sister schools at intervals of a month, something about us in Australia. We fully expect that this will set up a reciprocal reaction, and that we, in our turn, will be inundated with the communications of our Esperanto friends.

So, Morwell High School is conducting the experiment that the Victorian Education Department should be making and should have made years ago.

The Australian Esperanto Association which has done me the honour of electing me as its President has determined to take the following action:—

1. Approach all political parties and each individual member of the State Parliaments of Australia, and urge their support for the introduction of Esperanto into our schools;
2. Begin to train our young Esperantists to take an interest in politics, to stand for parliament, and to aim at the Ministry of Education, so that progressive ministers can give the people of Australia, a better, more practical education which will include the fundamental reform of introducing Esperanto into our schools;
3. Approach the various Schools Boards with a demand that Esperanto be recognized as a school examination or qualifying subject;
4. Request the universities to set up chairs of Esperanto. Perhaps we can find some wealthy patron who is willing to endow a university with such a chair.
5. Approach the headmasters of every secondary school and ask them to include Esperanto in their curriculums.
6. Approach every secondary school committee or advisory council and seek their support.

#### FOURTH LIST OF CONGRESS MEMBERS

No.

- |  |   |
|--|---|
| 83. Mr. Rex Hanney (Adelaide)                    | 93. Miss Cherry Walter (Melb.)  |
| 84. Mr. Ivan Heldzingen (Melb.)                  | 94. Mr. V. Dimovich (Sydney)  |
| 85. Miss Heather Clarke (Melb.)                  | 95. Mrs. E. Gunstar (Brisbane)  |
| 86. Mrs. V. Williams (Tambourine,<br>Queensland) | 96. Miss G. Fink (Melbourne)  |
| 87. Mr. G. Mrongovius (Melbourne)                | 97. Mrs. P. Ford-Louis (Manly)  |
| 88. Mr. S. H. Grant (Port Lincoln)               | 98. Miss E. Graham (Manly)  |
| 89. Mr. K. Gunster (Brisbane)                    | 99. Master John Harry (Melb.)   |
| 90. Mrs. M. Duncan (Manly)                       | 100. Mr. Ralph Harry (Brussels)   |
| 91. Mrs. C. Kocherga (Sydney)                    | (State Distribution: Vic. 45; N.S.W.<br>29; A.C.T. 8; S.A. 6; Qld. 4; W.A.<br>3; Tas. 2; Overseas 3.) |
| 92. Mr. Kevin Smith (Manly)                      |   |

## NIA 15-a KONGRESO

### Agrabla Ferio en Kampareca Ĉefurbo Canberra.

Ferio estis la celo de la kongresaranĝanto; ferio estis la gamnoto de la kongresprogramo; kaj ferio estis la spirito de la tuta Kongreso. Interne de la urbo de "Etoso" troviĝis eta Esperantujo, kie ŝvebis speciala etoso de ferio—memorinda ferio, kiun ebligis kaj evoluigis grandparte la sindediĉo de "magiisto" D-ro Ross Robbins, kiu ĉie sin montris kuranta, laboranta, manipalanta kaj, antaŭ ĉio ŝercanta. Antaŭ kaj malantaŭ la kulisoj li gvidis kaj distris, glatigis kaj instigis, informis kaj ridigis. Dankon, Doktoro Robbins, pro belaj kongresaj tagoj! Dankon ankaŭ al viaj helpantoj, pri kiuj pli poste.

Ne forgesita, tamen, estis la laboro, nek ĉiam for la seriozeco. Prave, ke mankis Seminario, kiun preskaŭ ĉiuj bezonas, sed ankaŭ instruistoj devas ferii, kaj sendube la posta laboro estos despli bona, almenaŭ tion promesis la vila planado ĉe la instruista kunsido. Mankis ankaŭ prelegoj literaturaj, tamen la konkursoj kaj laboremo de kelkaj aspirantoj evitis tutan neglekton de tiu fako. Gratulon al ĉiu konkursanto kaj al roluloj en la teatraĵetoj.

#### Komenciĝo de la Kongreso

Jam dimanĉe (2/1/1966) en la kongresejo, halo de la "Methodist National Memorial Centre", kolektiĝis areto da laborantoj por helpi pri preparoj. Nia Libro-Perantino Joan Andrews (Melburno) pretigis elmontron de sia stoko. Kelkaj aranĝis meblojn; aliaj prizorgis flagojn kaj la grandan portreton de la Majstro, dum D-ro Robbins sin okupis vere multflanke. El kofroj li tiris aĵojn multspecajn, grandajn afiŝojn bonvenigajn kaj informajn, kiujn li dismetis kun aliaj nur ŝercaj ĉirkaŭ la halo, tiel ke oni nur devis miri pri tiom da streĉa antaŭlaboro.

Lundon (3/1) je la 9.30-a eniris la halon vizitantoj el 6 ŝtatoj kaj aŭdiĝis ekscitaj salutoj en la kara lingvo. Komenciĝis vigla trafolumado de la multaj libroj haveblaj, disdonado de kongresaj dokumentoj kaj mendo de sidlokoj por aŭtobus-kaj ŝipekskursoj, piknikoj kaj bankedo. Treege rapide forflugis la unua mateno kaj alvenis

la horo por enbusiĝi por la unua ekskurso.

Kvankam multe de la ĉefurba teritorio restas sendoma kaj kampareca, Canberra jam posedas apartan "etoson" kaj promesas unikan estontecon. Gi posedas ankaŭ rapide kreskantan Komercan Centron, kun modernaj magazenoj kaj multajn imponajn publikajn konstruaĵojn, monumentojn kaj preĝejojn. Speciala trajto ĉie estas la multenombraj arboj ĉiuspecaj kaj lastatempe aldoniĝis ankoraŭ unu brila allogaĵo, granda lago—"Lake Burley Griffin", kies nomo honoras la Planinton de la Urbo. Vidi kiel eble plej multe de la vidindaĵoj estis kompreneble la deziro de la kongresanoj kaj ebligis tion tri diverstagaj ekskursoj.

Lundvespere kongresanoj vidis la novan filmon "Aŭstralio, lando de ĉiama ŝanĝiĝo", kun E-teksta komentario de S-ro Paul Schwerin (Sydney). Sekvis alparolo de S-ro Cecil Goldsmith (el Anglujo), kiu vojaĝis el Nov-Zelando speciale por ĉeesti la kongreson. Pri "La Mondkoncepto de D-ro Zamenhof" prelegis D-ro A. Fridenbergs (Melburno), taŭga komenco por la serio da kongresaj prelegoj. Ke ni ne forgesu la kreinton de nia lingvo estis lia celo. Zamenhof sciis ke la lingvo sola ne sufiĉos por konduki al mondpaco—ĝi bezonas, krom aliaj faktoroj, la Internan Ideon, ĝian spiriton, la Homaranismon!

#### Malfermo de la Kongreso

La Solena Malfermo okazis marde, la 4-an de Jan. La A.E.A. Prezidanto, S-ano Marcel Leereveld (Melburno) diris ke Canberra estas tre taŭga loko por kongreso, ĉar Canberra kaj Esperanto havas multon komunan, ambaŭ estas junaj, homkreitaj, bele konstruitaj kaj utilaj. Li dankis al D-ro Robbins kaj aliaj Kanberanoj pro la bona kaj granda preparlaboro. S-ro Leereveld prezentis la gast-parolanton, S-ron R. R. O'Keefe, Vic-Estro de la "A.C.T. Advisory Council", kiu alparolis la kongresanaron. Konfesinte ke nur lastatempe li iomete edukigis pri Esperanto, li aldonis ke la favora impreso kiun li ricevis pri la lingvo kaj

ĝiaj celoj despli grandigis lian plezuron ĉeesti. Li donis kelkajn ciferojn kaj informojn pri Canberra kaj klarigis la iom unikan regadistemon de Canberra kaj la funkcion de la "Kon-silantaro". Li deziris sukceson al la kongreso kaj al la anoj ĝuindan restadon en la federacia ĉefurbo.

Sekvis salutleteroj kaj telegramoj, i.a. de nia eksprezidanto, S-ro Ralph Harry, nuna ambasadoro en Belgujo. La kongreso honoris la mortintojn per minuto de silento. Sekvis nun la reprezentantoj de la lokaj kluboj kaj de la tutmondaj organizoj kaj per kantado de "La Espero" finiĝis la malferma ceremonio.

Aliĝis al la kongreso 100 ges-anoj, el kiuj 88 fakte ĉeestis.

### Labor-Kunsidoj

Okazis 2 A.E.A. kunvenoj kaj po unu U.E.A., S.A.T., Junula kaj In-struista Fakkunveno.

S-ro Marcel Leereveld (Melbourne) prezidis la A.E.A. Kunvenojn. Li raportis pri sia agado dum la pasintaj 2 jaroj, kiu krom daŭra instruado de Esperanto en sia lernejo (Caulfield Grammar School), inkluzivis long-distancajn vizitojn al la Esperanto-kluboj en Rockhampton, Sydney kaj Adelaide.

La Sekretario (S-ro Herbert Koppel, Melbourne) raportis pri la agado de la Asocio. Li emfazis ke pro la grandaj distancoj inter niaj kluboj kaj la fakto ke AEA ne havas centran oficejon, kie pagata oficist(in)o povas okupi sin tuttage al E-laboro, ni ne povas atendi okulfrapajn progresojn. Li tamen atentigis, ke de post lia elekto antaŭ 16 jaroj ja okazis progreso kaj pli bona organizmaniero. Ekzemple, inter 1911 kaj 1949 (38 jaroj) okazis nur 6 landaj kongresoj, dum inter 1950 kaj 1966, en nur 16 jaroj ni organizis jam 9 pluajn. En la jaro 1956, kiam S-ro Ken Linton fariĝis asocia kasisto, A.E.A. havis nur 156 membrojn kaj malplenan kason. La membraro kreskis konstante kaj ni nun havas, dank' al la modela laboro de Ken Linton, 258 membrojn. (Aplaŭdo). Nia gazeto ("Australian Esperantist") regule eldoniĝis ĉiun 2-an monaton dank' al la sindona laboro de S-ro F. R. Banham, la redaktoro; kaj F-ino V. Cox, ekspedo. La Libro-Servo el-kreskis el preskaŭ nenio, sed havas

nun stokon kaj kapitalon de £1,000. Post 5-jara bonega laboro, S-ino I. Milligan rezignis en Oktobro 1964; transprenis ĝin Joan Andrews el Melburno, kiu plenumas la grandan laboron kun entuziasmo.

S-ro K. Linton prezentis kiel kutime modelan kasraporton, kiu montras kontentigan staton. Saldo en la kaso estas nun proksimume £400. (Ni publikigos la ciferojn venontnumere). Laŭ la nuna stato ni povos eldoni 8 numerojn de nia gazeto jare.

S-ro Linton proponis ke ni elektu 3-an Kuratoron por la Zamenhofa Fonduso, ĉar S-ro R. Harry rezignis kiam li forlasis Aŭstralion por deĵori kiel ambasadoro en Belgujo. D-ro Ross Robbins estis elektita unuanime.

Vigla diskuto okazis pri 2 proponoj de S-ro Koppel. Tiu proponis ke la Kuratoroj ne havu la rajton uzi monon de la Zamenhofa Fonduso por eksterlandaj aferoj, ĉar tiu Fonduso fondiĝis por krei E-domojn en Aŭstralio mem. La membroj malakceptis tiun proponon principe, sed D-ro Ross Robbins, la novelektita Kuratoro, promesis ke li mem ĉiam subtenos la ideon ke la mono de la Zamenhofa Fonduso estu uzata por aŭstraliaj E-celoj. La 2-a propono de S-ro Koppel, pri la kreo de speciala insigno aŭ diplomo al meritplenaj aŭstraliaj E-istoj estis malakceptata. La membroj opiniis ke E-istoj ĉiam laboru por Esperanto eĉ sen espero al speciala honorigo.

D-ro A. Fridenbergs proponis la kreon de aŭstralia E-muzeo kiu konservos por ĉiam dokumentojn, gazetojn kaj librojn. Tiu muzeo portu la nomon. "W. J. Drummond Esperanto-Muzeo", honore al la multjara E-pioniro, kiu mortis en Melburno en Decembro 1964. La propono estis unuanime akceptata kaj S-ro I. Maddern deklaris sin preta instali la muzeon portempe en sia lernejo en Morwell. Ges-anoj tra tuta Aŭstralio, kiu volas donaci interesajojn al la nova muzeo, sendu ilin rekte al S-ro I. T. Maddern, High School, Morwell, Vic.

S-ro P. Schwerin (Manly) proponis ke ni nun fine decidu ĉu aŭ ĉu ne eldoni la proponitan Aŭstralian antologion. S-ro K. Linton rakontis pri siaj grandaj temporabaj klopodoj rilate la Antologion, ke diversaj sper-



tuloj ne povis konsenti pri la selekto de tradukindaj literaturaj kaj kiam fine prezentigis taŭga listo la Esperanto-tradukontoj ne povis interkonsenti. S-ro Cecil Goldsmith, konata libro-eldonisto el Anglujo, avertis ke antologioj nur treege malrapide vendiĝas kaj pro tio estus granda risko eldoni la antologion. Post diskuto S-ro Leereveld proponis, subtenita de S-ro Chandler (Sydney) ke ni ne plu okupiĝu pri la eldono de la Antologio. Tiun proponon la membroj akceptis unuanime.

S-ro N. Gamble faris kelkajn utilajn proponojn, i.a. pri elekto de gazetar-servanto, pri "Aŭstralia E-isto", pri publikigo de AEA raportoj antaŭ la kongreso. Tiuj proponoj estis akceptataj.

Por nur unu ofico estis necese baloti, tiu de la Vic-Prezidantoj. Estis 3 kandidatoj, kiuj ricevis la jenajn voĉojn: D-ro Robbins 26, S-ro Kevin Smith 16, S-ro Schwerin 15. Jen la nova Estraro:

Prezidanto: S-ro I. T. Maddern (Morwell)

Vic-Prezidantoj: D-ro Ross Robbins (Canberra), S-ro Kevin Smith (Manly)

Sekretario: S-ro Herbert Koppel (Melbourne)

Sekretario por UEA-aferoj, Adresaro: S-ro Tom Elliott (Manly)

Kasisto: S-ro Ken Linton (Melb.)

Informado kaj Gazetar-Servo: S-ro Noel Gamble (Canberra)

Komisito por Korespondaj Kursoj: S-ino K. Schwerin (Manly)

S-ro Tom Elliott ne partoprenis la kongreson, do lia akcepto ankoraŭ mankas.

La elekto de la venonta kongresloko estas ĉiam cerbumiga afero. La Esperantistoj el Perto, Hobarto kaj Brisbano ĉiuj diris ke ili ne estas sufiĉe fortaj por organizi la kongreson en 1968, sed ke ili povus gastigi ĝin en 1970. Do ŝajne ni devos baloti en 2 jaroj por la postvenonta kongresloko. La kongreso fine akceptis proponon de S-ro Koppel, ke la venonta kongreso okazu en Manly. La Manly-anoj akceptis la proponon kondiĉe ke ili povos solvi la loĝejproblemon, ĉiam tre malfacilan dum la Kristnaska Sezono en tiu populara turistregiono. (Dato: De Lundo, 1 Jan. 1968 ĝis Dimanĉo 7 Jan. 1968).

La U.E.A. Kunvenon prezidis la

Cef-Delegito S-ro K. Linton. La ĉefaj eroj estis raportoj kaj diskutoj pri la Petskribo al U.N.O. kaj la donaco al U.E.A. de "Aŭstralia Cambro". Diversaj proponoj estis akceptataj por fine akiri la tutan monsumin de £625. (Legu raporton aliloke.)

La S.A.T. kunvenon prezidis S-ro M. Leereveld kaj F-ino Helen Prent (Londono), ĉar la aŭstralia SAT-Peranto, S-ro V. Gueltling, estis for en Germanujo. La ĉeestantoj diskutis pri vera demokratio en amika samdeana maniero. La Junuloj havis kunvenon kaj elektis la jenan novan komitaton: Prez.: F-ino Marguerite Fink; Vic.-Prez. kaj Sekretario: S-ro Peter Moylan; Kasisto: F-ino Heather Clarke; A.E.A. Rerezentanto: S-ro Charles Stevenson.

S-ro M. Leereveld prezidis la Instruistan Fakkunvenon. Li legis raporton de Prezidanto, S-ino G. Pollard (Perth), kiu ne povis persone ĉeesti, kaj S-ro I. Maddern raportis pri la agado de la Instruista Societo. Li proponis ŝanĝon de la nomo, por ke pli da Esperantistoj, kiuj ne estas instruistoj, povu aliĝi. Post vigla diskuto oni akceptis la novan nomon "Aŭstralia Asocio por la Instruado de Esperanto en Lernejoj".

La nova estraro estas: Prez.: S-ino G. Pollard (Perth); Vic-Prez.: S-ro M. Leereveld (Melbourne); Sekr.-Kasisto: S-ro I. Maddern (Morwell); S-ro M. Leereveld kaj S-ino Fay Koppel konsentis korekti la materialon de la organo "Klerigo" laŭ gramatika vidpunkto.

### Prelegoj:

Krom la enkonduka oratorajo de D-ro A. Fridenbergs la programo enhavis 4 aliajn prelegojn:

Kvankam iom tro longa kaj teknika por la plimulto, la prelego (5/1) de S-ro Paul Schwerin pri la "Aŭstraliaj Moluskoj" kaj ties hejmoj la Konkoj estis modelo pri bonstila Esperanto, pritraktis ĉiun flankon de la temo kaj inkluzivis interesajn kaj amuzajn anekdotojn el la historio pri konkolektado. Ĝin bele ilustris kolorbildo pri konkoj.

Iom tro longa estis ankaŭ la magnetofona aŭdigo de Bird-Sonoj de S-ro Ray Chandler (7/1), kvankam liaj klarigoj kaj informoj lin pruvis spertulo pri kaj amanto de plumportaj loĝantoj de la aŭstralia arbaro.

Parolante en sia neimitebla kaj kutime senorda, sed aminda maniero, F-ino A. Godfrey prezentis (5/1) trafajn bildojn pri Hindujo, Turkujo, Irano ktp., kiujn ŝi traveturis survoje al mondkongreso en Sofio, kaj montris sin lerta observanto.

"Bela Tasmanio" estis memklariga titolo de prelego (7/1) de Ges-roj G. Cooper. Diapozitivaj pri diversspecaj vizitindaĵoj montrataj de S-ro Cooper provizis feston por la okuloj, dum la bonstilaj klarigoj de lia edzino same plaĉis al la oreloj.

### Ekskursoj

Dum la unua aŭtobusa ekskurso (3/1) la kongresanoj rondiris la Komercan Centron, vizitis la Parlament-ejon, staris mire kaj admire en la sankta Memorhalo de la Milit-Muzeo, kaj fine atinis la supron de la Ruĝa Monteto (Red Hill) por ĝui vastan panoramon de la urbo kaj ĝia okul-plaĉa lago.

Kiel vasta estas la lago evidentigis per boatekskurso (5/1). Brila kaj varmiga estis la sunlumo, kiel dum la tuta kongressemajno, sed refreŝiga la venteto dum la veturado preskaŭ ĝis Scrivener Dam., la barilo kiu retenas la akvon de la Rivero Molonglo por formi la lagon, kaj reen sub ĝiaj du graciaj, preskaŭ ĝemelaj pontoj.

La dua aŭtobus-ekskurso (6/1) rondiris la bordojn de la lago kaj transiris la Digon "Scrivener". Ĝi haltis ĉe Regatta Point, kie en ronda domo montriĝis bildoj, planoj kaj modeloj pri la evoluigo de la Nacia Ĉefurbo. Survoje de tie la veturantoj ekvidis la Nacian Monfabrikejon, kiun tamen ili ne povis eniri. Ridante ili akceptis la klarigon de D-ro Robbins ke la Registaro aŭdis pri la ĉeesto de la A.E.A. Sekretario kaj volis protekti sian monon. (Fakte la fabrikejo restis ferma ĝis post la kongreso por necesa riparado). Meze de la ekskurso okazis vizito al la Urba Plantejo, kiu provizas ĉiujn arbojn kaj arbustojn por la urbo.

La nacia ĉefurbo situas sur altebenaĵo ĉirkaŭita de montoj, el kiuj pluraj jam plenumas gravan rolon. Sur Black Mountain nun staras 2 altgaj televid-turoj kaj de la sama loko estas havebla urbpanoramo eĉ pli senspiriga ol tiu de Red Hill. Sur alia monto Mount Stromlo troviĝas la Nacia Observatorio, vizito al kiu

estis elstara ero en la kongresprogramo. Mardon vespere (4/1) aŭtobuso kaj dekduo da aŭtomobiloj ekiris kaj serpentumis ĝis la supro de Monto Stromlo, kie atendis ilin personaro de la Observatorio kun poŝlumoj por gvidi al parkejo.

Ce la enirejo la esto Prof. Bart Bok mem akceptis la vizitantojn kaj kondukis ilin al teatro-simila prelegejo, kie li torentflue klarigis la laboron kaj celojn de la tieaj astronomoj. Bedaŭrinde nuba nokto malebligis tragardon de teleskopoj, sed prezentado de diapozitivaj kun klarigo de D-ro H. Gollnow montris kredeble pli ol oni povus vidi dum multaj vizitoj. Sekve dekope kaj laŭvice kun diversaj gvidantoj scivoluloj vizitis plurajn observejojn kaj ricevis informon pri la diversspecca laboro kaj studado; kaj fine ĉiuj alvenis en la Te-ĉambro por varmiga trinkajo, despli bonvena pro la marŝado en malvarma mallumo.

### La Koncerto

La Koncerto (6/1) plaĉis al ĉiuj ĉar ĝi estis tute en Esperanto. Elstara estis la premiita teatraĵo "Etoso kaj la Arkitekto", kiun esperantigis Ges-roj P. Schwerin. Prologon pri Etoso legis S-inoj J. Torr kaj J. Le Roux, dum la rolojn de Ges-roj Burley Griffin kapable ludis Ges-roj W. Amies de la Canberra E-klubo. Guindajn kontribuojn faris Joan Andrews kantante kun gitaro kaj subtenate de Fritz Mueller-Sorau kaj Helen Prent; pluan ĉarmon provizis S-ino kaj F-ino M. Sanders (Melbourne) per bekflutludado kaj Minna Bedwell (Manly) per klasika gitaro; la sorĉo de mistero kaj ridado aldoniĝis, kiam D-ro Ross Robbins distris per siaj ĉiam novaj magiaĵoj; kaj fine la Junular-Grupo kun vere aktoro talento prezentis amuzajn skizojn. (Partoprenis: F-inoj H. Clarke, G. kaj M. Fink, H. Prent, Ch. Walters; S-roj R. Hanney, Ch. Stevenson.)

### La Fino de la Kongreso

Malĝojo pri adiaŭo jam sentiĝis kiam kongresanoj kunvenis posttagmeze—8/1—por la oficiala fermo, sed ĝin moligis pluraj agrablajoj.

La juĝado de konkursoj evidentigis, ke la tuta honoro apartenas al nur unu urbo—Sydney, el kiu venis ĉiu partoprenanto. S-ro Schwerin legis kortuŝan rakonton sian, S-ro Bourlin prezentis majstran tradukon de poemo

de Gorki kaj S-roj Mueller-Sorau, Chandler kaj Timmins oratoris. Ili estis tiel diversspecaj ke ili ne estis kompareblaj; do oni dividis la premon inter la kvin.

"La King's Kross E-Klubo" estis la titolo de burleska skizo verkita de D-ro Robbins kaj montris kiel la kasisto "Len Kinton" financis la kluban ĉeston en Tokio. (Instruisto D-ro Robbins, Lernantoj: Amy Godfrey kaj la junularo.)

Do en bona humoro oni alvenis al la oficiala Fermo de la Kongreso. Eksprezidanto M. Leereveld resumis la kongreson laboron, dankis denove la Kanberanojn pro la bonegaj aranĝoj kaj cedis sian oficon al la nova prezidanto S-ro I. T. Maddern. Tiu instigis al plua penado kaj transdonis al Joan Andrews donacon pro ŝia laboro por la Libro-Servo.

Samvespere okazis la Adiaŭa Festmanĝo en la Kongresejo, plaĉe intima ĉar ĉiu povis mem servi sin ĉe centra bufedo kaj ĉiu povis sidi laŭ propra elekto por babili aŭ ŝerci, k.t.p. Post la manĝo S-ro K. Linton alparolis la ĉestantojn pri la celo "Aŭstralia Ĉambro" ĉe U.E.A. Centra Oficejo (vidu aliloke).

Fine prezentiĝis diapozitivaj kaj sonbendigitaj rakonto pri ĉina legendo, sendita de S-ro A. Grant (Brisbane).

Dimanĉe (9/1) aŭtobuso kaj privataj aŭtomobiloj portis kongresanojn al la Rivero Cotter, kie ili naĝis kaj piknikis dum sunbrila tago. Jam antaŭ kaj dum la pikniko aŭdiĝis "Gis Revidoj", kiuj plinombrigiĝis je la fino de la tago. Gis la 16-a Kongreso en Manly 1968.

#### N.S.W. ESPERANTO-FEDERATION

At the suggestion of Mr. Cecil Goldsmith, N.S.W. Esperantists decided in Canberra to form a regional federation to promote closer relations between isolated Esperantists in N.S.W. country towns and the three clubs in Sydney. Mrs. Betty Cleminson was elected provisional chairman and Miss Eunice Graham provisional secretary.

Anybody wishing to receive the federation's bulletin should write to Miss Eunice Graham, 98 Woodland Street, Balgowlah, N.S.W.

## AŬSTRALIA

### CAMBRO ĈE U.E.A.

Ce la koncerta vespero dum la kongreso en Kanbero du dumvivaj membroj de U.E.A., samideanoj Ross Robbins kaj Ken Linton, aranĝis kolektadon por Aŭstralia Ĉambro ĉe la U.E.A.—domo en Rotterdam.

Ross Robbins per sia brila kapablo kiel oratoro kaj helpe de kangaruo kaj koala urso, kiujn li donacis por ornami la ĉambron, klarigis al la ĉestantaro la tre laŭdindan celon por kiu A.E.A. jam kolektis £338 el la necesa £625. Antaŭ ol li finis la mono komencis alflui kaj baldaŭ nia ĉefdelegito estis tiel okupata per la kolektado kaj la konstanta ŝanĝado de la ciferoj sur la nigra tabulo, ke Helen Prent ekstaris kaj alkuris por lin helpi; dume Ross daŭrigis la oratoradon kaj la mono konstante alfluis.

Aldoniĝis la bela sumo de £58, pli-grandigante la kolektitan sumon de £338 ĝis £396. do tre baldaŭ ni preterpasos la £400, kaj, se ĉiu el niaj 258 membroj donus nur unu pluan pundon, la celo estus jam atingita. Ni jam atingis preskaŭ du trionojn dum la du jaroj, do ni nun forte penadu por akiri la restantan trionon en la jaro ankoraŭ restanta al ni. Novzelando jam kolektis la tutan sumon! Ĉu novzelandanoj estas pli fervoraj por nia sankta afero ol aŭstralianoj? Ne! Ne! Ne!



## ESPERANTO PRESS SERVICE

The XVth Australian Esperanto Congress, held in Canberra this month, recognised the need for Esperanto to improve its Press image by creating the post of Press Officer. Mr. Noel Gamble, c/o Territories Department, Canberra, was subsequently appointed to the position.

It was agreed at the Congress

—that the bi-monthly journal "Australian Esperantist" should be the primary channel for distribution of press statements which would appear in English on the front and back pages of the journal, distribution being made to the main Australian newspapers through the Press Gallery, Parliament House;

—liaison with individual Esperanto Clubs should be effected by them appointing Information Officers who should let the Press Officer know how many press statements they could distribute to local newspapers within their area.

Mr. Gamble made it clear that he is in no position to provide a full press information service himself and would welcome suggestions as to subjects for articles but preferably draft articles which he would do his best to put into a form acceptable to the press. The new AEA President, Mr. Ivan Maddern, Headmaster of Morwell High School, starts off the series with a provocative article on Esperanto in the Schools which should get a favourable press reception at the beginning of the school year. Our aim is to follow this with articles which are topical and significant.

### NOBEL-PREMIO KAJ U.E.A.

". . . U.E.A., kiu estis kandidato por la jaro 1965, denove ne ricevis la Nobel-premion. Nia komitatano, S-ro E. Dahl, membro de la Sveda Parlamento, skribis al mi pri la afero leteron, en kiu troviĝas ankaŭ jena parteto:

"Neniam antaŭe ni faris tiom da streĉoj por vekti la intereson de la komitato de la Nobel-premio en Oslo. Laŭ mi, la nombro de la diversspecaj eminentuloj, kiuj perletere atentigis la komitaton pri la merito de Esperanto, estis impona; kaj mi scias, ke tio faris bonan impreson ĉe la Norvegaj aŭtoritatoj. Unuafoje Esperanto troviĝis inter la kvin organizaĵoj inter kiuj oni fine elektis la premion. Tio estas notinda fakto, kaj mi kredas, ke tio estas promeso." (el cirkulero de Prof. D-ro Ivo Lapenna.)

### OUR BOOK AGENT

Please note this address: Mrs. J. Andrews, Flat 10, 341 Nepean Highway, Frankston, Vic.

### NEKROLOGO

**Martha Beatrice Jones** mortis 88-jara la 31an de Oktobro. Si venis al Aŭstralio en 1909 jam Esperantisto, kaj estis fidela ano de la Okcidenta Esperanto-Ligo. El ŝiaj tri filinoj du ankoraŭ vivas. La alia, S-ino Daniels, ankaŭ Esperantisto, mortis antaŭ kelka tempo.

### State Press Liaison Officers.

Our Central Press Officer, Mr. Noel Gamble, requests that all Esperanto Clubs in Australia elect a "Press Liaison Officer", to maintain contact with the local press and act as his representative. Those elected, contact him direct at 11 Lamington St., Deacon, A.C.T.

All club news, reviews, &c., held over through lack of space.

# The Australian Esperantist



## La Aŭstralia Esperantisto

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: \$A1.50 (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Kvar linioj: \$A.1.00.

---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.  
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.  
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

---

No. 51 (131)

MELBURNO

Marto, 1966

---

### A NEW CONCEPTION OF EDUCATION THE NEED FOR ESPERANTO

The current ills afflicting the educational systems in Australia are clearly revealed in such matters as the chronic shortage of teaching staff and class-room accommodation, university entrance quotas, and the high failure rate at the tertiary level. These ills spring from something deeper, and that is the ignorance in the community of the real meaning of education.

Such reports on education as the Martin Report for Victoria, the Wyndham Report for New South Wales, and the Crowther Report for England, good as they may be in certain details, fail to grip the fundamental problem. As Chesterton's Father Brown would have expressed it: "It is not that they cannot see the solution; they do not see the problem". Hence we are faced with conclusions springing from wrong premises.

The two fatal errors that bedevil us are the belief that colleges and schools and universities are the only media for education, and that education comes from outside or can be donned like a garment.

The reverse is the truth. Our education begins the day we are born and does not cease until the day we die. Schools and colleges are merely the assembly places of our youth, and far from educating those gathered there, they frequently frustrate or hinder the process of development. As Shaw said, not jokingly as most people read him, but with terrifying truth: "My education was interrupted by my schooling."

Education means development from within and to the fullest measure of the innate abilities we possess. It has nothing to do with the cram and exam methods so beloved by our "educators", employers and administrators. In the larger sense we educate ourselves, and all the outside world can do is to provide the right climate and environment and conditions for that development. Our minds are like our bodies. Both grow of their own accord, provided they have a modicum of food, of exercise, and whatever else is necessary to physical and mental life.

The best thing our schools can do is to open new worlds of interest and adventure to the minds of our young people. For this reason, the most important skill we teach to our children is the writing and comprehension of our own English language. Immediately, their horizons are extended beyond the petty worlds of their homes, schools and oral communication, to a much larger world in which they can associate with the greatest minds in the English writing world. We place in their hands a tremendous instrument of education or self-development.

Even then, they are limited to the English speaking world, unless translators bring the works of foreign writers to them.



Remember the excitement of Keats as he read Homer for the first time, translated by Chapman ("On First Looking into Chapman's Homer"):

"Then felt I like some watcher of the skies  
When a new planet swims into his ken."

This sense of wonderment in the discovery of a new world so aptly expressed by Keats, prompts us to wonder why we should be denied access not only to the works of ancient writers, but of so many modern writers also. The educators of the world should be doing something about this language barrier that shuts us out from wider contacts. It is an obvious corollary that anyone worthy of the name of "educator" should be in the van advocating the adoption of the universal language Esperanto into all the schools of the world, so that, with one stroke, the great literature of the world, past and present, can be laid at the feet of every child.—I. T. MADDERN.

### LA 52-a KONGRESO

Oskar Berman fakedel, en Hadera, Israelo, kiu jubileas sian 50-jaran E-istecon, informis nin (24/12) ke la U.E. Kongreso okazos en TEL-AVIV en 1967. Membro de la Tutmonda Esp. Jurnalista Asocio, li bone posedas la konatan sci-havemon de la vera raportisto—kiel unua, li tiel frue konigis la novaĵon al la mondo.

### ORIENTA GERMANUJO

Esperanto denove oficialiĝis en la Germana Demokrata Respubliko. Post longa paŭzo la E-istoj ekiras al laboro. En Aprilo 21 ili uzos la 20-an datrevenon de la fondo de la Socialista Unuecpartio, por pruvi la praktikan taŭgecon de E-o. Ili elmontros leterojn salutajn de el la tuta mondo kaj precipe petas helpon de uzantoj de E-o.

Akompane al la petfolio estas Esperanta traduko de "Manifesto al la germana popolo kaj al la popoloj kaj registaroj de la mondo", klara esprimo de ilia soci-politika starpunkto. Ĝi kondamnas agadojn de la Okc.-Germana registaro, akuzante ĝin pri "helpricevo de la okcidentpotenco, enoficigado kaj ŝirmado de naciistaj krimuloj kaj celado al revenĝmilito". Sekvas pledo por unuecigo de la tuta Germanujo sur bazo de senarmiliĝa Socialisma paco.

Simpatiantoj kontaktu: Alfred Muller, Karl-Marx-Stadt, Karl Liebknecht Str., 47. German Democratic Republic.

SE LA VIVO ESTAS HAZARDO, moralo ne havas specialan sencon. Se la vivo funkcias laŭ certa sistemo, moralo havas gravegan signifon. Peŝ senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalvej 94-96. Copenhagen F., Denmark.

### ESPERANTO IN COMMERCE

From E. L. M. Wensing, Poŝtkesto 412, Eindhoven, Holland, may be had a full report on the activity of the Institute for Esperanto in Commerce and Industry, and a fine speech given by him on the language problem in international and economic relations. Both documents merit close attention. Firms using Esperanto should contact the Institute and so have their name included in its official list of such enterprises.

### CLIPPINGS

ITALY.—350 Esp-ists attended the 36th National Congress of Esp-o in Rimini. For the first time Mass was celebrated in Esperanto.

The FIAT motor-car makers have issued a prospectus in Esp-o and invite E-ists to visit the plant.

ENGLAND.—Esp-o church services are held monthly in London, Bourne-mouth, Bristol and Manchester; other centres may follow.

"The Green Star" Inn is in Esperanto Way, near Zamenhof Grove, in Smallthorne, Stoke-on-Trent.

POLAND.—Every fourth Sunday, Esp-o service in Lodz.

SWEDEN.—Bible Society of Skara gave 1000 kroner to Kristana Esp. Ligo Internacia.

GERMANY. — World Union of Free-thinkers issue folios in four languages, including Esp-o. Postfach 124, 584 Schwerte I, Germany.

NEW ZEALAND. — "Land of Color", booklet with Esp-o translation. 2/9 at Box 181, Upper Hut. Ten-minute Esp. program last Thursday each month on radio.

Zofia Stanczyk, ul. Orla 8 m 9, Warsaw, Poland, deziras kor. por sia grupo.—P.m., kartoj, fotoj k.a.

## Australia Kroniko

**SYDNEY:** 18/12 ni festis la Zamenhof-Vesperon. Ĉeestis proks. 60 personoj.

En sia bonvenigo la prezidanto Fritz Mueller - Sorau emfazis la duoblan gravecon de tiu ĉi jara kunveno. Ĝi estas esprimo de amo kaj dankemo por nia lingvo kaj ĝia kreinto kaj—ĝi estas preskaŭ mirakla magneto por multaj samideanoj. Dum la tuta jaro ili forgesis la ekziston de Esperanto, sed subite ili vekigis el siaj sonĝoj kaj—almenaŭ por unu vespero—fariĝas denove bonaj Esperantistoj (kun la plej bonaj intencoj por la estonteco!).

La S.E.S. estis tre feliĉa havi kiel festparolanton "Tiny" Goldsmith el Anglujo. Nia brita amiko en sia preciza kaj viveca maniero parolis pri la Majstro, la lingvo kaj la devoj de la Esperantistaro. Ni dankas vin denove, "Tiny", por viaj kuraĝaj kaj kuraĝigaj vortoj kaj anticipe atendas kun plezuro vian revenon al la lando de eterna (??) sunbrilo.

Sekvis prezentado de kelkaj kantoj, historietoj, muzikaĵoj kaj la vespero finiĝis per bona vespermanĝeto.

—Sciuro.

**HORNSBY:** 21/12 ni festis la Zamenhofan Vesperon. Pro tio ke nia kutima kunvenejo, la vespera liceo, estis fermita pro la ferioj, ni kunvenis ĉe la privata hejmo de S-ro Victor Bourlin, kiu bonkore invitis nian klubon. Ĉeestis ankaŭ S-ino M. Duncan de la Manly Klubo kaj nia ĉiam-verda "Tiny" Goldsmith, kiu alparolis nin pri Esperantujo kaj pri siaj estontaj klopodadoj.

La tre plaĉa vespero finiĝis per temanĝeto provizita de gastama S-ino Bourlin.—V. J. Timmins.

**MELBOURNE:** Nia Zamenhofa Festo okazis 11/12 en la Konferenca Halo de la "Council of Adult Education". Ĝi estis komuna aranĝo de la 3 kluboj en nia urbo. Ĉeestis 40 personoj. Post pianludado de Kim Bastin, S-ro E. McKenzie bonvenigis la ĉeestantojn nome de la Melburna E-Societo: S-ino A. Paling salutis nome de la Orrong E-Klubo kaj S-ino M. Sanders abortis salutojn de la E-Klubo de Orientaj Antaŭurboj. Plaĉis la kantado de Soprano Christine Cameron. S-ro H. Koppel amuze

distris nin kaj poste deklamis poemojn de S-roj F. R. Banham kaj L. N. M. Newell. Joan Andrews kun gitarludado dolĉe kantis popolkantojn kaj denove rave pianludis Kim Bastin. La festparoladon faris ĉi-jare D-ro A. Fridenbergs. Sub titolo "Nacieco kaj Religio de D-ro Zamenhof" li emfazis ke la Majstro deklaris sin kontraŭ ĉiu ajn regado de unuj gentoj super la aliaj, ke li estis nek polo nek ruso nek hebreo, sed partiano de l'homaranismo.

13/12 en la E-Domo S-ro Norman Perkins parolis pri jusa vizito al Ĉinujo. Amiko lia montris ege interesajn diapozitivojn pri diversaj lokoj vizititaj. 20/12 okazis en la E-Domo nia "Jarfina Festo" (30 ĉeestantoj) Nova ano S-ro Beechey parolis pri "Esperanto kaj la Komencanto", Joan Andrews kantis kun gitaro, kaj S-ino Brunning (Orrong E-Klubo) montris diapozitivojn pri vojaĝo tra Japanujo. Vespermanĝeto finis tre interesan vesperon kaj laborplanan klub-jaron.

**MANLY:** Niaj klubanoj gastigis S-ron C. C. Goldsmith 23/11 - 21/12, kaj tre ĝuis lian viziton al nia urbo. Preskaŭ ĉiutage gesamideanoj invitis lin hejmen aŭ ekskursis kun li al lokaj vidindaĵoj. Dufoje li vizitis klubkunvenojn en la Vespera Kolegio por prelegi. Li partoprenis en nia Zamenhof-Vespera Programo ĉe la hejmo de S-ino Mina Bedwell, kaj en nia Kristnaska Festeneto ĉe la hejmo de S-ino Enid MacGillivray. Manlyanoj akompanis "Tajni" al amika rekontiĝo kun la Hornsby Grupo ĉe la hejmo de Ges-roj Viktor Bourlin, kaj dufoje veturis kun li al Esp.-Domo por partopreni en E.-programoj.

La klubo aranĝis, ke S-ro Goldsmith (mem Rotariano) prelegu pri Esperanto, la Internacia Lingvo, al la Rotaria Klubo de "Warringah Shire". Montriĝis kontentiga intereso pri la temo. Dufoje en "Manly Daily" aperis artikoloj pri nia eminenta vizitanto.

La urbestro, S-ro W. Nicholas, subtenita de Skabenoj S-ro F. S. Preacher kaj S-ino M. Ambrose, donis al S-ro Goldsmith oficialan akcepton pro la urba konsilantaro kaj la enloĝantaro de Manly. S-ro Nicholas donacis al S-ro Goldsmith belan bildlibron nomitan "Manly, Sud-Pacifika

Ludejo" kiel memorajon pri lia vizito.

Tri kursoj daŭris ĉe la Vespera Kolegio ĝis 2/12, kaj espereble komenciĝos denove en Februaro. Je la fino de Oktobro ĉesis la kursoj por lernejoj, gvidataj de S-ino M. Duncan. Dum 1966 S-ino Betty Cleminson instruos la junajn gelnantojn.

Je 9/12 S-ino Duncan publike donacis libro-premiojn al Esp.-kursanoj Philip Spencer kaj Nico Macar ĉe la Jarfina Festo (Speech Night) de Manly Liceo por Knaboj. La lernejestro, S-ro W. Furnass favore parolis pri la Esp.-kursoj kaj invitis S-inon Duncan diri kelkajn frazojn en Esperanto al la multnombra ĉeestantaro. Post la ceremonio S-ro Furnass invitis al vespermanĝeto S-ron Goldsmith, S-inon Cleminson kaj S-inon Duncan.

Societaj renkontiĝoj okazis 21/11 ĉe la hejmo de S-ino Eunice Graham, kaj 28/11, 15/12 ĉe S-ino Ruth Caruhters. Aliaj gesamideanoj dankindaj por sia gastameco estas Ges-roj P. Schwerin, K. Smith, R. Robertson, G. Thatcher, kaj S-inoj B. Cleminson, G. Swan, B. Forrest, B. Cooley, kaj K. Morrison.

Pro la foresto de S-ino Duncan dum 1966, S-ro K. Smith, 72 Seaview Street, Balgowlah, ricevos ĉiujn informojn aŭ demandojn pri Esperanto en Manly.—M. Duncan.

**BRISBANE:** La prezidanto, S-ro K. D. Gunster, sciigas ke la societo ankoraŭ kviete sed senhalte progresas rilate kaj novajn lernantojn kaj kontententigan plispertigon ĉe progresintoj.

Dum la jaro multaj vizitantoj alvenis Brisbanon, inter aliaj, D-ro Ross Robbins, S-ro Woodruffe, S-ino Black, Ge-sroj Lock (Anglujo), S-ro Simpkins. Ilin gastigis Ge-sroj Gunster, Beck, Grant, kaj Behncken. Pluraj s-anoj telefonis la delegiton por anonci sian alvenon, sed ĉar ili restis nur kelkajn horojn en Brisbane, ne estis eble aranĝi renkontiĝojn.

Inter ili estis, S-ro King (N.Z.), S-ro Gamble (Canberra), S-ro Manuellas (Hispanujo) kaj S-ro Kitsuji (Japanujo).

S-ro Marshall Cohen, Melburno, vizitis la delegiton, sed restis nur unu horon, ĉar li estis survoje al "ora marbordo" antaŭ ol reveni hejmen.

La Zamenhofa festo havis lokon en

la bela kampara hejmo de Ge-sroj G. A. Grant, kaj ĉeestis 25 personoj.

Kiel atendite, la tutaj aranĝoj atingis la altan nivelon kutiman ĉe tiuj ĉi fervoraj samideanoj.—S.L.P.

**REDCLIFFE:** Ĉe motelo "Waltzing Matilda", Margate, okazis la Zamenhofa festo, kie kunvenigis proksimume 40 personoj. Honorgastoj estis ŝtata parlamentano J. Houghton kaj S-ino Houghton, S-C. E. Kroll, la urbestro de Redcliffe, kaj S-ino Kroll, kaj Ge-sroj D. W. Fraser.

Ge-sroj K. D. Gunster kaj S. L. Parry venis de Brisbano.

S-ro V. C. Clarke bonvenigis la gastojn, kaj ankaŭ paroladis S-roj Houghton, Kroll, kaj Gunster.

La delegito por Brisbano faris la "festatan tagon" alparolon, al kio S-ro Gunster respondis.

Ĉiu parolanto aludis la baldaŭan emeritiĝon de S-ro D. W. Fraser, kaj deziris al li bonsanon kaj feliĉon dum la estonteco. S-ro Fraser responde dankis al ĉiuj.

El bela kristnask-arbo, S-ro Gunster disdonis donacon al ĉiu gasto. Sekvis tiun ĉi, lerte rolita teatraĵo verkita de S-ino Fraser, kaj la prezentado elvokis aplaŭdon kaj gratulojn al la roluloj, Ge-sroj Clarke kaj S-ino E. Strang.

La unuan de Januaro 1966 estis anoncite ke Sia Regina Mosto kavaliĝis S-ron Fraser. Li nun portas la ordenojn "K. B., kaj I.S.O."

Sir Douglas kaj Lady Fraser komencos mondvojaĝon la 17an de Januaro. Ili estos for dum almenaŭ unu jaro.—S.L.P.

**ROCKHAMPTON:** En Oktobro Ge-sroj Collier de Buderim rakontis pri sia vojaĝo tra Europo (Gemanujo, Ĉeĥoslovakio, Rusio, Pollando, Finnlando ktp.), dum kiu ili uzis nur E-on kiel komunikilon. Per la UEA-delegita reto ili trovis gvidantojn kaj amikojn en ĉiu urbo. La Rockhampton-taggazeto presis artikoleon pri tiu vojaĝo.

Ni ricevis informojn de la C.W.A. (Asocio de Kamparaj Virinoj) de Calliope (15 anoj), kiuj deziras lerni E-on; kaj samtempe de membro de la Jaycees en Cairns (Junula Cambro de Komerco), kiu proponis, ke lia grupo starigu E-klubon en Cairns kiel 1966-jara in-

ternacia projekto. Ni rekomendis: "Esperanto for Beginners", Edinburgh Dictionary, "Step by Step" kaj gramofondiskon (Teenage Esperanto) kaj proponis korespondservon.

En Oktobro ni estis invitita partopreni ekspozicion pri internaciaj rilatoj, kune kun ĉiuj aliaj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UNESKO (Rotary, CWA, Lions ktp.). Ni sufiĉe bone impresis, montrinte grandajn afiŝojn kune kun kvar tabloplenoj da libroj k.a. Oficiala reprezentis nin Ge-sroj Ross.

Dum Dec.-Jan. la societo ne kunvenas, ĉar nia kunveno (la ŝtata ĉambro por plenaĝula eduko) estas fermita dum lernejaj feritempoj. Tamen kelkaj studentoj ĉiusemajne praktikas la lingvon hejme de S-ro Pedder, kiun ni dankas.

Kunvenoj kaj lecionoj ĉiujaŭde en du gradoj rekomenciĝos en Feb. Por komencantoj S-ro Russell uzos "Step by Step", kiun la ĉi-lokaj librovendistoj jam mendis tiucele, kun la Edinburgh-vortareto. Progresintoj, gvide de S-ro Moore, praktikos perbuŝan uzon de la lingvo, per voĉlegado, vortludoj, teatraĵetoj k.a. Ni esperas, ke la nunaj tri porinfanaj kursoj en lernejoj daŭros, uzante "Esperanto for Beginners".

Ni havas permeson de firmao de vojaĝagentoj plenigi unu grandan montrofrenestron per ekspozicio pri E-o, dum du semajnoj antaŭ komenco de la kursoj.—J. B. Moore.

**PERTH:** Ĉe nia Jar-Kunveno la sekretario (F-ino A. Longson) raportis ke dum 1965 aniĝis 11 novaj membroj kaj 3 asociaj anoj, do nia Ligo nun havas 46 anojn kaj 10 asociajn anojn. La kasista raporto montris ke en 1965 ni elspezis £33 pli ol ni enspezis. (Ĉefa kaŭzo estis ke por kursoj ni enspezis nur £4-4-0, dum en 1964 ni enspezis £44.)

En 1965 S-ino Ruth McGrath parolis pri E-o ĉe U.N.-lunĉo, kio rezultis, ke kurso formiĝis ĉe la Teknika Lernejo. Si parolis ankaŭ antaŭ la Union of Australian Women. 6 studentoj sukcesis en la elementaj ekzamenoj kaj 4 en la mezgrada. Nia biblioteko havas 497 librojn. Donace ni ricevis ankoraŭ pli, sed mankas spaco kaj ni urĝe bezonas plian libroŝrankon.

La nova estraro: Prez.: S-ro C. Dean; Vic.-Prez.: F-ino O. Stempel; Sekr.: S-ro W. Howard; Kasisto: S-ro N. Bowers; Biblioteko: S-ino G. Pollard; Ekzamenoj: S-ro N. Brodie; Informado: S-ro J. Hawks. La kotizo estos \$4 por plenrajtaj membroj, \$1 por asociaj membroj kaj \$6 por kursanoj.

La Fest-Maĝo kaj la societa vespero okazis de la Zamenhofa Tago okazis ĉi-jare en la sama halo. 38 partoprenis la festmaĝon. S-ro Dean memorigis nin pri la graveco de la tago. La Gast-Parolanto estis S-ro Gerondal de la W.A. Fako de UNO. Poste S-ro David Miller kaj S-ino Veith distris nin per muziko kaj kantoj. 50 s-anoj kaj amikoj partoprenis la postan societan vesperon. S-ro Norm Brodie kiu ĵus revenis de monlvojaĝo, kondukis nin per kolorlumbildoj tra diversaj landoj.

#### Aŭstralia E-ista Junulara Asocio.

La A.E.J.A. estis fondita dum la 14-a Australia E-Kongreso, kaj la 15-a—en Kanbero—bone fortigis ĝin. Kontaktoj inter gejunuloj el diversaj ŝtatoj de Aŭstralio kuraĝigis nin al pli intensa agado. La anaro kreskis, kaj dum la Kongreso, laŭ rimarkoj kaj ĝenerala intereso pri A.E.J.A., oni evidente rigardas ĝin parto de la E-movado. Nia ĝenerala kunveno decidis, ke ĝi aliĝu al A.E.A. kaj ke ni klopodu havi plifortajn kontaktojn kun lernejaj E-istoj. E-istaj instruistoj de Caulfield Grammar (Vik.) kaj de Manly (N.S.K.) promesis helpi nin en tio. La kontaktojn ni faros plejparte per la oficiala organo de A.E.J.A.—"Umeco".

Viglas la Melburna Esperanto Junulara Grupo—loka branĉo de A.E.J.A., kaj espereble en aliaj ŝtatoj baldaŭ fondiĝos samcelaj grupoj. La membroj de M.E.J.G. ekskursas ĉiumonate. Ili glitkuras, dancas, marbanas, ktp. La grupo prelegis ĉe unu ne-Espa junula societo, sed ĝis nun aliaj junulgrupoj ne respondis je nia propono prelegi pri E-o. Se vi konas ne-Esp-istan junulan klubon, kiu sentus intereson al nia afero, **bv. kontakti nin.**

La mono, kiun ni gajnis, prezentante du revuojn pri la Melburna E-Societo (en 1964 kaj 1965) ebligis al ni aĉeti 14 E-lernolibrojn. Komence de la ĉi-lernejojaro ni donos ilin al grandaj lernejoj kaj aliaj junulaj asocioj.

Ciu E-ista junulo aliĝu al nia asocio.  
Sekretario: Mr. P. Moylan, c/o  
Newman College, Parkville, N.2, Vic.  
(dum univ. ferio, 12 Perrin St., Seymour, Vic.). Prezidanto: Miss M. Fink, 88 Headingley Rd., Mt. Waverley, Vic.

## Recenzoj

**Maskerado Ĉirkaŭ la Morto.** Nazi-mondo en Hungarujo. Memrorlibro: Teodoro S. Svarc. Antaŭparolo de J. Regulo. Eldonis Stafeto. 264 p. Prezo 2.80 Us. dol.

La aŭtoro fondis, eldonis kaj du jarojn redaktis "Literatura Mondo". Li priskribas Hungarujon sub la Nazia regado, kaj per tio forigas mankon de aŭtenta kroniko en Esperanto de tiu tempo en la historio de tiu lando. Plejparte tra la libro legantoj enspiras atmosferon de artifikoj, legitimilaj falsigoj, reciproka suspektemo, neniamĉesa ĉasado kaj kaŝado, forfuĝoj el la ĉiun premanta teroro. Post la Nazioj venas la Sagokrucanoj, egale sadismaj kiel siaj imitatoj.

Oni ricevas impreson, ke la Hungara popolo ne partoprenis la Germanan volon al venko; al Judoj ĝi ne malofte montris kiom eble plej da helpo-indulgo. Almenaŭ tion oni povas percepti per la plumo de homo, kies liberalismo estus avida rimarki tiajn poratestojn.

Elstaras la brava blufemo, heroa humoro kaj facilanima filozofio de la aŭtoro. Irante sian dornan vojon, li frontas la minacajn situaciojn kun rikana rideto. Amuzaj anekdotoj kaj saĝpensaj meditoj spice servas por moderigi la daŭran etoson de mal-homeco kaj interfrata kruelo. Ĉiokaze laŭ stilo majstre manipula.

La armistica deklaro de Horthy, la ŝtatestro, estas valore sciiga. Li amare protestas, ke "malgraŭ nia deziro kaj volo la Germana Regno ĵetas pli kaj pli novajn partojn de la Hungara armeo trans la limojn de la lando". La verko finiĝas per eniro de Rusaj armeanoj en Budapeŝton, ĉe kio la Rusparola aŭtoro sialoke povis perili interkomprenadon en tiu grandsignifa tempo.

**LIBRO DE AMO:** P. kaj G. Peneter. 264 p. bele bindita, 4.60 Us. dol. (62 steloj).

La unua parto—Sekretaj Sonetoj—aperis en 1932; la dua parto—La Travestiita Muzo—antau 15 jaroj. Al la nuna libro estas aldonitaj tri sekcioj, unu el kiuj estas antologieto de erotikaj diversoriginaj, krom glosaro kaj notoj. La aŭtoroj, laŭ informo, estas mortintaj. La antaŭparolo, iu Arieh ben Guni, estas personeco enigma. La Greka "gunece" (virino) suspektigas pri pseŭdonimo.

Estas frapanta koincido, ke samas la metra versarango ĉe La Arto Poetika (C.E.R. Bumy) en La Parnasa Gvidlibro kaj ĉe Komplezaj Klarigoj en ĉi tiu recenzata verko. Nome, dekonusilaba verso, kvinjamba.

Tradukoj el la klasikaj lingvoj (Ovidio, Martialus kaj Grekoj), uzo de mitologia formprezento, kaj libera eksperimentado kun lingvaj terminoj provizas la tekston per iaspeca erudicio, kiu draste kontrastas kun la nuda krudo precipe de la unua parto. Povas esti, ke la aŭtoro(j) en ĉi tiu branĉo de Esperanta literaturo dividos kun Ovidio en la Latina la gloron de metra majstreco kaj la dubindan famon de erotikismo—kaj ke adoleskaj lernantoj Esperantaj, kiel jam longe la Latinaj, kaŝe alserĉos la "koncernajn paĝojn" por trovi ne moralan instruon.

Presteknike la verko estas admirinda; la lingvo diable lerta; la temo kaj prezento plaĉos aŭ naŭzos tiujn, kiuj pro tiu aŭ alia motivo ricevas la verkon per mendo (kun mono) ĉe Wm. Auld, 20 Harviestoun Rd., Dollar, Clacks., Scotland.

## "BONA RIDO"

La bonhumoro neniam mankis al la E-istoj. Krom ridigaj noveloj, skizoj (Merchant, Schwartz, Baghy k.a.) ankaŭ aperadis anekdotaroj, jam de P. Lengyel (Libro de Humorajoj 1889), sekve per Walter (Gaja Lernolibro), K.O. Schmidt (Legu kaj Ridu), Bennemann (Miru kaj Ridu), P. Schwerin (Gaja Lernanto) se nomi nur kelkajn.

Nun ni havas "Bona Rido", 85-paĝa ŝerckolekto de Axel Helm, eld. de Eldona Societo Esperanto, Malmö, Svedujo: 7.50 Sv. kr.

Ĝen kōmpilaĵo, kiun alserĉas ĉi ŝatanto de tiuspeca lerninstiga mater-



ialo. Krom sia memdidakta valoro, ĝi amuze prezentas por "psikologoj" la rigide strangajn aspektojn de la homa penso.

P. 30: "koloniĝardeno" (A. allotment of land? komunuma parcelo); "vluraj", "akurate" estas misuzitaj; "meznokte" (noktomeze); 36: "por ke mi estas . . . vegetarano" (por tio, ke); 70: "Maljuna forĝ-Jonas . . ." (?).

El la pli ol 300 ŝercoj, nur dekduo maltrafis mian tujan komprenon, aŭ, inverse, mia inteligento maltrafis ilian signifon.—F.R.B.

**Elektitaj Libroj en Esperanto:** A Catalogue of Esperanto books designed to provide a representative rather than a comprehensive selection for librarians and those interested in International Language as a study in its own right. All branches of literature, &c., are presented and indexed in 64 pages. Obtainable at the Universal Esperanto Association, Rotterdam.

In the Year Book of the U.E.A. (1965) the stock of its Book Service is set forth in detail.

### "HISPANIO POR VI"

72-paĝa gvidlibro en Esperanto, rimarkinda pro sia aparta babilriĉa kaj bonhumora informaro ne nur pri vojaĝformalaj kaj landaj karakterizaĵoj, sed ankaŭ kaj recipi pri la temperamento de la popolo mem.

Longan priskribon pri sovaĝa taŭrludo sekvas, fortkontraste, paroloj pri festoj adoraj al la milda Jesuo.

"La pleja parto el la Hispanoj konfesas la katolikan religion", sed alifonte el Barcelono venis vorto, ke "la elcento da praktikantaj katolikoj en Hispanujo estas malplia ol en aliaj landoj, kie la katolika kredo ne havas oficialan aŭ devigan karakteron".

"Oni parolas krom la Hispana, ankaŭ Katalunan, Baskan kaj Galician lingvojn". Jes, parolas. Sed ĉu oni povas ricevi gazetojn, librojn en tiuj regionaj lingvoj?

"La Hispano estas . . . treege fiera. Li estas iomete ofendiĝema pri siaj aferoj, kaj parole malŝatos ilin centfoje en la tago; tamen li ne toleras, ke aliaj faru la samon". Do, turistoj avertiĝu.

La libro tuŝas al "am(aj)o", "maldecaj vortoj", "noma titoluzado",

"trinkmono", "siesto", "bikini", "tako", "akurateco" kaj multo alia. Petu pri tiu sukplena, malrutinea manlibro ĉiu E-isto sciema pri la Hispana lando kaj popolo: ĉe Ministerio de Informacion y Turismo, Avenida del Generalismo 39, Madrid 16.

### "TRA LA MONDO" Around the World

This course with records is composed of 48 readings in six booklets; it is recorded on 6 microgroove records 45 rpm. by Esperantists from 12 different countries: France, Italy, Holland, Germany, Poland, Yugoslavia, U.S.S.R., Finland Madagascar, Japan, Britain and U.S.A.

On the left page of each booklet is shown the Esperanto text of the records, and in the corresponding right-hand page are the translations into French and the necessary grammatical explanations. **All these right-hand pages are rendered into English in the special booklet delivered with the Course.** The whole is presented with numerous colored illustrations reminding students of the Esperanto text.

A seventh booklet contains a French - Esperanto vocabulary and an Index; all this, too, **is rendered into English in the accompanying booklet.**

This Course is specially prepared for those wishing to be able to use Esperanto rapidly and practically in their various activities — travel, commerce, correspondence, exchange visits, literature, etc.

The Course also exists at the same price, for German, Dutch and Japanese students, at the same price: £6.80 or 86.70 French francs.

From our book agent or Editions Francaises d'Esperanto 11 rue Paul-Vergnes, Marmande (L.-et-G.), France.

### "MONDA KULTURO"

60 steloj por 4 numeroj jare. Unu stelo egalas: 8 pencoj Aŭstraliaj. Fakte kostas al Aŭstralianoj po 12½ŝ. por ĉiu numero, ĉar ili devas pagi per sterlinga mono, kiu valoras kvaronon pli ol ilialanda pundo. Hispana "Boletin" nomas la gazeton "unu el la plej altrangaj kulturiloj en Esperanto"—modera opinio pri kiu multaj legantoj kontestus. Sed la prezo bedaŭrinde efikas kontraŭ ĝia abon-vastiĝo. Aŭdeblas murmuroj, ke kulturo je tiu kosto estus iom kare kolektita.

### NUKLE - ARMILOJ

La Dana Kampanjo kontraŭ Atom-armiloj apelas: En 1963 oni faris traktaton haltigi provajn eksplodojn... sed la situacio hodiaŭ estas eble pli danĝera ol tiam. Cinujo posedas proprajn nukle-armilojn... Hindujo konsideras fabrikadon de atombomboj. Oni jam parolas pri mult-latera atom-potenco "oriente de Suez", kaj en orienta Eŭropo oni pritraktas starigon de atom-armilaj batalformacioj de NATO. Ni terure glitas al internacia anarkio... La riĉaj nacioj devigas la novajn naciojn mem havigi al si nukle-armilojn por atingi tiun politikan lokon, kiun ili rajtas. Se okcidenta Eŭropo havos proprajn nukle-armilojn je nacia bazo aŭ pere de NATO... orienta Eŭropo faros adekvatan aranĝon.

Devas kreiĝi komuna Eŭropa rezisto kontraŭ tio, por ke la homaro iru al stabila mondsocio.

Resumo de seslingva (ink. Esp-o) folio: Kampagnen mod Atomvaben, Dronningensgade 14, Copenhagen.

Friedrich Zold, ul. Vystavby 1, Košice, Czechoslovakia, interŝanĝas insignojn, gazetojn, gramodiskojn, glumarkojn, alumet-etiketojn k.s. Ankaŭ leterojn.

**PLEASE** send gazettes (Esp.) and congrats. to **African** E-ists care of: Foyer Africain Protestant David Livingstone, Av. Coghén 119, Brussels 18 (Uccle), Belgium.

### "HIMNARO ESPERANTA"

The 4th edition is sold out. The 5th will be enlarged both in hymns and music. £150 is needed for its publication. Subscribers of £1 or more will receive a copy. Address gifts to Mrs. D. A. Sinclair, 7 Bridle Road, Bramcote, Beeston, Notts.

(Folio sent by Mr. M. C. Butler.)

### "FREEDOM OF SPEECH"

A 36-page brochure designed to draw inquirers into the movement: "What is Esperanto?"; a brief survey of Esperanto activity literally from A to Z; the origin of the language; its recognition in philately; its educational value attested by 29 specialists; answers to the usual objections; pronunciation and skeletal grammar; what the British Esperanto Assn. is and stands for.

If you think a friend would like a copy, send name and address of this person to the B.E.A.

### WORDS WORTH NOTING

"In order to pass judgment on Esperanto, one would have to know Esperanto—a precaution that most critics are apt to neglect."

★ ★ ★

"Esperanto has already a sufficient background of experience to possess a remarkable degree of precision... German philosophers, and not a few American theologians, would find it profitable to have their works turned into Esperanto. Then they would know exactly what they meant—if anything."

★ ★ ★

"There is nothing so cacophonous in Esperanto that I could not match it in German, or in Greek, the tongue of the gods."—Prof. Albert Guerard, "Beyond Hatred" (1925).

I regret delay in appearance of club reports. The reason for the hold-back is obvious.—Editor.

# The Australian Esperantist



## La Aŭstralia Esperantisto

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: \$A1.50 (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Kvar linioj: \$A.1.00.

---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.

Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

A.E.A. Press Officer: Noel Gamble, 11 Lamington Street, Deakin, A.C.T.

---

No. 52

MELBURNO

Aprilo - Majo, 1966

---

### SCHOOL'S CONTACTS WITH 24 COUNTRIES THE VALUE OF ESPERANTO

For two years now, Morwell High School has been in regular contact with 24 countries in the five other continents of the world. Every three months twenty-four copies of the same letter goes out to these countries, and in between these times—February, May, August and November—the schools in those countries write to us.

It is all done in Esperanto, which is now a regular subject in the schools of many nations. In Victoria, however, Morwell High School is the only school that includes it in the curriculum, though some schools take it as an after-school or evening-class subject.

The United Nations Organization has invited its member countries to experiment with the teaching of Esperanto in schools, because "the idea of an international language, by which nations can communicate with one another more easily and understand one another better, is in line with the ideals of U.N.O." Unfortunately the English speaking countries whom we look upon as the most fervent supporters of U.N.O. are the slowest to act upon this advice. We are lagging a long way behind the rest of the world.

Enclosed is a copy of our last circular letter, No. 8, dated 15/1/66. As you can see it is addressed to people in the following countries:—New Zealand, The Argentine, Uruguay, United States, Canada, United Kingdom, France, Spain, Italy, Switzerland, Germany, Austria, Hungary, Yugoslavia, Bulgaria, Poland, Finland, Sweden, Norway, Denmark, Holland, Belgium, Israel and Japan. Each of the addressees is a teacher, teaching Esperanto in his school.

The translation of the body of the letter is as follows:—"It is now exactly two years since we sent out our first circular letter, and we are very pleased with the success of the scheme, despite the fact that a few of those addressed have failed to write regularly. Because of that, we have considered it advisable to amend our list a little. This time we have chosen a group of people, all of whom are executive members of the International League of Esperanto Teachers. We confidently expect that every one of this enthusiastic group will be an active correspondent.

The order of the above list was arranged in such a way as to enable educational material to circulate amongst us with the maximum speed and minimum inconvenience. In order, such material from Australia would travel first to New Zealand, then to South America, North America, England and Europe and finally back to Australia, via Africa, Israel and Japan.

The teacher representative in Finland gave us the idea of interchanging tape-recordings and projector slides. We are now expanding that idea, by producing 24 separate and different tapes, some accompanied by slides and dealing with

Australian topics, and these will be sent to these 24 countries, one for each. Every month, the material will be sent on to the next country, so that over a space of two years, all these countries will hear something new about Australia, once a month. We expect that the receiving countries will reciprocate and let us have pictures and talks about their lands, peoples and customs."

—I. T. MADDERN.

## Australia Kroniko

● **PERTH:** La unua kunveno por 1966 okazis 14/2. La Prezidanto (S-ro C. Dean) estris parol-ekzercadon. Ĉiu ano skribis sugestojn pri temo sur papero, metis ĝin en ĉapelon kaj devis poste hazarde elekti slipon el la ĉapelo kaj paroli pri la montrita temo. Samvespere F-ino A. Longson raportis pri la Kongreso en Canberra.

S-ro Norman Brodie parolis (28/2) pri sia vojaĝo tra Rusujo, Polujo kaj Britujo; li ilustris sian prelegon per belaj kolor-diapozitivaj. 14/3 la ĉeestantoj surbendigis siajn voĉojn magnetofone kaj poste aŭskultis al siaj propraj voĉoj (kaj eraroj!). Elstaris rakonto de S-ro Illingworth pri Esperanto en Sud-Ameriko, de kie li revenis antaŭ nelonge.

Survoje de Germanujo al Sidnejo, alvenis (23/2) en Fremantle S-ro Volo Gueltling. Ges-roj McGrath kaj S-ro N. Brodie atendis la vizitanton ĉe la kajo kaj kondukis lin al la Lig-Ĉambro, kie Volo prelegis kun lumbildoj pri Hongkong kaj Formosa. La sekvantan tagon S-ro Gueltling vizitis la studion de la A.B.C., kie li registris intervjuon por la programo "W.A. Parade". Samvespere, Volo denove prelegis en la klubĉambro kaj montris belajn diapozitivajn pri Japanujo, la 50-a Univ. Kongreso kaj vojaĝo tra Rusujo. La loka gazeto "Sunday Times" raportis pri nia vizitato.

Ni komencis 2 klasojn por komencantoj. Marde, en la lig-ĉambro instruas Norm Brodie kaj merkrede ĉe Gosnells instruas S-ino G. Pollard.

● **HOBART:** Dum 1965 nia Prezidanto S-ro Jack Gibson (Launceston) senlace laboris por la antaŭenigo de E-o en la lernejoj. Li gvidis kurson por instruistoj kaj kvar partoprenantoj sukcesis en la Elementa Ekzameno. Ĉi tiun jaron ok studentoj sub lia gvido intencas prezenti sin por la oficiala ekzameno en Novembro.

Ĉe la klubo, por instigi intereson

kaj plibonigon de lingvosocio, ni elektas temon pri kiu klubanoj devas skribi kelkajn liniojn por laŭtelegi antaŭ la grupo. Post la legado ni diskutas la temon elektitan. Ĉe la marta kunveno ni vigle interparolis pri "Kiel konatigi Tasmanion eksterlande?"

Nia Zamenhofa Festo okazis en la hejmo de Ges-roj Elias, kiuj distris nin per lumbildoj kiujn ili faris dum vizito al Eŭropo. Pro la foresto de nia Prezidanto, la Sekretariino parolis pri la fervora deziro de la elpensito plibonigi la rilatojn inter homoj pere de Esperanto. En Januaro vizitis nin F-ino Helen Prent, kiu montris filmojn, kiujn ŝi faris dum siaj vagadoj tra Aŭstralio.

Ĉiun lundon posttagmeze, ĉe la hejmo de Ges-roj Cooper, la virinoj kunvenas por legi literaturon, aŭskulti diskojn kaj konversacii. La grupo ĉiam kunvenas la unuan dimanĉon je 2.30 p.m. ĉe Adult Education Rooms Strato. Ĉe la Generala Kunveno elektigis la jena nova estraro: Prez.: S-ro E. Bantick; Vic-Prez.: S-ino W. Shankley, S-ro E. Loooris; Sekr.: S-ino H. Cooper; Kasisto: S-ro G. Cooper; Libro-Peranto: S-ino Elias. Bedaŭrinde S-ro Gibson ne povis akcepti oficon ĉi-jare, sed volas resti membro, kvankam li ne povas ofte veturi el Launceston.

● **MELBURNO:** 33 Melburnanoj partoprenis la tre sukcesan Canberra-Kongreson, el kiuj 21 estis anoj de la Melb. E-Societo. Regulaj kunvenoj ĉe la Esperanto-Domo komencis la 17-an de Jan. kiam ni bonvenigis Mina Bedwell kaj Audrey Dennis el Manly. Post la kongreso la 2 entreprenemaj sinjorinoj aŭtomobilis tra Viktorio kaj ne preterlasis viziton al la E-Domo. Unu semajnon poste, S-ro H. Koppel prelegis pri la kongreso. Je la 7-a Feb. ni adiaŭis Helen Prent, kiu montris memfaritajn filmojn pri Sidnejo, Centra Aŭstralio kaj la Canberra-Kongreso. Helen nun iras al Nov-Zelando, de kie ŝi en Majo reveturos al Anglujo. Alia fraŭlino, kiu multe vojaĝis, F-ino A.

Hearn, 14/2, prelegis kun lumbildoj. S-ino Fay Koppel, 21/2, komencis novan serion da prelegoj pri la E-Stilo kun aparta pritrakto de "La Faraono" kaj KABE. "Vojaĝo al Canberra kaj la kongreso" estis la temo de la amuzvespero, 28/2, kiam Marcel Leereveld montris siajn kolorlumbildojn.

Revene de Germanujo al Sidnejo paŭzis en Melburno S-ano Volo Guelling. Je speciala prelegvespero (4/3) li montris ege interesajn diapozitivojn pri Honkong, Formoso, Japanujo kaj Rusujo.

La Generala Kunveno okazis 7/3. La Kasisto (S-ro M. Cohen) raportis pri kontentiga stato de la kaso. La Sekretario (S-ro H. Koppel) raportis ke 1965 ne estis tiel sukcesa jaro kiel 1964. En 1965 la Societo havis 54 membrojn (1964: 47) kaj 14 Kursanojn (1964: 35), entute do 68 anojn (1964: 82). Spite de sufiĉe vigla propagando nur 14 novaj lernantoj venis. En 1964 ni profitis el la vizito de S-ino Doris Worcester, la agado de Helen Prent kaj la 14-a kongreso, okazinta en Melburno. Jen la nova estraro: Prez.: S-ro E. McKenzie; Vic-Prez.: S-ino V. King, S-ro M. Fordham; Kasisto: S-ro M. Cohen; Sekr.: S-ro H. Koppel; 2-a Sekr.: S-ro H. Beechey; Instruado: S-ro M. Leereveld; Biblioteko: S-ino F. Koppel, S-ino J. Andrews, S-ino M. Fordham.

"Vortoj kaj Muziko" estis la titolo de programo prezentita de nia multflanka Joan Andrews, kiu per gitaro mem kantis aŭ kantigis la ĉeestantojn. (14/3) Je la literatura vespero de 21/3, S-ino Fay Koppel komparis la stilon de KABE kun tiu de Grabowski. S-ro O. Mitchell je la amuzvespero de la 28/3 prelegis pri la historio kaj problemoj de la George Street Lernejo en Fitzroy, kies estro li estas.

En la januara kunveno de la "RENDEVUO", S-ro F. R. Banham prezentis siajn tradukaĵojn de kelkaj humoraj rakontoj kaj elvokis konstantan ridadon. En Februaro S-ro A. Fridenbergs prelegis pri la influo de diversaj religioj dum pasintaj jarcentoj sur la arkitekturo de la preĝejoj. "La vivo kaj verko de John Shaw Nielson", aŭstralia poeto, estis la temo de S-ino P. Hanks ĉe la

marta kunveno. Sia citado de delikatesprimaj poemoj alternis kun la tre kompetentaj E-tradukaĵoj de F-ino Elsie Godfrev, dum S-ro E. Hanks montris lumbildojn pri la poeto mem kaj pri la "Mallee"-regiono, kie John Shaw Nielson pasigis grandan parton de sia vivo.—H.K.

● **EASTERN SUBURBS:** La Generala Kunveno de la E-Klubo por Orientaj Antaŭurboj de Melburno okazis 23/3. La klubo decidis donacian parton de la profito de la 1964-a Melburna Kongreso (\$25.00) al la fonduso por la Aŭstralia Cambio en Rotterdam. Jen la nova estraro: Prez.: S-ro Stan Milligan; Vic-Prez.: S-ino M. Sanders; Sekretario: S-ro R. Reed; Kasisto: S-ino S. Thomas; Informado: S-ino B. Smith; Protokolanto: F-ino M. Sanders; Komitatanoj: S-inoj Stafford, Fallu, S-ro Phillips.

La klubo kunvenas ĉiumerkrede en la hejmo de S-ino Smith. Okazas 2 kursoj: La komencantojn gvidas S-ro S. Milligan kaj la progresantojn S-ino I. Milligan.—R. Reed.

● **CANBERRA:** La Generala Kunveno elektis: Prez.: S-ino M. Zagorskis; Vic-Prez.: S-ro B. Amies, S-ino G. Stevenson; Sekr.: S-ino B. Amies; Kasistino: S-ino J. Le Roux; Informado: S-ro N. Gamble; Biblioteko kaj A.E.A. Libro-Servo: Dr. Ross Robbins.

S-ino J. Torr konsentis gvidi novan kurson kaj la klubo reklamas en "Canberra Times" kaj "Courier".

● **HORNSBY, N.S.W.:** Jaŭdon, 10/2, ni kunvenis en la Hornsby Vespera Liceo. F-ino Dorothy Hasluck donis tre interesan raporton pri siaj spertoj dum la Universala Kongreso en Tokio. Si montris ankaŭ diapozitivojn pri Japanujo. S-ro Timmins donis mallongan alparolon pri la aŭstralia kongreso en Canberra. Multe plaĉis al ni bonvenigi 3 novajn gelnantojn al nova kurso gvidata de S-ro Mueller-Sorau. Ni kunvenos la unuan jaŭdon en ĉiu monato.

S-ro F. Mueller-Sorau provizis ĝindan vesperon 3/3, kiam li prezentis al ni gramofondiskojn de esperantaj kantoj.—V. J. Timmins.

● **ROCKHAMPTON:** Dum Decembro kaj Januaro ne okazis oficialaj kunvenoj, sed kelkaj diligentaj studentoj kunvenis ĉiujauĉe laŭvice en la hejmoj de Ges-roj Peddar kaj Ross por praktiki la lingvon. Kaj



pro la grandanimeco de niaj gastigantinoj ili ankaŭ povis "praktiki" la manĝadon. En Januaro ni ricevis inviton al la solena ceremonio "Internacia Kandelekbruligo" de "Business and Professional Women's Club". S-ino Dunbar nin oficiale reprezentis.

Dum 3 semajnoj en Januaro ni montris ekspozicion pri Esperanto en 2 montrofenestroj de la konata Vojaĝagentejo Duthie's en Denham Strato. Ĉiuj kvar librovendejoj konsentis denove elmontri anoncojn pri kurskomenciĝo. Ankaŭ la loka taggazeto "Morning Bulletin" aperigis 5 artikoletojn en Januaro kaj 2 en Februaro. (i.a. grandan raporton sur grava paĝo pri la 15-a Kongreso en Canberra).

La 3-an de Feb. komenciĝis 2 kursoj sub la aŭspicioj de la "Stata Fako por Plenaĝula Edukado". Ĝis nun aliĝis 18 komencantoj kaj 12 progresintoj. Meznombro ĉeestas proks. 11 en ĉiu klaso. Nia klubo nun havas 20 membrojn.

—John Moore.

● **MANLY:** 15 el niaj anoj partoprenis la 15an Aŭstralian Kongreson en Kanbero, kaj treege ĝuis la kongresajn aranĝojn. Manly Klubo decidis (27/1) inviti la 16an Aŭst. Kongreson al nia urbo en Jan., 1968. La anoj elektis Kongresan Komitaton laŭ la regularo de A.E.A. kaj jam komencas pripensi interesplenan programon. Gravan konsilon al kongresantoj ni substrekas: Mendu ĉe A.E.A. vian litĉambron jam nun. Je la sama kunveno S-ino Betty Cleminson, 20 Stirgess Avenue, Harbord, N.S.W., estis elektita Sekretario de la Klubo. S-ro Kevin Smith agas kiel Prezidanto dum la 6-monata foresto de S-ino Duncan.

Dimanĉaj renkontiĝoj okazis kiel kutime. 16/1 ni naĝis, sunbaniĝis kaj piknikis ĉe Shelley Marbordo. Poste ni tetrinkis ĉe la hejmo de Ges-roj Duncan. 20/2 ni nuligis nian piknikon pro malfavora vetero. Tamen. ni renkontiĝis ĉe la hejmo de S-ino Ruth Carruthers por vespermanĝi. Poste ni ĝuis la pianoludadon de S-ino Ford Lewis, kantis, kaj bondeziris al S-ino Duncan, kiu vojaĝos al Anglujo. Al nia Vic-Prezidanto, Skabeno F. Preacher, ni bondeziris okaze de lia aer-vojaĝo al Japanujo, Koreujo, kaj la Filipin-Insuloj.

S-ino Brenda Cooley invitis la anojn al sia hejmo 3/2 por paroli pri sia vizito al Japanujo. Ni ĝuis interesplenan rakonton pri la U.K. en Tokio kaj postaj tagoj. S-ino Cooley ilustris la paroladon per bonegaj lum-bildoj.

Ĉiujaŭdaj kunvenoj okazas je la 7a ĉe Manly Vespera Kolegio, kiel jam ek de 1959. La estro tre favoras Esperanton kaj metas 3 ĉambrojn je nia dispono. Ni do povas organizi 3 kursojn sub gvidado de S-ro K. Smith (elementa); S-ino K. Schwerin (prograsa); kaj S-ro P. Schwerin (altgrada). Post la kursoj, je 8.30 p.m. ni kunvenas por diskuto, babilado ktp. Varme ni ricevas vizitantojn.

—M. Duncan.

### ESPERANTAJ LOKNOMOJ

**Adolf Holzhaus** (Usono) enlistigis 278 Zamenhof- aŭ Esperanto-stratojn, placojn ktp. en 261 urboj de 22 landoj, ĝis 1 Januaro 1963.

**S-ro Pennazio** (Informa Oficejo de Itala Esperanto-Federacio) per "Heroldo de E." (1 Marto 1966) informas pri minimume 291 en 25 landoj.

### PROF. A. CHEDEL

This Swiss linguist, in his 200-page "Description moderne des langues du monde", describes and compares the chief languages. In his concluding chapter, which treats of International Language, he unreservedly favors Esperanto. ("Heroldo de Esperanto", 1 March.)

### OFTA, NE FREKVENTA!

En vaste legata gazeto oni legas: "La frekventa atentigo pri la... disvastiteco de..." Devas esti: La ofta atentigo... Ni gardu la senconuecon de Esperantaj vortoj, por nia komuna bono!

### JARLIBRO U.E.A.

**Dua Parto 1965,** 195-paĝa suplemento al la Unua. En listo de Esp-aj Grupoj legu: Aŭstralio — 13 (ne 3) grupoj. En tiu pri Landaj Asocioj mankas nialanda raporto, eble pro akcidento. Ĉi-informilo estas necesega por ĉiu celkonscia E-isto. Membriĝu per K. Linton, 11 Poplar St., S. Caulfield, Vic.

## Recenzoj

"Step by Step": M. C. Butler. 8th Edition, 12/- (English), plus 1/- postage. At our agents.

Mr. Butler is a witty and brilliant pedagogue, whose solid erudition in Esperanto has been distilled from 60 years' active life in the movement. His book is filled with instruction lit by flashes of well-directed humor. Pedants peering through the pages for doubtful points will close the covers with note-paper unmarked by any example of diversion from the classic standard. The author follows the arrangement of material as set in the earlier editions, and thus certain users may sense an element of dispersion that sacrifices presentation in one block of the striking symmetry of the verbal forms. The learner lives in the present tense from paragraph 78 to 402, when he meets the past tense; he's introduced to the future tense 349 paragraphs later, though early on he could call an order, having grasped the use of the imperative back in paragraph 70. Mr. Butler does, however, feel that, if **desirable**, the whole of the grammar may be summarised in the first lesson, but the detailed instruction and the exercises given **must** follow the order in the book if it is to be used to the best advantage.

The above criticism is but "small dust on the balance" when weighed against the strikingly apposite composition of the exercises and examples. Having absorbed the instruction of this veteran teacher, given on 270 pages of generously compacted text, the pupil should be, says page 270, fitted to pass—the elementary examination of the B.E.A. or Royal Society of Arts with distinction. Thus our modest author. We should think that, so equipped, he could envisage for himself victories more impressive.

The present edition contains well over 100 emendations.

**Fabeloj de Andersen** (1-a vol.), tradukis L. L. Zamenhof. 238 paĝoj; 53 ilustraĵoj. 41.70 steloj, plus 10 p.c. sendkosto. Eld. Heroldo de Esperanto, Bruselo.

Kun miro oni ekkonscias, ke ĉi tiu volumo estas nur la dua eldono. Jam

pasis 40 jaroj de post la apero de la unua en 1923! La dua parto aperis en 1926; la tria en 1932; la kvara, dank' al Heroldo de E., en 1963. Tiu, kaj la nuna, estas bele prezentitaj, per klara preso, bona papero, kaj alloga. uzrezista kovrilo—kio inde honoras kaj la genian aŭtoron kaj la karan tradukinton.

Pri la merito kaj sentoplaĉo de la rakontoj mem, legantoj pritaksu. Jen nur kelkaj observoj pri la mirinda esprimaŭgeco de la lingvaĵo, kiu karakterizas la plumon de la plej intimkonanta uzinto de Esperanto.

9: Kion oni havas de tio? (What's the good of that?); 11: prenu la piedojn en la manojn! (Stir your stumps!); 20: Jen vi havas! 42: (Take that!); kies plena portreto li estis... 71: (ŝi) estis kopie simila... (dead spit of...), Ekzercaro 11/4; 128: publika sekreto (open secret).

101: kune rompdis la manojn ("kunerompadis" en la unua eld.). Komparu: interplekt(ig)i, kuntordi, interfingri: Marta 57, 104, 121. Rabistoj 135/14. 27: elen "Peer Gynt", 68: enen... elen... 132: sangsubfluan dorson? 150: Korektita estas "orvelki" (forvelki). Preseraro! Zam. uzis "forvelki" sur p. 29. (The Australian E-ist" 3/62; Eseoj de Waringhien, p. 70.)

Jam ne, ekzistas ekskuzo, ke ne mendeblas baza verko de nia traduka literaturo—plur-jardeka manko estas forigita.

Kiu aĉetis la 1963-e eldonitan 4-an volumon, tiu per-kupone rajtas rabaton de 4 steloj. Saman rabaton por la represota 2-a volumo ricevos aĉetintoj de la nuna.

**Gvidlibro Tra Parizo**: originale verkita de Julieta. Esperantaj Francaj Eldonoj, 11 rue Paul Vergne, Marmande, France. 250 p., 33 plumdesegnoj, 28 fotoj, 13 kvartalplanoj. Fr. fr. 12.70.

Alilandaj gesam-oj ofte petas pri tia libro en E-o: fine ĝi aperis, dank'al Julieta, denaska Parizanino, kiu ame elkonas sian Urbon. Alloga, instru-dona, praktika, ĝi estos plia atuto por plena guado. Ĝia riĉa kaj trafe prezentita detalaro bone servos E-ajn turistojn en la granda metropolo. Jam multajn laudojn ĝi ricevis de eminentaj E-istoj.

**Aŭtografoj de D-ro L. L. Zamenhof**: Dektri fotostatoj de liaj leteroj

kun presita redono kaj multe da utilaj no-oj.

**Boulogne 1905: Testo kaj Triumfo.** Valora represo el "Lingvo Internacia" Aŭg. 1905 kun kelkaj feroj. Aparte havindaj estas la parolado de Kabe kaj la diskutado kunvena pri prononcado de E-o, en Zamenhof mem prenis parton.

**La Homaranismo de D-ro L. L. Zamenhof:** C. Van Kleef. La plej kompakta kaj informodona traktato pri Hilelismo kaj Homaranismo. Studentoj komparas ĝin kun artikolo de N.Z. Maimon en "Nica Literatura Revuo", N-ro 34. Ĝi traktas pri la influo de la Juda deveno de Zamenhof sur liajn ideojn, lia transiĝo de Sionismo al Hilelismo kaj sekve al Homaranismo. Lia ideo pri etika universalismo estas zorge ekzamenita, post kio la aŭtoro prezentas sian propran interpreton de la Zamenhota pensado. 85 bibliografiaj notoj kaj tekstoj de la "Dogmoj de Hilelismo" kune kun alia utila materialo.

Prezo Fr. fr.; 2.40, ĉe la supra eldono, kiu espereble enmondigos ankoraŭ pli da kajeroj sub la titolo Kolekto: Zamenhof en sia Tempo.

**The Cultural Value of Esperanto:** D. B. Gregor, M.A. Reprinted from "Modern Languages" (Dec., 1965). A five-page article in which the author gives examples of evocative expressiveness in Esperanto poetry, points out arresting characteristics of prose masterpieces (38 of which have been translated into 29 languages), and urges acceptance of Esperanto as a school subject with academic standing.

He concludes that Esperanto is either qualified to be studied up to and including University level, or it is nothing. If it is nothing, many men of outstanding intellect (starting with Tolstoy and including several Heads of Universities) have been grossly misleading themselves. A knowledge of it may as yet have little snob-value, but he who is well-read in the language and uses it with fluency and vigor may be proud of the achievement. Even more satisfying than this is the delight that comes from converse in it with nationals of other tongues and of finding that indeed it is a living language. Obtainable from B.E.A. 12 for 2/6; 1 for 3d., plus post.

**Japana Kvodlibeto: Poemoj kaj Prozaĵoj originale verkitaj en Esp.** Kompilis T. Nakamura kaj Miyamoto Masao. Eld. Stafeto, J. Regulo. 128 p. Prezo 1.20 Us. dol. plus afranko 8 p.c.

Diverskaraktera kolekto, kiu precipe helpas "Japanemulojn" al pli funda kono pri-Orienta. Didaktike elstaras du lingvaj studoj—T. Nakamura analizas la manierojn esprimi la (bo)parencecon, uzante tekstekzemplojn Bibliajn. K. Matuba ekzamenas tradukojn de Kalocsay el Orienta poezio. Tiuj artikoloj portos sian plenan instruon nur en la kapon de iom tre evoluintaj lingvemuloj, kies klereco devus peli ilin al taŭge atenta konsiderado de la du pecoj.

La prozo estas ĝenerale bona ĝis grado, kiu indikas al admirinda diligento de Japanoj pri E-a lernado. Ilian stilon kaj ilian korektecon saĝe imitus pli ol unu laŭtnomulo en Eŭropo.

18 biografietoj donas kroman valoron al la verko.

**Teo Jung: La Esperanta Konjugacio.** Kun pli ol 1000 ekzemploj plejparte Zamenhofaj, kaj kun abundaj klarigoj kaj konsiloj precipe pri la kunmetitaj verboformoj. Unua parto. 123 kvartformataj paĝoj, ĉ. 21 x 27 cm. Dua parto aperos en la daŭro de la venonta somero aŭ aŭtuno. Prezo por ambaŭ volumoj kune: egalvaloro de ned. gld. 13.50 (3.85 dolaroj, 54 steloj) plus 10% por sendkostoj. Sola volumo ne mendebla. Eldonis: Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Schevenigen, Nederlando.

#### GERMAN READERS!

Two excellent booklets: *Moderne Menschen Sprechen* (1 mark) and *Esperanto, Die Internationale Sprache* (0.70): with special consideration of its Educational Aspects. A to Z coverage in small compass. From *Deutscher Esperanto-Bund E.V.*, 85 Nurnberg 2, Postfach 2113.

#### ELĈERPITAJ LIBROJ?

Praktika sam-o sin okupas pri brokanta aĉeto kaj vendo de elĉerpitaj Esperantaj libroj: H. Veenstra, J. M. Kemperstraat 28, Amsterdam.

## CITINDAJOJ

"Nia lingvo estas tute preta por la ĝenerala kaj parte la literatura uzado. Sed por la teknika uzado tio estas tute alia afero. Kiel nomi la 2-3000 pecojn de simpla maŝinskribilo? En ĉiu lando estas alia maniero. Por ĉiu afero oni devus elekti komitatton internacian (ekz. por difinoj de skribmaŝinaj pecoj) por elekti plej taŭgan terminaron."—Prof. Waringhien ĉe la SAT-kongreso.

"Purcell estas la plej granda komponisto Angla; li havas nenian signifan konkuranton al tiu pretendo."—Felix Werder (The Age, Melbourne, 27/11).

"Homoj, kiuj serioze sindone ludas ludojn, estas tre malfacile instigeblaj al seriozezo pri kia ajn alia afero."

—Eric Linklater.

"Nur per Esperanta interparolado, eĉ je ĉiu oportuno kun siaj samlingvanoj, oni povas plene . . . propriĝi al si ĝian mirindan flekseblecon . . ."

—B. R. Moon en "British E-ist."

"Io jam misigis en niaj lernejoj ĉe instruo de la Angla lingvo kaj literaturo. Studentoj ricevas suprajn kaj pedantan konaron pri la literaturo, dramo kaj poezio, sed ne atingas kapablon uzi la lingvon mem. Mankas do al ili la plej havinda esprimilo por ilia estonta kariero." — Prof-o Mark Oliphant (Melburna "Age").

"Pro la longa intervalo inter recenzeto (pri I Fabeloj de Andersen) kaj alveno de la libro, mi havis la tempon lerni la danan gramatikon kaj akiri danan eldonon, do povis kontentigi longdaŭran scivolemon pri la ekzakteco de la Esperanta traduko (farita, kiel konate, laŭ germana traduko)." — D. B. Gregor.

Estas facile, aserti, ke verkisto aŭ dramisto devas havi kompletan liberon elmontri realisme "la vivon, kiel ĝi fakte estas". Tamen, evidente devas esti ekstrempunkto preter kiu ne decas pasi. Nur mizerkvalita estas tia artisto, kiu ne povas tute taŭge sin esprimi per la rimedoj nun uzeblaj.

## KORESPONDADO?

Ekzistas speco de skribemulo (aŭ kolektitulo!), kies saĝon kaj moralon ni malaprobos. Li petas plurajn gazetojn presi anoncon infane tro pretendan, ekzemple: ". . . pri ĉiaj temoj, kun ĉiuj homoj tra la mondo". Tiu "korespondado" ofte logas viktimojn sendi centojn da leteroj, p.k. kaj aliaj, kiuj restas neresponditaj ĉe la "fiŝanto". Poste tiu kontentigas sian konsciencon, aperiginte anoncon en unu gazeto: "Pro troabunda ricevo mi ne povas respondi al ĉiu individue. Jen komuna dankesprimio . . ." Ekvidas tiun adiaŭon nur malmulto el la skribintoj; sentas malplaĉon ankaŭ la vidintoj de ĝi—kaj entute Esp-o havas perdon.

Fakta ekzemplo: ". . . mult. let. k.p.k. mi ricevis. Mankas al mi mono, tempo, leter-pap. Pardonu, se mi respondos nur malofte" (Tiel!).

Bone, se tiuj "universalaj pensuloj", kiuj pompe pretendas pritrakti "pri ĉiaj temoj", faciligus la carbon per disdono de siaj "ideoj" inter siaurbaj klubanoj.

Ĉiu tiulo ricevu la jenan leteron:—  
Mismensa malsamsideano!

Do, vi rigardas vin tre klara, ĉar vi pretas korespondi **pri ĉiaj temoj!** Mi dube demandas al mi, ĉu vi dezirus pritrakti pri—la vektoraj elementoj de planedorbitoj, kaj la involucio de la vektora kalkulo; la matematiko de minimumaj surfacoj; geologiaj kaj geofizikaj fenomenoj en Japanujo; la limigantaj facoj de kristaloj; la kolorsistemoj en la farbindustrio; la vitamin-bezonoj de algoj; la polihetoj de Norvegujo; la teologio de la Haldeoj; la traŭma teorio de Freud; la prosodio de la trubadoroj; la semantiko de la Latina lingvo?

Vi diras Ne, ho pompe pufa! Do ne uzu tiun frazetaĉon, "pri ĉiaj temoj". Al vi sufiĉu via modesta pens-tereno.

## U.E.A. EN AŬSTRALIO

En nia lando estas 294 membroj de U.E.A., sed el ili 158 estas nur asociaj membroj, ne individuaj. Do ili ne ricevas la utilan Jarlibron kaj la oficialan organon.

## ENTOMOLOGOJ

Interesuloj pri skaraboj kaj insektoj bv. intereŝanĝu ilin kaj korespondu kun O. Marek, instruisto, Zamberk 797, Czechoslovakia.

### FILII NULLIUS

(infanoj de neniu).

"Time" (Julio 20, 1959), traktante projektatan akton, kiu donus rajton al eksteredzecaj idoj, atentigas, ke en 1728 poeto, Richard Savage, sin proklamis la eksteredzeca filo de grafo kaj grafino, kaj laŭdis sin kiel:

No sickly fruit of faint compliance  
he,

but stamp't in nature's mint of  
ecstasy.

(Ne estas mi malforta frukt' de  
seksrutino seka;

min stampis en natura muld' pasio  
ard-impeta.)

### "ALICIO EN MIRLANDO"

"Alice in Wonderland" en 1965 festis sian centan datrevenon. Guste antaŭ 100 jaroj la originala, reala "Alicio", tiam dekjara knabino, ricevis la manuskripton de siaj fantaziaj aventuroj, verkitaj kaj ilustritaj de de Lewis Carroll (Charles Lutwidge Dodgson: 1832-98).

Ekzempleroj de la unua eldono estas tre serĉataj, ĉar da ili estis nur 2000. Depost 1865 la verko aperis 175-foje en 38 lingvoj. Esperanto eldono aperis en 1910, tradukita de E. L. Kearney. (Unesco Features kaj Informa Servo de UEA.)

Kearney (1856-1913) estis ano de la Londona Klubo Esperanta. Lia tradukaĵo bone vendiĝis kaj nun estas bibliografia rarajo. La Esp-a Encik. donas neniam informojn pri la verko E-a, kies aperdaton ni ne scias.—Red.

### UNESCO AND LANGUAGE

In his address at the Tokio Esperanto World Congress Kijiro Inoue recalled that at a Unesco conference in Paris he jokingly suggested that as it was obligatory on the spokesmen for over 100 member States to use one of the official languages (English, French, Russian, Spanish), a day should be devoted to demonstrating the difficulties of the language barrier, namely by every representative being compelled to use a language not his own. The favored ones would then realise to the full what embarrassment is caused to those whose mother tongue was not official.

Even the interpreters cheered.

### DECI: KONVENI

Seriozaj studentoj devus havi tian detalan pritrakton pri du ofte misuzataj verboj. La aŭtoro, T. Nakamura, estas Lingva Akademiano kaj fundekona gramatikisto. Li atentigas, ke dubesenca estas: "Al oratoro malpleje decas kolero!"; ĉu temas pri kolero de oratoro aŭ kolero al oratoro? Fakte temas pri oratora kolero.

Ni konsilas uzi por la dua signifo: "kontraŭ oratoro", ĉar kolero estas animseno kontraŭ iu. Vidu: Plena Vortaro.

16 paĝoj. Prezo ne indikita. Ĉe "Oomoto", Kameoka, Kioto-hu.

### LINCOLN KAJ KENNEDY

La Franca ĵurnalo "Figaro" ĉerpis el Usona preso la jenajn koincidojn pri la murdoj al la du prezidantoj.

Lincoln estis elektita prezidanto en 1860; J. F. Kennedy post 100 jaroj, en 1960.

Politikaj heredintoj de ambaŭ homoj estis nomataj Johnson: Andrew Johnson, naskita en 1808, kaj Lindon, naskita en 1908. La sekretario de Lincoln estis nomata S-ino Kennedy, kaj ŝi penis persvadi la Prezidanton ne iri al la teatro, kie estis okazonta la murdo. La sekretario de Kennedy nomiĝas Lincoln, kaj li provis konvinki la Prezidanton rifuzi la vojaĝon al Dallas, kie okazis la mistera murdo al Kennedy. Fine, la murdonto de Lincoln—John Booth ne ĝisvivis la juĝon, ĉar policanoj mortpafis lin, kiam li provis fuĝi. Lee Oswald ankaŭ ne ĝisatingis juĝon, tial ĉar viro Ruby lin mortpafis en la policejo. —Heroldo de E.

### OBITUARY

Prof. Pierre Bovet (University de Geneve) died 2/12/65. An outstanding Esperantist, he attended a world educational congress in Melbourne in 1937, and spoke on Esperanto and Education in Scots Church Hall that August. He was 87.

### RIMARKINDE!

En letero 7, VII, 1911, Seberty in-vitis Zamenhof registriĝi lian figuron kaj sian voĉon en unu el la nove inventitaj parolfilmoj, kiun Gaumont (amiko de Seberty) afable disponigis al Zamenhof. (Leteroj de Z. 11, 295.)



# The Australian Esperantist



## La Aŭstralia Esperantisto

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: \$A1.50 (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Kvar linioj: \$A.1.00.

---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.

Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

A.E.A. Press Officer: Noel Gamble, 11 Lamington Street, Deakin, A.C.T.

---

N-ro 53 (133)

MELBURNO

Jun. - Julio, 1966

---

### ESPERANTO PRESS — INFORMATION SERVICE

#### What is Being Achieved?

The provocative article, LANGUAGE—THE LAST BARRIER, by President Ivan Maddern, appearing in the Jan.-Feb. issue of AUSTRALIAN ESPERANTIST, was the first in a new series of press statements. Mr. Maddern described the experiment that Morwell High School (of which he is Headmaster) is conducting ("the experiment" which he said "the Victorian Education Department should be making and should have made years ago") by communicating with schools in 20 non-English speaking countries.

The action taken by AEA to obtain recognition of Esperanto by education authorities in Australia was summarised at the end of the article which led to favourable comment in the SYDNEY SUN on 11th March, MELBOURNE SUN on 24th March and the ROCKHAMPTON MORNING BULLETIN on 17th March AT LEAST! Only one of these was reported by a P.I. Officer and it is hoped that the various clubs will record and forward press-cuttings such as these to the AEA Press Officer so that AEA will know what it is achieving.

Other press-cuttings on Esperanto such as the letters to the Editor by Mrs. Hilda Cooper, setting out the advantages of Esperanto over Latin as a world language, published in the HOBART MERCURY on 1st April, and by Mr. Maddern on the "Vicious circle in languages" published in the MELBOURNE AGE on 14th April, should be furnished also. The inability of our education system to meet the language needs of a changing world is being featured by newspapers in almost all States, and members are invited to participate as occasion offers.

Encouraging items include Eunice Graham's "Esperanto Corner" in the MANLY DAILY, H. V. Petley's talks on Esperanto with the Head of the Modern Language Institute attached to Queensland University, the 13 recent press-cuttings on Esperanto from Rockhampton and the congratulations from the Esperanto Co-operative Co. in Sydney. Let's hope the increased circulation of AUSTRALIAN ESPERANTIST persuades them to advertise their wares in it!

#### MADDERN IN CANBERRA

At least that is what Canberra audiences were told on 13th April. The local commercial broadcasting station was so impressed with the tape recording of a radio broadcast over 3UL, Victoria, which the AEA President sent us that he gave it the main place in the news session, dubbing in quite a substantial portion of the tape which was so realistic that the announcer took it on himself to say that the President was in Canberra! The station has agreed to play the full tape later after there is an opportunity to give adequate press publicity. We are submitting this tape to ABC, Sydney, then for consideration as a "national"

feature for broadcast but suggest meantime that clubs approach their local radio stations on items like this.

#### TAPE RECORDINGS

President Maddern's effort in distributing tape recordings to all clubs on a strict time-table (like he does overseas presumably) has not been mentioned in AUSTRALIAN ESPERANTIST to date so may be acknowledged here. Canberra Esperanto Club have joined the band-waggon too and sent the tape recording of the Zamenhof address in Rotterdam by Ralph Harry and Congress photographs to W.A. for inclusion on the same circuit. Any club lacking a tape recording machine might apply to the local ERIC ANDERSON store for use of a National RQ5035 machine (45 gns.)—or if Club is really ambitious an RQ7035 at 79 gns.—to enable them to consider purchase. Enquiries to date indicate that if Esperanto Clubs in different States wish to buy tape recorders a "bulk" order with discount of 20-25% could be placed. If finance is the worry, the AEPD should be approached for the name of a bank prepared to offer a solution.

#### MADDERN AND THE "MORWELL LONGHAIRS"

Melbourne and Sydney readers have had between them at least six articles in the SUN and HERALD about the "longhair" dispute in which students say, "I won't cut my hair," and I. T. Maddern says, "I like boys to look like boys, and girls to look like girls". Our President suspended one student over his hair style and this led one journalist to seek him out and write a feature article in which Mr. Maddern was described as a "humanitarian reformer" who is trying "some unusual experiments":

Students should get a day off each school week for study.

Examinations are "a dreadful limit" which should be exterminated.

Esperanto is the answer to the world language problem.

—NOEL GAMBLE.

#### "THE FAVOR OF THE FAMOUS"

Tolstoy, Romain Rolland and Henri Barbusse are among many who have clearly expressed full support for Esperanto, but have never used the language. A writer in "Sennaciulo" deals with this and seeks causes for their lack of practical application of the international language. He suggests that famous literary men are so physically involved in their work and in themselves that they feel their writings and personality to be authority enough to defend or advance their interpretation of life and society. They thus neglect all other activity, confining themselves to expression of their deepest feeling. Taking these three men as representative of those elite who have praised Esperanto, one may regard them as being so intensely concerned with their mission or message that they could not bring themselves to really learn the language, a diversion which would have lessened their all too fleeting span of direct literary creation.

Tolstoy, a polyglot, could read an Esperanto text after a few hours' study of the grammar, but he never

mastered the tongue and wrote nothing in it. In 1889, 1894, 1909 and 1910 he wrote most favorably of Esperanto. In 1895 the sole Esperanto paper then in existence, printed in Germany, published an article by him in Esperanto translation and was by the Russian censors forbidden entry into Russia.

Rolland, author of "Jean Christophe", in 1920 approved Esperanto in a letter printed with the Esperanto translation of one of his brochures. Barbusse, author of "Le Feu", several times voiced his fervent support of Esperanto, wrote a foreword to a French Esperanto textbook and saw some of his essays appear in Esperanto.

Lanti, a leading Esperantist, for years had correspondence with Barbusse and Rolland, vainly trying to draw them into closer practical union with Esperanto, and later called it a waste of time and energy. The writer in "Sennaciulo" does not regard it so. He holds that no expression of approval for Esperanto is useless, especially if it comes from such as Tolstoy, Einstein, Toller, Gorki and the like. Their judgment, and indeed approval from any source,

official or not, convey a powerful echo of public opinion on Esperanto and are to be welcomed. Even ill-informed or even hostile press comment is of value to the movement in that it draws the attention of readers to the reality of language diversity and presents for their consideration the available solution—the tongue of which Professor Meillet wrote: "All theoretic discussion is vain; Esperanto works". Yes, open discussion is good, even under adverse conditions, for the end result is in a real sense positive: it is seen that the movement moves, that adepts are active, and that Esperanto is a potentially effective factor in the development of international relations.

The Centre for Esperanto Documentation, 77 Grassmere Av., Wembley, Middlesex, is compiling a bibliography of notable references to International Language by outstanding figures from early times to the present. It will be published.

#### RAS - PRIVILEGIO?

Jurnalisto komentis ("The Sun", Melb., 7 Julio): "Onidire, kelkaj nigrahaŭtaj Usonanoj, demandinte ĉe konsulo informon pri migrado en Aŭstralion, ricevis nur takte negativan respondon. Li aldonas, ke Australiaj ŝtataficistoj en Usono private opinias, ke la Aŭstralia registaro fine devos aŭ klare esprimi sian sintenon al Uson-negra enmigro, aŭ rezigni pri kiu ajn provo logi Usonanojn al reĝnigo kiel "nov-Aŭstralianoj".

#### La Libero Malsati.

En Hongkongo maljuna virino en ĉambretaĉo prifabrikas risortetojn el metalfadeno, uzante ilon por kurbigi la materialon. Laborante tri tagojn, ŝi povas fari funton da ili, per kio ŝi enspezas unu HK dolaron = 13 anglaj pencoj. Jen ŝia tuta enspezo. (Letero al "British Weekly", Apr. 21).

Ne sen ironio, oni povas rimarki, ke ŝi ja loĝas en lando libera!

#### U.S. ADDRESSES

Be sure to add the 5-figure numbers after names of U.S. towns, e.g., Calvin Street, Meadville, Pa. 16335. Principally with second-rate matter.

## Australia Kroniko

**PERTH:** Nia Vic-Prezidanto, F-ino O. Stempel, prelegis 25/4 pri sia vizito al Anglujo. Belajn diapozitivojn ŝi montris pri la "Cotswolds", pri Cambridge kaj Oxford kaj pri la moderna zoologia ĝardeno de Whipsnade, kie la bestoj povas libere vagadi. La kunveno de 9/5 estis dediĉita al Finnlando. De S-ro I. Maddern, la A.E.A. Prezidanto, ni ricevis programon preparitan de finnaj E-istoj, kiuj lerte uzis koloritajn bildojn kaj sonbendojn por prezenti interesan programon. S-ro W. Illingworth provizis tre interesan programon 23/5, kiam li prelegis pri sia lasta vojaĝo tra Hindujo kaj Sud-Afriko al Sud-Ameriko.

Nuntempe okazas 5 kursoj en nia urbo. Mardmatene en la lig-ĉambro F-ino A. Longson instruas laŭ "Step by Step", samloke vespere S-ro N. Brodie instruas komencantojn, merkrede ĉe Gosnells instruas S-ino G. Pollard kaj jaŭdespere okazas kurso por progresintoj en la klubĉambro. Krome, S-ino Ruth McGrath gvidas ĉiun mardon kurson ĉe la Teknika Lernejo.

Je dimanĉo 15/5 okazis varbvespero por nia lingvo inter la junuloj de la Ross Memorial Church, S-ro C. Dean, F-ino O. Stempel kaj S-ro J. Hawks alparolis.

**MELBOURNE:** S-ro K. Linton parolis pri la proponita nova angla alfabeto (4/4) kaj la netaŭgeco de la sistemo. S-ro E. McKenzie (11/4) priskribis la vivon kaj verkon de Dame Mary Gilmore. La serion da prelegoj pri la Esperanto-Stilo, en kiu konsilo de D-ro C. Caldera jam ludis gravan rolon, daŭrigis S-ino F. Koppel je 21/4 per traktado de "Marta", "Interrompita Kordo" kaj "Bona Sinjorino", enkonduke al komparo de la stiloj de D-ro Zamenhof kaj Kabe. Ŝi avertis ke oni ne forgesu la influon de la originala verkisto, kiam temas pri tradukado. Je 25/4 S-ro H. Koppel rakontis pri pasintaj tagoj de la Aŭstralia E-movado laŭ malnovaj E-gazetoj kaj aliaj presaĵoj, kiujn li kolektis.

Ni ĝojis revidi inter ni S-ron E. Thompson, kiu revenis de vojaĝo ĉirkaŭ la mondo kaj je 9/5 rakontis al

ni kelkajn impresojn. Samvespere, nova, sed tre entuziasma membro, S-ro H. Beechey, legis memverkitan rakonton. Sub gvidado de S-ino F. Koppel, 16/5, la anoj sin preparis por pli sperta traktado de stiloj per studado pri tropoj kaj ekzemplaj komentarioj en grava kompilajo de D-ro Caldera. S-ro Marshall Cohen klarigis, 23/5, multajn signifojn de indigenaj nomoj, kaj S-ro H. Beechey legis sian poemon pri "Flugantaj Subtasoj". La monato Majo finiĝis per Amuz-Vespero je 30/5, kiam S-ro J. Keogh montris memfaritajn filmojn pri vojaĝo tra Kvinlando.

En la aprila kunveno de la "REN-DEVUO", S-ro Herbert Koppel prelegis pri vojaĝo li faris "Sur la Tegmenton de Aŭstralio". Pli ol cent belajn diapozitivojn li montris pri Monto Kosciuszko, pri la samnoma Stata Parko kaj pri la grandioza Snowy Montara Elektra Projekto. Bonvena gasto je tiu ĉi prelego estis D-ro J. Scolnik, el Cordoba, Argentino, kies fratino estis nia gasto pasintjare. En Majo S-ro E. Hanks priskribis kun lumbildoj vojaĝon per aviadilo al Alice Springs kaj Darwin kaj per sipo de tie al Perth. Bedaŭrinde, la tempo forflugis tro rapide kaj la parolanto devis prokrasti detalojn pri la malofte vizitata nord-okcidenta marbordo por estonta prelego.

**SYDNEY: Eksterland - Vizitanto:** 2/4 telefono tintis en la hejmo de gesoj Schwerin; ĉe la alia fino parolis F-ino E. L. Parson (Bristol), kiu ĵus estis alveninta en Sydney-haveno surŝipe de "Canberra" post sepmonata restado en Japanujo, kie ŝi kunlaboris kun Oomoto. Kompreneble oni gastigis ŝin en la supra hejmo, kie ŝi pasigis la tagon en harmonia babilado pri komunaj Esperanto-amikoj kaj la interesajoj de sia vivo, trifoja vizito al Hindujo post aventurricaj aŭto-vojaĝoj transkontinentaj, ktp. Pri la ne-antaŭa averto pri la alveno estis neeble, kontakti aliajn samideanojn aŭto-posedantojn. Do la gastigantoj povis montri al ŝi nur kelkajn proksimajn vidindaĵojn ĉe la haveno kaj . . . la hejman kolekton de interesaj mar-konkoj. La ĉarma gastino estis survoje al Nov-Zelando kaj Anglujo.

**Esperanto-Federacio de N.S.W. kaj A.C.T.:** 7 anoj de la Esperanto-klubo Manly, Hornsby kaj Sydney kunvenis

25/4 por diskuti fondon de Esperanto-Federacio de N.S.W. kaj A.C.T. Ili ellaboris la unuan bulleton kaj sugestis, ke la libertempa semajnfino de 1, 2 kaj 3-a de Oktobro eble estus la pli taŭga tempo por la unua Federacia kunveno. Ciuj E-istoj de N.S.W. kaj A.C.T. estas invitataj, (a) aliĝi al la Federacio (5/- jare) kaj (b) ĉeesti la aranĝotan Oktobran Federacian Kunvenon je Esperantodomo, Sydney (se ĉi tiu propono povos okazi). Bv. tuj kontaktu la provizoran sekretarion, S-ino E. Graham, 98 Woodland St., Balgowlah, N.S.W.—Brenda Cooley.

**MANLY:** Je 12/3 la anoj de "Manly" Klubo adiaŭis S-inon Marjorie Duncan, kiam ŝi enŝipiĝis per "ELLENIS" por vojaĝi al Anglujo. S-ino Duncan anoncis, ke ŝi ĉeestos la 50-an Jubilean Kongreson de la Britaj Esperantistoj dum junio en Norwich, Anglujo. Dum ŝia 6-monata foresto S-ro Kevin Smith agas kiel Prezidanto.

**Informa Kunveno pri UNESKO:** Kiel vic-presidanto de la Aŭstria Esperanto-Asocio, S-ino Kevin Smith, specialisto pri edukado ĉe Nacia Eduka Oficejo de la Komunumo de Aŭstralio (Education Officer of the Commonwealth Office of Education), estis invitita ĉeesti informan kunvenon pri la programo de UNESKO mondskala kaj, specife tio en Aŭstralio. Ĉi tiu kunveno estis prezentita de la Aŭstria Nacia Konsila Komitato por UNESKO (Australian National Advisory Committee) la 16an de marto, ĉe la "Commonwealth Centre", Sydney, sub la prezido de Profesoro W. F. Connell, profesoro pri edukado ĉe la Universitato de Sidnejo. Kvindek delegitoj el aliaj naciaj kaj internaciaj organizaĵoj ankaŭ ĉeestis la kunvenon. Du oficistoj de la Aŭstria Nacia Konsila Komitato por UNESKO priskribis la laboron de UNESKO kaj distribuis foliojn kaj broŝurojn pri ties celoj kaj atingoj. Pluraj delegitoj poste faris demandojn.

**Dimanĉaj Klub-renkontiĝoj** okazis 20/3 ĉe la hejmo de S-ino Eunice Graham, kie la anoj ĝuis piknikon en la ĝardeno, kiu superregardas la havenon; ankaŭ 17/4 ĉe S-ino MacGillivray, kie okazis muzika programo kaj Esperant-kantado sub gvido de S-ino Ford-Lewis.

**Kursoj:** Je la fino de Aprilo sukcese finiĝis la unua trimestro de la 3-kursoj ĉe la "Manly" Vespera Kolegio sub gvido de S-ro P. Schwerin, S-ino K. Schwerin kaj S-ro K. Smith. S-ino E. Graham kaj S-ino B. Cleminson daŭrigas instruon al la junaj lernejoj lernantoj de S-ino Duncan. La "Narrabeen" grupo sukcese kunvenas ĉiusemajne sub gvido de S-inoj Morrison kaj Forrest. Informo pri la Esperanto-Movado kaj klubaferejoj aperadas en la ĵurnalo "Manly Daily".

**ROCKHAMPTON:** Normale progresas niaj du ĉiuvesperaj kursoj en la Plenagula Centro, kaj la porinfana lunĉhora kurso en la Altlernejo. Cees-tis proks. 8 gelernantoj en ĉiu klaso.

S-ro Petley, kiu antaŭ nelonge forlasis nian urbon, jam dissendis la unuan numeron de sia periodaĵo "Voĉo de Kaprikorno". La celo de la "Voĉo" estas interŝanĝi diverstemajn informojn inter ĉiuj landoj apud la Tropika zono ĉirkau la mondo.

D-ro Degotardi baldau komencos instrui E-on en Yappoon. Gratulon al li, kiu estas memlerninto de nia lingvo.

Ni skribis al Universal Business Directories (Universalaj Komercaj Adresaroj), petante informon pri kondiĉoj pri enmeto de nia societa nomo-adreso en la koncernata eldonaĵo. Ili afable respondis, ke enmeto estos senkosta al ni. Komprenoble nia sekretariino rapidege sendis ĉiujn detalojn pri ni!—John Moore.

### BRITISH E. CONGRESS

Lady Fraser sent us cuttings of the 50th British Esperanto Congress in Norwich, which city now has an "Esperanto Way". 450 attended, among whom was a Russian refugee, whose fluent Esperanto and dramatic recital won him space in the press reports.

**MARTINUS INSTITUTO** diskonigas inteligentece fundamentitan vivkoncepton por doni materialon por libera esplorado. Ĝi plene respektas aliajn vivkonceptojn kaj konsideras, ke neniu havas la rajton altrudi propran vivkoncepton al aliaj. Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe la Instituto, Mariendalsvej 94-96, Copenhagen F., Denmark.

## Recenzoj

**Esperanta-Portugala Proverbaro kaj Amo per Proverboj**, de Artur Azevedo. Trad. A. Couto Fernandes. Dulingva teksto. Eld. Brazila Esperanto-Ligo, Rio de Janeiro, 1964. 170 paĝoj. Broŝ. 15, bind. 25 steloj.

La E-a Enciklopedio enigme asertas, ke la dua eldono de la Proverbaro Esperanta okazis en 1905, ne indikante daton de la unua! Certe temas pri la verko de la patro de L. L. Zamenhof. Lau "British E-ist" (Aprilo 1934) la Proverbaro Esperanta unue aperis en eldono de Hachette en 1910. En ties antaŭparolo Zam. informas, ke lia patro en tiu jaro 1905 komencis sian kvinlingvan proverbaron. Zamenhof poste faris la E-an parton.

En 1961 Stafeto eldonis ĝin laŭ arango de C. Rogister. En 1964 la Brazilaj E-istoj, pro honoro al sia granda pioniro kaj ĉiamaktiva prezidanto, eldonis la unuan Esp-nacilingvan Proverbaron, kun laŭalfabeta listo de temoj. Ĉiu proverbo, laŭ aŭtoritata takso, trovas bone adekvatan saĝdiron el la Portugala lingvo.

La dua parto konsistas el milde amuza komedio unuakta—Amo per Proverboj—en kiu paro amanta febre kolumbumas plejparte per proverbo-konversacio. Ok aprobaj de E-aj eminentuloj kaj gazetoj antaŭire stimulas legantojn al ĝuo de la teatraĵo.

Utilos al lingvemuloj la Portugal-lingva paralelaĵo.

Ankorau unu "proverbo": Klopodado grava pri afero senenhava = Much ado about nothing.

**RAINIS, GENIA LATVA LITERATURISTO.**—Honore al lia 100-jara datreveno, la Latvoj eldonis libreton pri lia vivo kaj verko. Estas kortuŝe, ke la etaj nacioj situacias en maljusta stato, en tio, ke iliaj grandaj animoj ne povas trovi vastan publikon kapablan aŭdi rekte kaj senpere la aŭtentajn tonojn kaj elkorajn kriojn de ilia spirito. Al homoj fremdlingvaj iliaj vortoj devas perdi esencan pere de tradukoj pli-malpli bonaj. Danoj, Rumanoj, Litovoj kaj aliaj, limigitaj de malvasta lingva tereno, ne havas rajton aŭ povon spontanee



paroli celtrafe en la koron de la civilizita mondo. Jen terura malavantaĝo, kiu ne kongruas kun la interhomia justeco.

Iam inter ili leviĝos homoj, kiuj per Esperanto forfrakasos la murojn de la lingva diverseco kaj per propre pura voĉo rekte stingos senliman komprenatecon per la universala parolmedio.

Rainis (1865-1829), giganto inter la pensuloj-verkistoj, fekunde poemfaris, artikolis, aforismis kaj tradukis. Li fidele revestis por siaj kunnacianoj verkojn de Goethe, Puŝkin, Lermontov, Ibsen, Schiller, Shakespeare. Inverse, liaj verkoj tradukiĝis en multajn lingvojn, inkluzive Esperanton.

Ci 31-paĝa broŝuro elmontras al la mondo lian vivon kaj verkon kiel patrujama revoluciano, funda socia meditemulo, kaj rekonstruanto de la nova socio.

Havebla je peto ĉe: Latvia Societo, Esperanto-sekcio, Gorkija iela II, RIGA, Latvia, USSR.

**"MI AMIS JUNULINON".**—La mondsukcesa libro "J'ai aimé une fille" (Editions Trobisch, Baden-Baden) tradukiĝis jam en 40 lingvojn. Ĝi aperos sameldoniste en Esperanto je Pentekosto 1966. 110,000 ekz-oj de la Germanlingva eldono "Ich liebte ein Maedchen" vendiĝis en malpli ol 6 monatoj. Petu ĉe A. Lienhardt, 24 Fbg. de Riedisheim, Mulhouse, France.

**"LA ESPERANTO-SOCIETO".**—Eld. U.E.A. 20-paĝa; prezo 6 steloj. Trafaj artikoloj de Lapenna, Becker, Wensing kaj Jaumotte pri celtaŭga instruado, informado kaj praktika utiligado ĉe Esperanta societ-laboro, kun modela statuto de loka grupo. Prezento de kree konstruaj konsiloj, por forigi mankojn kaj difektojn en societ-strukturo, kune kun forta admono pro faktoroj malhelpaj al progreso.

Suka, neniel seka, verkokolekto, el kiu jen trovi ekzemplojn:—

"Al nia afero pli malutilas indiferenta, ŝanceliĝanta esperantisto ol evidenta kontraŭulo."—Wensing.

"Erare estas nomi Esperanton 'artefarita', 'helpa', 'verda' k.s. anstataŭ tutsimple 'La Internacia Lingvo' aŭ 'Esperanto' . . . Eraro estas uzi en nacilingvaj tekstoj—kaj, laŭ mi, ankau en la Esperantaj—esprimojn

kiel 'samideano', 'Majstro', 'verdstelanoj', 'verda popolo' k/s. . . Eraroj en la informado malproksimigis de Esperanto dekmilojn da personoj kaj kaŭzis fortan kompromitigon de la Movado en multaj medioj."—Lapenna. Aktivuloj, mendu ĝin ĉe U.E.A.

### NUMBERING "THE A.E."

On the front-page dateline the first number is that of The Australian Esperantist. The number in parentheses includes the sum of issues published under its former name: La Rondo.

Numerado de The A.E.:—En la frontpaĝa datlinio la unua cifero indikas la numeron de The A.E.—53 (133). La cifero en krampoj inkluzivigas la kiomon da numeroj eldonitaj kun ĝia antaŭa nom-titolo: La Rondo.

Aperis 165 numeroj de La Suda Kruco (Julio 1920 - Oktobro 1934); 80 La Rondo (Jan. 1947 - Dec. 1957); 53 The Australian Esperantist (Jan. 1958-?); sume, 298 presitaj numeroj.

Krome, aperis mimeografitaj La Rondo (Oktobro 1940 - Decembro 1944); kaj Februaro 1946 - Januaro 1947): sume, 63. Kiom da niaj legantoj ankoraŭ posedas ilin?

### TOKIO NOTEBOOK

Fluent Japanese speakers of Esperanto are on a par with our own, but the learners seem much better. After seven months' study a girl held her own with him in conversation. How do they do it? Hard swot!

A few hotel staff speak very elementary English, but one always needed a Japanese Esperantist to referee the discussions. A teen-age Tokio lad was the best speaker of English they found among the Japanese. He had learned it for ten years—all his school life, one could say—and had reached the equivalent standard of a fellow-countryman's one-year study of Esperanto.—D. McGill, in New Zealand E-ist.

### SCHOOLS

"After more than five years experience with Esperanto as an integral part of the school program, the Hawera Intermediate School sees no need to alter its original views on the importance of the language and its functional utility".—Report by the Headmaster in "National Education", New Zealand.



### PRI LA POEZIO

En "Nica Literatura Revuo", n-ro 3, 1956, p. 88 William Auld prezentas du difinojn de la Poezio. Jen la unua:

Poezio estas la plej taŭgaj vortoj plej taŭge aranĝitaj" (Samuel Coleridge).

Do, se mi skribas: "Sendu du funtojn da bifteko tranĉita el la lumbo de besto freŝdate buĉita", tio estas precize laŭ la difino—kio kompreneble ne taŭgas!

Jen la dua:

Poezio estas lingvaĵo ŝarĝita ĝis la plejebla grado je signifo. (Ezra Pound.)

Tiu difino simile ne taŭgas, ĉar la frazo "Via onklo mortis kaj lasis al vi milionon da dolaroj" verŝajne havas por la feliĉa koncernato la sencon de la difino.

R. Schwartz forĝis por si jenan difinon: "Bona poezio estas tiu, kiu malgraŭ ritmoj kaj rimoj konservas la ĉarmon de bona prozo", kaj mem komentas: "sed ne nun demandu min, kio estas bona prozo!"

Pli plaĉas al multaj la vortoj de Brendon Clark en "Kien la Poezio?" **La poezio estas la kontentiga esprimo per mezurita lingvo de pripensinda ideo.**

Clark nomas la diferencon inter la prozo kaj la poezio: "La celo de la prozo estas sciigi; la celo de la poezio estas sentigi. La prozo traktas pri faktoj (aferoj?) kiuj naskas ideojn kaj pensintereson; la poezio traktas pri ideoj kiuj naskas sentojn kaj pensemociojn.

"Sen ideoj, poemo neniam valoras. Ĝi eble havas plaĉan ritmon kaj belajn rimojn, tamen sen ideoj ĝi estas nura vortludo. Kaj estas atentinde, ke lertaj rimoj povas logi atenton for de ideomanko; tiel same ili povas logi for de ideoriĉo.

"La drama poezio de Shakespeare estas preskaŭ senrima; ĝi vivas per siaj ideoj kaj trafa lingvo. La senrima poezio estas la plej malfacile verkebla . . . . Kaj sen ideoj ankaŭ ĝi estas nenio."—Robo.

(Inspirita de Schwartz en "Nica L.R.", n-ro 5.)

"Barbekuo" troviĝas en neniu Esperanto-vortaro. La Australia uzado forte diferencas de la difinoj en la Oksforda Angla Vortaro. Saĝe ni elektu vorton Esperantan, kiu taŭge

kaj klare donas la sencon. Ni ne uzu jargonon.

### PRI TRADUKANTOJ

"Mi aprobas tiujn redaktorojn, kiuj laŭprincipe malakceptas tradukojn faritajn de Esperantistoj kies gepatra lingvo ne estas tiu de la originalo: se ili tiel agas pro deziro havi ian garantian, ke la tradukinto bone posedas la lingvon de la tradukita verko, tiam li estas prava. Sed se li plie asertas, ke nur anglo povas bone traduki el la angla lingvo; ke tradukojn el la franca lingvo devas fari nur franclingvanoj k.t.p., tiam mia aprobo ĉesas!

"Ĉu vi kredas, ke traduko farita de anglo kiu malbone traktadas eĉ sian propran lingvon (tiaj angloj ekzistas!) estas pli leginda ol traduko de la sama verko farita de franco kiu posedas la anglan lingvon perfekte kiel sian gepatran (tiaj francoj ja ekzistas)?"

"Almenaŭ jenan malbonaĵon povas havi (kaj ofte havas) Esperantaj tradukoj el nacia lingvo faritaj de la naciilingvulo mem, precipe se li posedas neniun alian lingvon fremdan: se Esperanto ne fariĝis al li kvazaŭ dua gepatra lingvo, kiun li scias uzi, skribe aŭ buŝe, laŭ la vera Zamenhofa maniero, tiam mankos al lia verko la vera Esperanta spirito. Simile al lernekerco de mia lernanto, ĝi restos spirite kaj forme nacia—iu fi-Esperantajo laŭ sia ekstera formo, sed montranta en ĉiu linio sian nacian originon".—J. W. Eggleton, "Lingvo Internacia", Novembro 1911.

Eggleton (egilton), anglo-germano, estis tre korekta kaj klareprima E-isto. Strange, ke lia laboro ne gajnis por li lokon en la Enciklopedio de Esperanto. Lia traduko de "La Karavano" (Hauff) estas perlo de pura prozo. Ankaŭ Degenkamp ("Esperanto 60-Jara") ne meritis lin en sia verko.

Pri la demando levita de Eggleton estas tamen bone konsideri ankaŭ la vortojn de Rosbach ("Esperanto", Okt. 1959):—"W. Somerset Maugham skribis ie: 'Se vi dediĉas vian tutan vivon al tio, vi neniam lernos paroli perfekte la lingvon de alia nacio; vi neniam konos intime ĝian popolon kaj literaturon. Ĉar ili, kaj la literaturo, estas la rezulto ne nur de la

agoj, kiujn ili faras, kaj la vortoj, kiujn ili uzas,—el kiuj neniu estas malfacilaj—sed la prapatraj instinktoj, nuancoj de sento, kiujn ili absorbis per la patrina lakto, kaj naturaj kondutoj, kiujn povas la eksterlandano neniam tute kapti'.

"Ĉi tiuj vortoj de la granda angla aŭtoro klare reliefigas la signifon de Esperantaj antologioj pri la diversaj nacilingvaj literaturoj. En tiaj antologioj homoj mem el la koncerna lando, kun la koncernaj ecoj menciitaj de Maugham, tradukas la literaturon, kiun ili tiel bone kaj kone komprenas, ne en alian nacian lingvon, kiun ili ne absorbis kun la patrino lakto, sed en la SIMPLAN, FLEKSEBLAN, BELSONAN lingvon internacian".

Certe estas, ke perfektaj plurlingvuloj estas ekstreme maloftaj. Studinte la francan dum pli ol 25 jaroj, Arnold Bennett (fama angla aŭtoro), en Parizo ne povis kompreni ordinaran franclingvan konversacion, nek sin komprenigi en tiu lingvo. Li jam dum dek jaroj estis verkinta pri la franca literaturo. ("La Suda Kruco", Junio, 1930).

P. G. Hamerton en "The Intellectual Life" (1875): "M. Philarete Chasles (1798-1873) asertis, ke estas tute maleble ke matura homo povus lerni la germanan lingvon!" Hamerton komentis, ke plenaĝulo povas lerni la germanan, kiel faris D-ro Thomas Arnold, nur pro celo erudicia, librolerna. Tiel same oni faras kun la Latina; sed tio ne estas plena posedo, kompleta mastreco.

Eĉ al Heine la uzado de la dativo kaj la akuzativo forte lin ĝenis en la patra germana. Schlegel kaj aliaj amikoj korektis multon en liaj fruaj poemoj. ("Heine's Poems": Carl E. Eggert).

Revene al ni E-istoj: Pri iuj Anglaj tradukintoj jen vortoj de recenzantoj:—"La Dormanto Vekiĝas": "troa oboe al la originala teksto"; "la originala teksto tro streĉe influas kaj ligas la tradukanton". "La Naiveco de Pastro Brown": "la Angla lingvo vidiĝas tra la tuta teksto"; "Angla lingvo esprimita per Esperanto". "La Fera Kalkanumo": "la tradukinto ne sciis trovi Esperantan formon por Usonaj idiotismoj . . . li tradukis

ilin laŭvorte kaj en piednotoj ilin klarigis". "Petrolo": "tro laŭvorta traduko de Anglaj dirmanieroj". Kaj la Franco Vallienne "falas tro ofte en francismojn" (Encik. de E.).

Eble la plej drasta, detruie-kritika recenzo iam farita venis de Eggleton en "Lingvo Internacia", Dec. 1911, kiam li lingvaje analizis "Ostlorn", Nederlanda verko trad. de samlingvano S. Ulfers. Malgraŭ la lingva sperto akirita dum jardekoj, ankoraŭ troviĝas presitaj tekstoj kiuj, pro nacilingva influo aŭ aliaj danĝeroj, meritas la vipantan manon de konscienca recenzanto.

### GIANTS OF FAITH

Faint hearts among us may take courage by recalling that the pioneers of the early days had deep faith in the future of Esperanto. When Esperantists were few and largely localised in Russia, K. Bein issued in 1897-98 his Esperanto translation of "La Faraono" (Prus), 630 pages in same type as that used in our gazette.

Joseph Rhodes began to compile his 547-page English-Esperanto dictionary (pub. 1908) in 1902, when there were only 77 British names in Zamenhof's Address Book. George Cox, at own cost, published his 371-page Commentary on Esperanto in 1906. Henri Vallienne in 1906-1908 brought to press his translation of The Aeneid and two long novels in original Esperanto.

There were others, too. Let us, one and all, consider the fervor with which they fronted their situation, and allow some of it to filter into us.

### KOREO AŬ KOREUJO?

Rhodes, Jung, Edinburgh vortaroj kaj la Jarlibro de la U.E.A. donas Koreujo (la lando) kaj Koreo (la loĝanto). Ili havas kontraŭ si: Waringhien (E-Fr.), Albault (Fr.-E.), Fulcher & Long, Nylen (Sveda-E.) Wuester (Enciklopedia Vortaro), kiu donas Koreo (lando), Koreano (loĝanto).

La unua apero estas en Jarserio V. de "La Esperantisto" (1894), kie Jozef Wazniewski uzis "Koreo" por la lando.

Kiu fine akceptiĝos? Sinjoroj, metu vian vetmonon!

# The Australian Esperantist



## La Aŭstralia Esperantisto

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: \$A1.50 (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Kvar linioj: \$A.1.00.

---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.

Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

A.E.A. Press Officer: Noel Gamble, 11 Lamington Street, Deakin, A.C.T.

---

N-ro 53 (134)

MELBURNO

Aŭgusto - Septembro, 1966

---

### LA ESENCA TASKO DE NIAJ NUNTEMPAJ LITERATURISTOJ

“Por ke nia civilizacio evitu ankoraŭ pli grandajn kataklismojn, niaj verkistoj devas fariĝi pli signifaj ol simplaj spegulantoj de ĝia perfortemo kaj malintegriĝo. Ili devas per siaj propraj pensostreĉoj regajni la iniciativon por la homa personeco kaj la kreaĵ fortoj de la vivo, katenante la demonojn, kiujn ni lasis laŭvole diskuradi, kaj liberigante la anĝelojn kaj servantojn de l'graco, kiujn ni hontsente—kaj ja hontege—enkarcerigis.

“La verkanto ankoraŭ devas esti faranto, kreanto; ne nur kronikisto de faktoj li estas, sed, antaŭ ĉio, interpretisto de l'eblecoj. Liaj intuicioj por la estonteco ankoraŭ povas doni efektivecon kaj konkretecon al pli bona mondo, kaj helpi nian civilizacion al komenco de nova ciklo de aventuro kaj penado. La verkisto de nia tempo devas trovi en si la tutecon, integrecon, kiu nun mankas al la socio. Li devas redoni racion al la homoj senraciaj, al-celemon al la malvenkemuloj kaj senceluloj, valoron al la nihilistoj, esperon al la faliĝintaj en malesperon.

“Mi tute ne scias, je kiu dato la unua duono de la 20-a jarcento fakte finiĝos (1), ĉar tiu finiĝo estos spirita evento ne markota sur la kalendaro. Tamen mi povas antaŭdiri unu el la eventoj, kiuj tre verŝajne ĝin finmarkos:—la ekapero de romano, poemo

aŭ prezentajo teatra, aŭ eĉ filozofia verko, en kiu la entuteca homo fariĝos videbla, samklare videbla kiel la niatempa malintegriĝinta homo de ‘Ulysses’ au ‘The Remembrance of Things Past’. Tiu ankoraŭ nenaskita kreotulo fokusos en si la sanigajn fortojn, kiuj ankoraŭ restas en nia socio, kaj helpos al ni transcendi—unue en nova sistemo mensa kaj spirita, kaj poste en konkretaj, faktaj agoj—la katastrofojn, kiuj nun minacas la homaron”.

Per la supra, Lewis Mumford (“New York Times”, 1950) pritraktas la grandajn epokfarajn produktojn de la verkado dum la lasta jarcento, kaj alvokas al la sociŝanĝantoj de la plumo—ke ili venu el la latenteco en la potencon de l'realeco . . . ke verkistoj ĉesu vortpentri la dekadencan, haoson kaj putron, kaj male formu ideojn konstruajn kaj psike sanigajn. Alivorte, ke ili faru verkojn, kiuj save surreligos la erarvagintan socion kaj ĝin puŝos denove antaŭen.

Similsence, Walter Lippmann, klarvida verkisto, asertis, ke la moderna edukado malŝate forigis el la lernprogramo la tutan religian tradicion de la Okcidento. Ĝi forjetas, kiel ne plu merithavan, studadon de ĉiuj klasikaj verkoj, kiujn postlasis al ni la grandaj animoj de la pasinteco. Li avertis, ke se daŭros la nuna edukpolitiko, ĝi nepre detruos la Okcidentan civilizacion.

(1) Lau Mumford, la 19-a jarcento komenciĝis en la jaro 1815 (Waterloo-batalo) kaj finiĝis en 1914.

## DIO KAJ BABELO

A. Burkhardt ("Dia Regno", Jul. 1965) montras leteron de pastro, kiu malakceptas E-on pro sia interpreto de Dia malbeno (Gen. 11/9).

Efektive do ekzistas Kristanoj, kiuj kredas, ke Dio kiu konfuzis la lingvojn ĉe Babelo, kontraŭas kiun ajn provon ilin malkonfuzi. Sed strange estas, ke tiu sama Dio ordonis: "Iru do kaj disciplinigu ĉiujn naciojn... instruante ilin", kiu ordono hankaŭ implicon: ke la lingvoj de la alpredikotoj devas esti lernataj por tiu celo.

Sed, se estas peke, provi forigi la Babelan malbenon, estas peke ankaŭ lerni fremdan lingvon. La eklezio Krista, tamen, enhavas milojn da poliglotoj; konsiderinda nombro da pastroj kaj religiaj gvidantoj uzadas Esperanton.

Ni nin turnu analoge al la grave-deco. En Gen. 3/16 ni legas: "Mi multigos viajn suferojn dum la grave-deco". Ĉu do sciencistoj peke faradas, penante malpliigi la suferojn de nas-konta virino? Ĉu pekas simpla familiano, klopodante fari pli komforta la staton de tia suferantino?

Supozinde la supre menciita pastro kondamnis ankaŭ spacesploradon, kredante, ke Dio jam por eterne difinis la limojn de la homoj sur la tero (Ijob 14/5, Agoj 17/26). En tio lin subtenus multaj pensuloj pro sciencaj tialoj pure fizikaj, kaj aliaj pro morala motivo, ĉar la fincelo de tiu esplorado estas t.n. "nacidefendo", alivorte masmurdo. Ne la Amo motivigas spacesploradon.

Leo Belmont, ĉe la ĉerko de Zamenhof, prave atentigis, ke la modesta, humilanima Polo, per siaj dediĉitaj manoj, povis per Dia favoro forigi la malbenon de Babelo, kiu celis punon de singlorantoj.

Sajnas malfacile, harmoniigi koncepton pri Dio de l'Unueco kun koncepto pri Dio, kiu volus eternigi unu el la ĉefaj kaŭzoj de miskompreno, malamano kaj fratmurdado. Amo al konfuzateco, anima haoso, estas karakterizaĵo ne de Dio sed de Diabolo.

"Vi estu perfektaj", je solena ordono. Lingva diverseco estas speco de malperfekteco homa. La "potenca senkorpa mistero, fonto de l'amo kaj vero", volas helpi nin al la perfekteco, kaj laŭ tiu eterna intenco de temp' al tempo levas homon por efektiviĝi sian volon. Zamenhof estis unu tia.—F.R.B.

## Recenzoj

**Esperanto: A New Approach.** William Auld, M.A., D.B.E.A., member of the Esperanto Academy. Published by "Heroldo de Esperanto", Brussels. 92 pages. 8/7 in sterling.

The book aims at enabling the teacherless student to read Esperanto texts and then go on to wider familiarity with the language. Mr. Auld's new approach is to centre on the characteristic feature of Esperanto, its agglutinative, or word-building nature, which earlier English possessed but which has been lost by it in the course of history. He has, shall we say, made Esperanto stand on its own legs and speak for itself, through, he hopes, the lips of the learner.

To fall back on the tongue itself:

Nu, estas facile ja pike kritiki,

Sed pena la faro praktike fabriki.

Nevertheless, a few remarks may be made.

23: "There are a few adverbial words ending in -aŭ". Of 20 such, laŭ, malgraŭ, anstataŭ, antaŭ, ĉirkaŭ are prepositions; kvazaŭ is both a preposition and a conjunction; aŭ is a conjunction; naŭ is a numeral; ambaŭ a pronoun; adiaŭ an interjection. The rest are adverbs.

32: "La libro estas legita (de vi)" is translated by "The book is read (by you)". Preferably one would say: "has been read . . ." for the compounded form means: is in a state of having been read. On page 47 we find two forms: "la pordo estas fermita—"the door is closed, or has been closed".

34: On the passive adverbial participles. Exercise 32 gives throughout as examples sentences in which the participle correctly relates to the subject of the sentence: "Skribite, la letero ŝajnis malafabla"—with one exception: "Kiel sciante, mi estas malfeliĉulo". "Sciante" does not refer to the subject "mi", being as it is an impersonal construction, the meaning of which is: It being known, or, As is known. . . . There is no "participio absoluta" in Esperanto, so one may describe this as the impersonal use of the participle. Compare this with a similar sentence from another book: "Mi renkontis vin, kiel aranĝite . . ." Instead of "Kiel sciante . . ." why not "Oni bone scias, ke mi . . .";

"Laŭ ĉies scio, mi..."; "Laŭ vasta scio, mi..." or the like? The adverbial participle must relate to the subject of the sentence (Plena Gramatiko). In the interest of simplicity and regularity, these "eccentric" forms, though traditional, should be discarded.

58: "OL is sometimes used after POST before a verb". We seek for an instance where (post) ol or (post) kiam is not used before a verb. E.g., Post ol (or, kiam) mi eklernis...

59: PRA- is found used in three ways. Besides the two mentioned it may, according to the Plena Vortaro, indicate relationship of generations prior and subsequent, e.g., praavo and —pranepo. (Christaller 1921 prefers "postnepo", but Minor 1924 gives "pranepo" without adverse comment.)

37: The reflexive pronoun SI cannot be fittingly presented in 20 lines of explanatory text. Much is omitted that the student will later come up against. Sentences other than the simplest might well have been introduced, e.g., Ĉi tiu estrigis lin super sia domo; Li ordonis lin eniri sian ĉambron. "Siatempe" is not mentioned.

Mr. Auld merits praise for his straight handling of PO, his clear differentiation of the prefixes: fuŝ-, mis- and fi-, and the suffix -aĉ, and his psychological approach, whereby he brings, through chosen passages in exercises, the learner into swift contact with the worth of Esperanto and the expressive clarity of some of its literary adepts.

The writer may have worked under space limitation, and so been forced to a proportional limitation of matter he would wish to use. Even so, he has produced a useful self-instructor which rightly blends with its teaching adjurations to seek by more detailed study a fuller knowledge of the language.

**Note:** With every copy of the above purchased is given a coupon value 0.30 U.S. dol. as rebate on volume 4 of Andersen's Fables (translated by Zamenhof).

The A.E., p. 121: On page 281 of "Step by Step" (8th edn.) is a helpful note on ATA-ITA.

**Inter Du Mondepokoj:** Martinus. Tradukis Ib Schleicher. Mariendalsvej 94-96, Copenhagen F. 106 p. (indekso); 18 steloj.

Martinus naskiĝis en 1890; komencis sian idean apostoladon ĉ. 1920. Meminstruinto, memilumiganto, li ne studis librojn, nek majstrojn. Tiu persona individueco evidentiĝas en liaj verkoj per manko de citaĵoj el aliaj pensuloj—fakto kiu forprenas intereson de la tekstoj.

Kritikante la "tradician" Kristanan kredon, li ne donas lokon al la moderna pensfludo en ties teologio.

Tre fekunda verkulo, sian "Libro de Vivo" li suplementadas per konstanta kresko de akcesoraj studaĵoj, plejparte iom tre esoteraj. Lia kombino de scienco, okulto kaj prikosma, prihoma spekulativo ĉefe interesus homojn de teozofiema mens-inklino.

La Esp-a tradukserio estas brava provo plivastigi lian mondkoncepton. Eĉ sen plena kompreno pri lia instruo, pacienca leganto prave konstata, ke Martinus staras kun la plej originalaj esplorantoj pri la mistero de la vivo kaj destino, la tempo kaj eterno.

**La Esperanta Konjugacio:** Teo Jung. Unua volumo, 123 kvartformataj paĝoj. Dua parto aperos en la venonta somero au autuno. Prezo por ambau kune: 3.85 Us. dol. (54 steloj), ĉe Heroldo de Esperanto.

En 1961 aperis pri la pasiva participo kolekto "La Zamenhofa Esperanto" (eld. Stafeto), al kiu kontribuis dek Esperantaj verkistoj. La tuto plendis por specifa interpreto de lingva principo: Ĉu -ita, ĉu -ata? Tri Akademianoj en 1965 en detala pritrakto rebatis favore al la koncepto de la kontraŭa "skolo". Nun venis la unua el du volumoj. Ĝi estas kolosa fortoŝteĉo de unu sola viro, kiu, ĝin kompilante, "utiligis la pensojn kaj ideojn de multaj aliaj samideanoj". Ĝia dense kompakta materialo, kun pacienca fontindikado kaj trafa titoligo ĉapitra, atestas la intencan sindonemon de homo, kiu ĝisoste kredas sin prava en sia prilingva rezonado, kaj inter alio, povis penade prinoti dum sia esploralaboro 10,300 participojn en 14 verkoj de Zamenhof. Pli ol 1000 ekzemploj de participa uzo troviĝas sur la paĝoj de ĉi tiu "apologio pri principo".



La Akademia aŭtoro, kiu fondis kaj redaktis dum 40 jaroj la mondek-onatan "Heroldo de E.", dankas al D-ro E. Vilborg kaj S-ro Luis Mimo pro iliaj konsiloj.

Por resti objektiva, ni atentigas, ke S-ro Jung neas, ke la -ita -ata demando estas ĝustadire "problemo"; interkonsento estas ebla sur bazo de regulo de De Beaufront: "Oni uzu la participojn unuavice tempe (uzu -ata, se la ago estas plenumiĝanta rilate al la tempo, pri kiu temas; uzu -ita, se la ago plenumiĝis pli frue ol en la momento, pri kiu temas), sed ĝi permesas devii de la tempa uzado pro konsideroj de stilo ("se oni konsideras nur la plenumiĝintan faktan, la rezulton de la ago, kaj ne ĝian plenumiĝon, oni uzu -ita")".

La kompilo estas laeuble konforma al modesta lingvokono, en tio, ke la aŭtoro komencas sian pritrakton per klara prezento de la simplaj verbtempoj, poste profundigante en la pli komplikajn penspostulajn formojn de la kunmetitaj. Tamen, absorbo de la verkajo devigas simplajn homojn koncentrigi plenan atenton al la rezonado, tiel klara por ĝia aŭtoro. Legi ĝin ludante povos nur homoj kun nenormala apetito por la gramatiko ĝenerala kaj specife la esprimado de la tempelementoj.

En 1965 la Lingva Akademio voĉdonis pri la demando, kiel ĉiu aktiva E-isto jam scias; sed restas tio: ĉu tiu voĉdono tiros kunen la sin kontraŭantajn partiojn?

Kvankam korifeoj jam de kelka tempo amas primoki participajn frazojn de la kontraŭa partio, la E-a literaturo pro sia komuna komprenateco atestas pri malesto de efektiva problemoj; leginte centojn da recenzoj faritaj jam de 1905, ni ne rimarkis pikvortojn pri aŭtoro misuzo pasivparticipa. Kun inteligento, kaj klara dirvolo pri la tempelemento, E-istoj ja ordinare atingas sence senduban esprimon ĉe la participoj. Similan oni ne povas diri tiel same kategorie pri la modoj, kies ĝusta aplikado certe postulas tiujn kapablojn en granda grado. Ĉu ankau en tiu kampo ni fine faros frontojn unu kontraŭ la alia? ("Lingvo kaj Vivo": Waringhien, p. 206.)

Sennacieca Revuo, N-ro 94. Eld. SAT, 67 Av. Gambetta, Parizo 20.

57 paĝoj da priprensinda presajo, precipe allogaj por homoj de artisma kaj raciisma kulturemo.

S. Aarse, per ampleksa kritiko pri la komponisto Verdi, donas fundan enrigardon en lian vivon kaj verkon, kun rilataj flankrimarkoj pri Wagner kaj Werfel.

N. Bartelmes, defendante la Francan Revolucion, analizas ĝiajn sociajn kaj spiritaajn postefikojn sur la evoluo de l'istorio. Celante kreadi "racie pensantajn spiritojn", ankaŭ Lanti kun sia SAT "revenis al ĝiaj bazaj principoj". Spite al la reakcio de Bonaparte kaj liaj sekvintoj, la eksplodo de 1789 ankoraŭ multdis kaj inspiris la fortojn de l'progreso.

Lagrange, diskutante moralon sen metafiziko, strebas gvidi tra la penslabirinto de Nietzsche, Comte, Camus, Teilhard de Chardin. La subtila verkitan tezon taŭge taksos nur filozofie inklinaj legantoj.

Mijamoto Masao prezentas vortbildon de Lanti en Japanujo, menciante lian kritikon al Marksismo, al la Angla lingvo, kaj malfacilojn pro police minacata preso. Masao posedas skribaĵojn de Lanti; devas esti, ke ankoraŭ dise troviĝus multaj liaj leteroj, kiuj meritas publikigon. "Leteroj de Lanti" (1939) jam elĉerpiĝis.

En "Grajnoj de Vento" pedagogoj plurlandaj parolas favore al Esperanta instruado kiel akcesora al alilingva lerno, kaj alia utilado. Tiu atesto jetas lumon sur vigan aktivadon de tre signifa entrepreno ĉe la infanoj laŭ skalo internacia.

La Homaro en Universa Spaco temas pri fenomenoj de la senlima kosmo rigardataj de kosmomedicinisto Tokia.

M. Starr kontribuas atentotiran skizon pri nemulte konata socialisto Jozefo Ditsgen, kiu verkis kaj aktivis en Usono de 1849 ĝis morto en 1877. Skribo pri Urugvaja verkisto Lautreamont kaj lerte vortjonga petolaĵo de R. Schwartz: jen resumo de (reko) mendinda kajero.

Rimarko: Kial sennacieca organo indikas prezon per naciaj kurzaĉoj—la enigma 4.50 Fr. fr., 3.30 guld., 0.90 Us. dol.? Grekajo por ni. Petu ĉe W. Guelting, Sydney Esperanto Society, 143 Lawson St., Redfern.



**U.E.A. JARLIBRO, 1966**

Unua Parto. Estu ĝi enpoŝa aŭ manpreta ĉe vi, Esperantisto! Se ankoraŭ ne 22-jara, membro povas havi ĝin kontraŭ 20 steloj. Jam 22-jara, 40 steloj.

La listo de 1300 E-societoj en 39 landoj, kiu aperis en la Dua Parto 1965, estas havebla en 72-paĝa broŝuro (8 steloj). Tre utila por individuoj, grupoj kaj vojaĝantoj. Pro preseraro, p. 103, Aŭstralio havas nur 3 grupojn! Fakte, estas 13.

Nepre notu, ke por ŝpari spacon, la Generala Listo Alfabeto de la Libroservo ne aperas ĉi-jare; Vin turnu al la Unua Parto 1965, por facila konsulto libroelekta.

Detalojn donas la ĉefdel., K. Linton, 11 Poplar St., Caulfield, Vic.

**Dua Parto:** Pro saĝa decido de la Estraro, ĝi estas malpli ampleksa ol kutime, pro grava defecito. Grandega laboro plenumita kostis multan elspezon; novaj membroj fortigus la financon. Aniĝu al la U.E.A., tiel igante vin batalpreta E-isto, taŭge armita por defendi nian aferon kaj akiri novajn poziciojn. Nur membroj rajtas uzi la valorajn rimedojn de la U.E.A., unikajn en ilia speco.

Jen informriĉa suplemento al la Unua Parto, kun plena raportoj pri spezoj, edukado, literaturo, membro-nombro (31,927 en 85 landoj) kaj ĉiu agadkampo.

**"GVIDLIBRO DE AMO"**

La subita apero de tiu ĉi libro sur nia merkato faris malpli da ondoj ol la eldonistoj esperis. Sajnas, ke ankaŭ ni evoluis. Tiurilataj artikoloj kaj recenzoj nenie estis sufiĉe indignaj por interrompi la monotonan fluan de l'rutinaj ĉefrubrikoj en nia gazetaro. . . . Nekredebla estas la nombro de sesdekjaruloj inter ni, kiuj ĉiukvinjare havas kvin jarojn pli!—R. Schwartz, en Sennacieca Revuo, 1966.

**ANEKDOTO**

Sinjoro skribis leteron en hotelo. Alia gasto malmodeste direktis la okulojn sur la paperon. La sinjoro malvarme rimarkis tion kaj daŭre faris sian leteron, skribante plu: "Mi finas mian leteron, ĉar ĝenananta junulaĉo senhonte vide-sekvas mian skribadon".

**TRADUKA KURSO**

Kolektivo por tiuj celantaj fariĝi fidindaj kaj bonstilaj tradukantoj, tiel pretigante sin por impresa korespondado aŭ, eventuale, preciza plenumado de gravaj publikaj taskoj. Ĝi proponas helpojn al homoj, kiuj jam povas skribi korektan Esperanton kaj vere volas familiariĝi kun lingvaĵoj propraj al la progresinta studado.

La gvidanto koncize aŭ detale respondas ĉiajn demandojn, kiujn metas la membroj. En ĉiu monato ili tradukas nelongan Anglan tekston, kiun tradukas ankaŭ la gvidanto. Lia traduko, kune kun notoj, estas sendata al ĉiu membro akompane al ties kontrole komentita provajo.

La jarkotizo (12 numeroj) estas nur formala—1 dol. 50—por kovri koston de produkto.

Petu folion informan de la redaktoro.

**STAT-RAPORTOJ**

Lasu spacon inter tajpitaj linioj, ĉar ĉe dense skribitaj tekstoj estas malfacile rimarki supersignojn. Ĉiu E-isto devus jam scii la mallongigojn en listo de la Jarlibro (UEA); uzu ilin racie kaj—korekte. Ekzemple: S-ro, S-ino (ne S-ro, S-rino), s-ano (ne sam-o). Antaŭ forsendo al la sekretario, bv. zorge kontrolu la tekston, lasante nenion priduban por la presisto.

**ISRAELO, IZRAELO  
AŬ IZRAELIO?**

Zamenhof uzis "Izraelo" en la Biblia traduko. Waringhien donas ĝin por la Biblia kaj "Izraelio" por la nuna ŝtato. Albault donas nur "Izraelio" (ŝtato).

U.E.A. en sia gazeto kaj Jarlibro (p. 37, 1965) donas "Esp. Ligo en Israelo" kaj (p. 355) "Israelo".

Butin/Sommer kaj Wingen en siaj vortaroj kontraŭas unu la alian. Ĉu ne bone: Izraelo por la Biblia lando, kaj Israelo por la nuna ŝtato?

Kiun formon volas la landanoj mem? La demando postulas solvon.

**NOTE!**

We intend to speed up issue of this paper from now on. Owing to a misunderstanding, copy was held up. We shall get out six for 1966, and certainly eight for 1967.—Editor.

**"PLENA GRAMATIKO"**

Estas ĉagrena la limakeca kompletigo de la Tria Eldono de la P.G. El la tri kajeroj, la unua eldoniĝis en 1958; la dua en 1964—ses jarojn poste! La tria, kaj fina, ankoraŭ ne aperis. Ĝi devos enhavi ankaŭ detalan indokson, sen kiu la verko estas preskaŭ tute senutila, pro ega malfacilo trovi lokojn de tiu kaj alia lingva punkto.

Se la tria ne baldaŭ aperos, ne malmultaj posedantoj de la jam eldonitaj kajeroj estos pro aĝo profunda en stato de encefalomacio (cerbomoliĝo), do mensa kadukiĝo. Koncernatoj, bonvolu levu la piedojn kaj ekmarŝu!

**VERDA AŬ NIGRA STELO?**

Al la Redaktoro:—Mi sugestas al la A.E.A. (1) forigon de la NIGRA STELO de la frontpaĝo de "The Australian Esperantist"; aŭ (2) ke la stelo aperu verdinke. Miaj kialoj por la sugesto: (1) verda, ne nigra, 5-pinta stelo estas la internacia insigno de nia movado; (2) la koloro de morto estas nigra—nia movado kaj lingvo vivadas. — Wm. H. King, F.N.Z.E.A., Whangarei, N.Z.

**Old Esperanto books and reviews:** List from Roger Iserentant, Kerklaan 61, Bruges, Belgium. Another dealer on page 122 The A.E.

"PACO", monata organo de Mondpaca E-ista Movado, traktas pri la nuna mondpolitiko kaj E-literaturo. Tribuno por voĉoj rifuzitaj de la granda gazetaro. Unu dolaro ĉe J. Davidson, Box 139, Penrith, N.S.W.

**INTIMA KUTIMO**

Scivola leganto de Germana E-Revuo rimarkas, ke sur p. 67 de "Hispanio por Vi" oni estas informita, ke en tiu lando oni salutas per mampremo. Sur 58: "nurduloj mampremos vin". Li demandas: kio estas nurdulo? Supozinde Hispana nordulo, sed ĉu eble "nudulo", kio pli kongruas kun "mampremo"?

**"TABLE MODEL"?**

Pri skribmaŝino, kiel traduki tion? Proponitaj estas (1) neportebla; (2) portabla; (3) oficeja skribmaŝino.

Nu, "neportebla" pensigas, ke ĝi estas ekster eblo ĝin porti; ekzemple pro ĝia fikseco per boltoj.

"Portabla" aplikigas ankaŭ al portebaj skribmaŝinoj, ĉar ordinare tablo aŭ simila subtenas ilin pro oportuno.

"Oficeja", aŭ "lokstara", ŝajnas klarsignifa. "Modelo" estus erare uzita en tiu priskribo. Modelo estas aĵo kopie imitinda aŭ persono pozista. "Speco" (A. kind, sort) estas taŭga vorto por "model" en tiu senco.

**CITINDAĴOJ**

"Lau mia sperto, la Malaja estas la plej facila lingvo kaj la Rusa la plej malfacila".—Prof-o Griffith Taylor, en Sydney Morning Herald.

**Canberra:** "Prononcu ĝin kun akcento sur la unua silabo". — Lady Denman, en 1913.

**Klasika verko:** libro, kiun oni intencas legi iam estonte.

"Progreso nur indikas movon en ia direkto—povas esti direkto al ĉielo aŭ infero".—G. K. Chesterton.

"Kiel vi vivas?" iu demandis malriĉan laborulon.

"Mi iras al laboro por gajni monon por aĉeti manĝon por havi forton por iri al laboro por gajni monon por aĉeti manĝon por havi forton por iri laboron..."

"Via respondo estas tre teda!"

"Ankaŭ teda estas mia vivo", sopiris la demandito.

La plej feliĉajn tagojn de mia vivpilgrimo Pasigis mi en brakoj de alies edzino... Mia Patrino.

"Ni (la negroj) estas efektive en karceroj, negrave ĉu ni estas en strato, ĉu malantaŭ kradfenestro de malliberujo". (Atestanto antaŭ Usonaj senatanoj).—"Age", 24/9.

**KORESPONDADO**

Nejko M. Nejkov, str. Ivan Vladnov 21, ur. Drenovo, Bulgaria. Volas ge-korespondantojn.

Nepe respondas: S-ro Crancau Ioan, Cartierul Sasar Bloc 10, Sc. D. Ap. 75, Etaj III, Baie-Mare, Rumania.

Pri insektoj, precipe skaraboj, naturisto O. Marek, Zamberk 797, Czechoslovakia, petas kor.

Deziras kor. S-ino Nikolinka En. Fičeva, str. Car Osvobodilea N-ro 14, Byala, Bulgaria.

S-ro Ivars Barševski, St. Lielvarde, K. Uzvara 3, Latvia, 24-jara, pri lingvoproblemoj k.a.

Deziras korespondadon S-ro Everks, Barakova u. 250, Miletin, okres Jičín, Czechoslovakia.

Deziras interŝanĝi BK kaj PM kun INO Aŭstralia, S-ro Manuel Montes, C/Clot 113, pral la, Barcelona, Spain.

### BIG DICTIONARIES

The E-ists of Iceland, a tiny nation of some 200,000 people, have published an Icelandic-Esp. dictionary of 20,000 - 25,000 words. One day perhaps we may see the first (United States) English-Esp. dictionary compiled and printed in that vast and wealthy continent.

Mijake Shihej wrote in 1952 that the Japanese-Esp. dictionary has 60,000 words; the Fr.-Esp. de War-ington some 13,000 (according to S.A.T.-Amikaro, Feb., 1958); Plena Vortaro 6,900, plus 969 in the Supplement.

No figures are given for the entries in Millege or Rhodes. It took Rhodes six years to compile his dictionary, which he began only 15 months after his "first acquaintance with Esperanto". It appeared in 1908 with 547 pages, its only edition. The introduction by its English pioneer still makes good reading.

### ZAMENHOF KAJ LA ANGLA

12/11/07.

Tre estimata Sinjoro!

Responde al Via letero de 21a de Februaro mi sciigas Vin, ke la lingvon anglan mi posedas tre malbone kaj tial mi ne kuraĝas fari publikajn tradukojn el tiu ĉi lingvo, pro timo, ke mi eble faros eraron. Libere traduki mi povas nur el la lingvoj rusa, pola, germana aŭ franca. El lingvo angla mi povas traduki nur en tia okazo, se mi havas ankaŭ la tekston de la tradukota artikolo ankaŭ en alia lingvo, por ke mi povu kompari kaj gardi min de eraroj.

Via L. Zamenhof.

(La originalon gardas F. Azorin en Meksiko. Cite laŭ "Heroldo de E." 16/6/66.)

### ORIENTAJ ANTAŬURBOJ:—La

klubo kunvenis (15/6) ĉe la hejmo de Ges-roj Milligan por aŭdi S-ron King de Nov-Zelando paroli pri siaj mondvojaĝoj. Ni tiel interesiĝis pri lia parolado, ke ne okazis la societa parto de la vespero, kiun S-ro Milligan organizis.

La klubo prezentis (22/6) al Ges-roj Milligan por-veturaran lankovrilon, kiel signon de la estimo de la anoj, antaŭ ol ili foriros por trimonata vojaĝo en Aŭstralio. Dum la ferio de Ges-roj Milligan, kiuj instruas la du klasojn de la klubo, la anoj daŭrigos la klasojn per siaj propraj penoj.

### HALTU, HOMOJ!

Kosmonaŭtoj parolas pri intense danĝera radiado en la fora spaco. La homoj nun praktike lernas pri la tialo kaj tielo esencaj en la eterna arango kaj priordono de la Kosmo. La antikvuloj konis pri tio. "Vi difinis lian limon, kiun li ne transpasos" (Ijob 14/5), kaj poste Paŭlo instruis: "Li difinis la limojn de iliaj loĝejoj" (Agoj 17/26). Alivorte, ĉi-flanke de la zono radiada. Ĉu sufiĉe klara?

La homo estas nature, laŭorigine terula, farita el polvo. Sur la tero li restu, kaj forigu ĝiajn multajn mankojn.

### SENSENCA!

"Oni povas sin demandi" estas senseca, ĉar, aŭ oni scias la respon- don, aŭ oni ne scias, kaj ĉiufoje la demando estas superflua.—Raymond Schwartz, en Sennacieca Revuo.

### BOHUSLAN

Einar Dahl, senatano de la Sveda parlamento kaj senlaca aktivisto por Esperanto, sukcesis post multa penado persvadi la Turisman Trafik- asocion de Gotenburgo eldoni prospekton en Esperanto pri la feriantado Bohuslan, marborde de Svedujo. La eldono kostis 5000 Sv. kr., krom la senpaga traduklaboro de S-ro Dahl. Per amasa mendo senkosta, montru ke ne vanis la elspezo por ĉi bele informiĉa prezentaĵo. Adresu: Goteborgs och Bohus Lans Turisttrafik- forbund, Drottningtorget, Goteborg, Sweden.

**STELKURZO**

Laŭ la Jarlibro-UEA stelo estas 0.07 (0.007?) Australia dolaro; 0.25 Ned. guld.; 0.35 Fr. fr.: 0.075 Us. dol. Nun penu trovi la ekvivalenton en Aŭstralia mono de: 3.30 Ned. guld., 4.75 Fr. fr., 0.85 Us. dol. Sufiĉe simpla?

**LA SCIENCO PRUVIS**, ke grand-skale ekzistas sistemo kaj plano en la vivo. Ĉu do povas esti, ke ĉio en la vivo funkcias laŭ certa sistemo? Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus Instituto, Mariendalsvej 94-96, Copenhagen F., Denmark.

**Ŝlosiloj** (E-keys) kostas de 3 p. ĝis 12 p. depende de la lingvo, laŭ BEA librolisto 1963. Uzu ilin kiel pagilojn aŭ donacetojn ĉe alilandanoj.

**PLEASE TRANSLATE!****Carlyle's Father.**

"In anger he had no need of oaths; his words were like sharp arrows that smote into the very heart. The fault was that he exaggerated (which tendency I have inherited), yet only in description and chiefly for the sake of humorous effect. He was a man of rigid, even scrupulous veracity. I have even heard him turn back when he thought his strong words were misleading, and correct them into mensurative accuracy."

—Thomas Carlyle.

(Translation will appear in next number.)

**LATIN AND ENGLISH**

"Had the English never been acquainted with Greek or Latin they would never have thought of one half of the definitions and rules which make up their English grammar."

—Noah Webster, 1789.

"The habits of an inflected language are not necessarily good habits in a largely uninflected one."—"Words and Their Uses": R. G. White, 1886, p.24, quoted by Prof. R. Quirk, London Univ., in "The Uses of English".

**ESPERANTO**

Grammar: Simpler than English.

Word-building: Easier than German.

Pronunciation: Easier and more euphonious than French.

Vocal purity: Equal to Italian.

Accent: As regular as Polish.

With perfectly phonetic orthography, agglutinative character and logical construction, Esperanto is the ideal linguistic medium.

**LA JUNULECO**

Ho, se revenus temp' de l'junecfloro!  
Konsistis tiam viv' el sunaj horoj.  
Kaj kion sciis koro pri doloro  
Forviŝis tion nur mallongaj ploroj.

**THE A.E.**

From January 16 copy will be sent to the printer at approx. six-weekly intervals. State reports currently to hand will be assured appearance by their prompt forwarding to the Secretary or the Editor. Copy for the first number in 1967 goes to press on February 28.

As announced in the number of December 1964, the copy for this issue was sent to the printer a day or so after September 15. On October 3 the Editor received a quantity of interesting club material, which, however, it was highly inopportune to include currently, as the measure of text had been taken and composed in press. The content had thus been made up, and any modification of space exigency would have embarrassed all concerned and hindered prompt appearance of the number.

Henceforth then, all copy will be sent to printer as scheduled in the above number. Should any representative so desire, they may send their reports direct to the Editor, who on receiving them will be relieved of any feeling that such may, through pressures in other quarters, run some risk of due appearance.

—F.R.B.

**LETTERS ABROAD**

It seems that some, forwarding to us addresses for overseas correspondents, have trouble in copying those given them. Faultily deciphered addresses mean disappointment through non-delivery of replies. Please be careful; in doubt, don't use.

Esperanto land names on letters posted to foreign countries are neither advisable nor necessary. Use the English forms.

# The Australian Esperantist



## *La Aŭstralia Esperantisto*

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: \$A1.50 (aŭ 24 respondkuponoj).

Anoncoj: Kvar linioj: \$A.1.00.

---

Redaktoro: F. R. BANHAM, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, N22, Victoria.  
Address of A.E.A.: Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.  
Treasurer: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.  
A.E.A. Press Officer: Noel Gamble, 11 Lamington Street, Deakin, A.C.T.

---

N-ro 55 (135)

MELBURNO

Okt. - Dec., 1966

---

### AN INTERNATIONAL LANGUAGE

#### A BRIEF SURVEY OF THE SITUATION

What are the advantages that Esperanto has over the national dialects that struggle for survival in our schools? There are many. For example, it combines the functional advantages of the most advanced European languages with a classical simplicity of structure. Instead of a hotch-potch of irregularities, illogicalities and complexities, resulting from centuries of makeshift adjustments to new needs (characteristic of all national languages) Esperanto is simple, and direct and modern.

It is a language not only for the few highly intelligent but also for the many, the ordinary folk of the world. It can be learned in one-tenth of the time it takes to master a language such as French or German.

Since it is international, it is free from the associations of jealousy, suspicion and hatreds bred in history. Unlike the national languages it is offensive to none.

It is the most cultural of all languages, since it forms the best basis for language study, and for progress to more difficult languages, should they be needed by any individual or group.

The advantages for those who wish to trade with other countries, or travel there, or communicate in any way with human beings in any part of the world, are so obvious that they need no elaboration.

For the incredulous, it may be as well to explain something of the structure of the language.

There are three underlying principles immediately obvious to the student of Esperanto. In the first place, it is completely phonetic, with a latin-script alphabet of 30 letters. The few extra letters are necessary to differentiate between the sounds sometimes telescoped into the same letters in other languages. For example, the "g" as in "gate" is written just as we write it. But the "g" as in "age" carries an accent such as "ĝ" to indicate this different use. The alphabet can be learned in a few minutes. From then on, the student can spell any Esperanto word and pronounce any Esperanto word with the complete assurance that he is correct, and without any further study on this aspect of language.

Secondly, unnecessary grammar such as the ridiculous gender forms in French, German, Latin and many other languages has been pruned away, and the necessary grammar remaining has been made regular, without exceptions. An interesting example of this can be seen in the verb forms. Instead of a multiplicity of conjunctions and verb endings, the simple tenses in Esperanto have been reduced to four or five endings. All infinitives end in "i", such as esti, lerni, havi, doni; the only ending for any present tense is "as", as in estas, lernas, havas, donas, and similarly we have "is" for the past, as in estis, lernis, havis, donis and "os" for the future as in estos, lernos, havos, donos.

The third principle is an ingeniously simple method of word building, so that from a comparatively small vocabulary a wealth of words can be developed. Here is one example, where thirty others might be given. In most languages when we learn the name of the masculine individual of any species, we have to learn an entirely different word for the counterpart feminine. Opposite the masculine words of "boy, father, king, bull, or ram" we have the feminines, "girl, mother, queen, cow or ewe", all entirely different words. In Esperanto, all nouns end in "o", and the feminine words given above, would be the same as the masculine except for the insertion of the syllable "in" before the "o". So in the five masculine words given would be translated in Esperanto as knabo, patro, reĝo, bovo, and ŝafo, and the feminine counterparts would be knabino, patrino, reĝino, bovino, and ŝafino.

Many people are under the impression that Esperanto is still in the formative stage or at least in the experimental stage. This is quite incorrect; it is well and firmly established. It is used in every country in the world; it is taught in a growing number of schools in the world; there are Chairs of Esperanto in some universities; there are large libraries of Esperanto books both original and translations; and papers, periodicals, trade advertisements, and radio sessions in Esperanto throughout the world. Perhaps we English are more insular than any other people, and know less than any other people what is going on outside our borders. In the smaller countries such as Holland, Sweden, Finland, there is much greater awareness of the value and the necessity of the language Esperanto.

Can anyone give valid reason why Esperanto is not taught in the schools of Australia?—I. T. MADDERN.

### 16th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

As already announced the next Congress will be held in Manly, N.S.W., from 1-7 January, 1968, and the local congress committee has been making preparations for some time. The chief officers are: President, Kevin Smith; Secretary, Mrs. B. Cleminson; Treasurer, Miss A. Dennys; Organiser, C. C. Goldsmith, 96 Woodland Street, Balgowlah, Sydney, N.S.W., with many helpers to deal with sectional work.

We wish to make this a record Congress so as to give an impetus to the movement here, but this will be accomplished only if a large number join the congress, and as many as possible actually attend.

**Accommodation:** Manly is one of the most popular seaside resorts in Australia, and much of the accommodation is booked up more than a year ahead. The Congress headquarters will be the Manly Hotel, a beautiful hotel right on the sea-front, and all functions will take place there.

The management are letting us have their Corroboree Room free of charge for the week, and this is equipped with an adequate sound system, and facilities for projection, movie or still. In return they expect some of our

congress members to stay in the hotel and are reserving some rooms for us, but only until Easter at latest. They also want as many as practicable (even of those accommodated elsewhere) to use their restaurant and/or bar from time to time. In view of their generous treatment, which will help the finances of A.E.A., we hope that all congress members will remember this.

A Congress enrolment form is with this issue. You can help the Committee and yourself by completing this and sending it now.—C.C.G.

### FEDERACIO NASKIGIS

Je la 22-a le Oktobro okazis en Manly kunveno de Esperantistoj en Nova Sudkimrujo por diskuti la eblecon starigi Federacion en tiu ŝtato. Prezidis S-ino B. Cleminson, la provizora prezidanto.

S-ro Goldsmith, kiu havas multan sperton pri federacioj en Britujo kaj aliaj landoj, klarigis ke ili laboras por plivigli la movadon en la koncerna regiono pere de konferencoj kaj la eldono de bultenoj kiuj donas informon pri loka agado kaj planoj. Krome tiuj lokaj organizaĵoj povas ofte pli efike kontakti lokajn aŭtoritatojn ol landa organizaĵo aŭ urba klubo. Iom vigla diskuto sekvis kaj



poste oni unuanime decidis favore al la starigo de Esperanto-Federacio de Nova Sudkimrujo. Estas interese scii, ke Esperantistoj en A.C.T. volas ankaŭ aliĝi al tiu federacio.

Oni elektis la jenajn oficistojn: Prezidanto: S-ro V. J. Timmins (Hornsby); Vic-Prezidanto: S-ro A. W. Chandler (Sydney); Sekretario: S-ro C. C. Goldsmith, 96 Woodland Street, Balgowlah (kiu indikis ke li akceptas la oficon nur por la unua jaro); Kont-kontrolisto: Skabeno F. Preacher, J.P. (Manly).

Oni faris decidojn pri Regularo, kotizoj, la eldono kaj distribuo de bultenoj, kaj aranĝoj pri estontaj konferencoj. La venonta konferenco okazos ĉe la klubejo de la Sydney Esperanto-Societo, 143 Lawson Street, Redfern, je la 4a de Februaro 1967 je 3 pm.

Poste sekvis multe da vigla babilado kaj bonega posttagmeza teo aranĝita de la virinoj de la klubo en Manly, al kiuj oni akrame voĉdonis dankon. Resume, la kunveno estis pli sukcesa ol oni atendis.—C.C.G.

### PRI NIA GAZETO

Jen estas la datoj en kiuj la redaktoro sendos al la presejo materialon por la ok numeroj de 1967.

Jan. 21; Mar. 4; Apr. 15; Majo 27; Julio 8; Aug. 19; Sept. 30; Nov. 11.

Tio anstataŭigas la datojn en The A.E. 12/64.

### KORESPONDADO

**Ĉeĥoslovakio:** Jaroslav Modzek, Praha 6-Dejvice, Gensovska 14. P.k. bildaj kaj leteroj.

**Japanujo:** 23-jara oficistino dez. kor. kun Australian(in)o. Junku Furukawa, 4-2 3-7 Akatsutsumi, Setagaja, Tokio.

### NEKROLOGO

Ni bedaŭras raporti ke mortis S-ano **Steve BENNETT** malnova fervora Esperantisto, la 27-an de Oktobro, post longa malsano.

Li estis Esperantisto dum multaj jaroj, en la Melburna E-Klubo kaj poste en la Sydney E-Societo, kies Prezidanto li estis de 1948 ĝis 1952.

Ĉe lia cindriĝo, la 29-an de Oktobro, S-ro W. Chandler faris prelegeton en Esperanto.

### AŬSTRALIA ĈAMBRO


La estraro dankas por la bonega respondo al la alvoko por donacoj al la fonduso por la Aŭstralia Cambro ĉe U.E.A. Restas nur \$183.12 kolektota. Estus tre ĝojige, se ni povus tiun celon atingi antaŭ la limdato je la fino de ĉi tiu jaro.

La Progreso de la kolektado por la Aŭstralia Cambro ĉe U.E.A.

Laŭ la lasta anonco	\$970.68
Banka interezo	2.30
A. B. Sedgley	1.10
Hobart Esperanto Group	20.00
D. McQueen	2.00
E. E. Thompson	10.00
V. Cox	5.00
A. Fridenbergs	5.30
C. M. Smith	2.00
L. C. Willis	10.00
C. Ramsay	2.00
J. N. Prewett	2.50
M. F. Fordham	2.00
T. F. Donnelly	1.00
N. A. Collier	2.00
E. Amman	1.00
I. Slavoff	4.00
G. E. Browne	6.00
R. W. Olson	4.00
V. J. Timmins	10.00
A. Einilovici	4.00

Sumo	1066.88
Ankoraŭ kolektota	183.12

La celo	\$1250.00
---------	-----------



## Australia Kroniko

**MELBOURNE:** Spite de la famekonata malvarma kaj pluvema Melburna vetero, nia Societo regule kunvenis ĉiulunde por instruado (7-a ĝis 9-a horo) kaj varia prelegprogramo (9-a ĝis la 10-a). Kiel bazon por plua studado pri la E-studo. Fay Koppel prezentis (20/6) "33 Rakontoj"-n, kaj citis faktojn kaj opiniojn pri la enhavo kaj la verkistoj. 49 membroj kaj amikoj ĉeestis nian ĉi-jaran "Amerikan Teon" (27/6). Post vigla marĉandado, kelkaj loterioj kaj abunda vespermanĝo la kasisto povis anonci ke la rezulto de la vespero estis \$69.70, kiun sumon ni entute uzos por aĉeti novajn librojn por nia biblioteko.

Iom strange sonis la titolo "Ci tiu estas Meharry" (11/7), kiam S-ro M. Cohen fiere prezentis rakonton pri la grava rolo kiun ludis kelkaj liaj praconkloj en la starigo de "Meharry Medicina Kolegio" por negroj en Nashville, Tennessee, Usono. Meharry estis la nomo de la skotaj prapatroj de lia avino.

Ne nur Perto havas mondvojaĝantojn, sed ankaŭ ni posedas kelkajn. Unu el ili, S-ro E. Thompson, montris belajn diapozitivojn pri Singaporo, Bangkok, Tokyo kaj Hawaii. Tiun prelegon li daŭrigis (29/8). S-ro Ken Linton, per lumbildaj ilustraĵoj donis valoran helpon (1/8), prelegante pri la poezia metriko. S-ro H. Koppel raportis pri la SAT-kongreso en Anglujo, laŭ letero ricevita de alia mondvojaĝanto, S-ino Ali Leereveld. Sekvis sonbendo pri la Zamenhof-Festo en Rotterdam, kies ĉefparolanto estis nia ambasadoro en Belgujo, S-ro Ralph Harry (8/8).

Daŭrigante la temon "Poezia Tekniko," S-ino F. Koppel skizis (15/8) la ĝeneralan formon kaj enhavon de poemo de Julio Baghy "Meng Ciang kaj Van", kiun ŝi prezentis kiel belan medion por esplorado pri la poetaj artaĵoj. (Laŭ listo de D-ro C. Caldera). Bonvenaj gastoj ĉe nia kunveno de la (22/8) estis Ges-roj John Moore el Rockhampton. S-ro Beechey legis el la Ĉeĥoslovaka Antologio kaj ni aŭdis aerpoŝtan raporton de Helen Prent (Londono) pri la S.A.T.-kongreso, kiun ŝi kunhelpis organizi. Sub la sperta gvidado de S-ro Ken Linton

ni daŭrigis la studojn pri la diversaj metrikaj sistemoj troveblaj en mozaika poemo "Meng Ciang kaj Van" de Julio Baghy.

Bonvenaj vizitantoj ĉe nia kunveno 26/9 estis Ges-roj G. Cooper el Hobarto. Nia multtalenta Joan Andrews per du artoplenaj kombinoj de kolorkliŝoj kun magnetofonaj komentarioj propravoĉaj kaj fona muziko ravis la ĉeestantaron kaj konigis faktojn pri Melburno kaj Kanbero.

En la junia kunveno de la RENDEVUO S-ro Banham instruis nin pri gravaj literaturistoj, ĉifoje per komparo de Kabe kun Waringhien. Li krome gajigis nin per kelkaj tradukitaj rakontoj. En julio, S-ro A. Fridenbergs malkovris al ni el la juvela arkivo de S-ro Drummond kolorriĉajn facetojn pri la pionira Esperantista vivo en Aŭstralio. Inter aliaj li informis pri la grava laboro de J. G. Pyke kaj Maurice Hyde kaj la rolon luditan de aliaj rilate la planadon de Kanbero.

En aŭgusto S-ro Marcel Leereveld prelegis pri novaj instrumentodoj kaj montris unu el la maŝinoj uzataj por komplementi la laboron instruistan.

La septembra "Rendevuo" havis gastparolanton el alia ŝtato. S-ino Hilda Cooper el Hobarto parolis pri la belaj pejzaĝoj kaj pitoreske lokitaj urboj de Tasmanio kaj ilustris sian prelegon per kolorbildo.

**CANBERRA:** D-ro J. Scolnik el Cordoba, Argentino vizitis nin (5/5). Speciala kunveno por saluti lin okazis en la hejmo de Ges-roj H. Torr. Multaj membroj ĉeestis kaj ni ĉiuj ĝuis la rakontojn de D-ro Scolnik pri siaj vojaĝoj tra la mondo kaj pri lia hejmlando Argentino. Je 14-a Julio ni adiaŭis nian kasistinon S-inon J. Le Roux, kiu reiras al Anglujo kun sia familio post kelkjara restado en Aŭstralio. Nia klubo nun kunvenas nur je la 2-a jaŭdo en ĉiu monato.

S-ro John Moore el Rockhampton estis nia bonvena gasto (31/8). Kun intereso ni aŭskultis al S-ro Moore pri liaj vojaĝoj kaj pri la Rockhampton E-Klubo.—Barbara Ames.

**HORNSBY, N.S.W.:** S-ino Olsen provizis en Junio interesan vesperon. Ŝi rakontis, kun belaj lumbildoj, pri sia vojaĝo tra Azio.

En julio ni aŭskultis pere de S-ro Ian Ross per magnetofono parolad-

ojn dum Zamenhof-Festo en Rotterdam. Poste ni registris sur sonbendo teatraĵeton luditan de kvin lernantoj. Ĉiuj tre ĝuis aŭdi siajn voĉojn re-luditajn.—V. J. Timmins.

**PERTH:** Niaj gratuloj iras al nia komitatano Norman Brodie, kiu edziĝis al Anne Williams el Sidnejo je la fino de Junio. S-ano Brodie konatiĝis kun vidvino Anne Williams dum pasintjara mondvojaĝo. Okaze de nia kunveno (11/7) F-ino O. Strem-pel transdonis bondezirojn nome de nia Ligo.

Samvespere, membroj alportis dia-pozitivajn pri Perth. El la 80 bildoj montritaj ni nun elektas la plej bonajn por sendi al A.E.A. Prezidanto S-ro I. Maddern, kiu intencas sendi seriojn da bildoj pri Aŭstraliaj urboj al transmaraj E-kluboj. S-ro W. Illingworth faris interesan prelegon (25/7), kiam li montris 200 lumbildojn pri sia vojaĝo hejmen de Sud-Ameriko tra Suda Afriko. Dum sia vojaĝo S-ro Illingworth renkontis multajn E-istojn. Tre gajan vesperon provizis S-ro Jack Finch (8/8), kiam li estris amuzigan ludvesperon. Spite de tre malvarma vespero ĉiuj ĉeestantoj konsentis ke la vizito al tiel gaja vespero vere meritis la penon.

Je 12-a de Sept. S-ino W. Bowers prelegis pri sia vojaĝo al Eŭropo dum la pasinta jaro. Ni vidis elstare belajn diapozitivajn pri Singaporo Anglujo, Parizo kaj Svislando. Dimanĉe (16/10) klubanoj sekvis inviton de Ges-roj C. Dean al sia hejmo. Vizitantoj alportis diskojn, kiujn S-ro Dean vice metis sur sian gramafonon. Sekvis posttagmeza teo kun abundo de bongustajoj. Fine nia kasisto, por plifortigi la kason de nia Ligo, elĉerpis la lastajn monerojn de la ĉeestantoj!

**ROCKHAMPTON:** En la monato Julio ni bonvenigis S-ron Schwerin kaj lian edzinon (el Sidnejo), S-ro Schwerin montris al ni la Cseh-metodon kaj nia klubo tiunokte ricevis preskaŭ cent vizitantojn. Nia tagjurnalo "Morning Bulletin" (14/7) detale raportis pri la proklacione de S-ro Schwerin kaj komentis ke "ekzistas nenia dubo ke la Cseh-metodo havas estontecon en moderna instruado de lingvoj."

Nia prezidanto, S-ro Russell, kaj lia edzino en Junio ankaŭ ricevis vizitanton, sed daŭran vizitanton. Ili havas nun fileton. Gratulojn!—John Moore.

### ALVOKO DE LA U.E.A.

Al tiuj, kiuj ne estas individuaj membroj de UEA.

Karaj gesinjoroj!

Estante membro de landa E-organizaĵo aliĝinta al UEA, vi estas membro de UEA. Tio signifas, ke vi apartenas kaj subtenas la mondan E-movadon. Pro tiu via membreco vi havas la rajton uzi la servojn de la delegitoj de UEA. Vi povas skribe peti informojn el iu ajn eksterlanda urbo, kaj la delegito tie estas devigata respondi al vi. Ankaŭ en eksterlando vi povas peti informojn de delegito, kaj tiu volonte donas ilin.

Sed por uzi servojn de delegito vi devas pruntepreni jarlibron de UEA de iu individua membro de UEA, ĉar vi, kiu nur pere de la landa organizaĵo estas membro de UEA, ne havas tiun jarlibron kun nomoj kaj adresoj de delegitoj.

En "The A.E." vi certe povas legi iom pri la internacia E-movado diversagrada, sed via landa gazeto kompreneble nur parte povas enhavi tian informon. Se vi vere deziras eluzi la eblecojn, kiujn vi kiel E-isto havas, necesas, ke vi abonu la revuon "Esperanto" kaj havu la Jarlibron de UEA. Tio signifas, ke vi devas fariĝi

### Membro-Abonanto de UEA.

La kotizo por MA estas 5.20. Sendu al S-ro K. Linton, ĉefdel.

Preso de ekzemple 1000 pliaj jarlibroj kaj 1000 pliaj ekzempleroj de la revuo ne multe plialtigos la elspezojn de UEA; kaj tiu tiomo pli da individuaj membroj (MA) povas solvi la financajn problemojn.—E. J. Woessink, estrarano pri financoj de UEA.

### KOMO?

Ester 3/7, 9/24: "tio estas loton". Estas klare; ke Zamenhof ne sciis pri la Angla kutimo, meti komon post "estas" (= that is to say, a lot; namely, a lot). La komo signifas paŭzon.

Levidoj 23/3; Eliro 31/15: "la sepan tagon estas sabato de ripozo". Komparu: Lev. 25/4: ". . . en la sepa jaro estu sabato".

## Recenzoj

**Raciaj Derivo kaj Verbuzo:** Emilo Gasse. Ĉe Heroldo de E. St. 2.20.

S-ro Gasse pledas por "racia derivivo", li malfermas la pordon al reformelementoj, kiuj, se imitataj, grave skuus la lingvon. En sia 8-paĝa broŝureto li metas proponojn kontraŭ kiuj staras la aŭtoritato de dekoj da fundaj analizistoj gramatikaj: Zamenhof, Lippmann, Gohl, Wuester, de Saussure, se nomi kvinon.

En 1910 aperis "Studo pri la Derivado de la I.L." (L. Couturat), kiu detale pritraktis multon, kiun nun prezentas Gasse. La tiutempaj E-istoj ne sin lasis devojiĝi pro tiu kritiko al ilia lingva strukturo. Ne impresas la diro de Gasse, ke "ni tiam vivis en plena pereiga reformemo". Lingva konformeco, komuna uzado estas en nia tempo tiel same grava kiel tiam; liaj proponataj ŝanĝoj en nia vortfara sistemo kondukus nin al perejo, se ilin aŭ similajn ne dekretus ĝenerale akceptita aŭtoritato.

Kun kelko lia oni povas konsenti, tamen certe ne estas praktike, uzi "armo, hako, sego, k.s. kiel "substantivajn radikojn" por iloj; nek "masono, makleroj, fanfarono" por homaj individuoj. (Ĉe adjektivaj radikoj li havas: bonulo, avarulo, sanulo, laŭ komuna uzo.)

Car la radikoj estas verbaj, li, kun ia rajto, volas limigi "skribo, konstruo, kolekto, traduko" k.s. al la agoj, kaj uzi -aj ĉe konkretaj objektoj. Tamen multjara uzado konfirmis la praktikon, ke sufiĉas la pli netaj formoj ankaŭ por objektoj (La Sankta Skribo, la Zamenhofa traduko, la plena kolekto...). Cetere la Plena Vortaro donas "manĝ(aj)o", sed ne "trink(aj)o".

Verdire li atentigas pri aferetoj forte pripensindaj. Prave li montras al mankoj al ideala, konsekveneca kaj simetria vortformado. Pri la internacieco de radikoj li atentigas, ke "recenso, censuro, rekompenco" estas komunaj al 7-8 lingvoj. Sed asertante, ke "palmo estas branĉo de palmarbo" li batas la aeron, t.e. kontraŭas ĝeneralan uzadon jam le Kabe se ne ankoraŭ pli frue.

"Ĝustigante" la Naŭlingvan Etimologian Leksikonon de Bastien, Gasse rekategorias radikojn laŭ sia propra

takso—inter ili "arm", kiun kritikis Couturat (1910) kaj Minor (1924). Tiu diris (E-D Handwoerterbuch): "La formo armilo por Waffe (batalilo) estas nelogika; armi signifas: provizi per bataliloj. Do armilo signifas: la laborilo, ilaro, per kies helpo oni provizas batalilojn al . . ."

Lia propono uzi landnoman neŭtralan -ij kiel solvon de la demando pri -io -ujo ne estas nova; W. Geldart uzis ĝin en "Trifoje Akurate je la 10-a Horo" ("British Esp-ist" 1/62) kaj oni levis ĝin poste en La Germana E-Revuo. Sampaĝe Gasse metas alian, tripunktan sugeston!

Oni povas imagi, ke revizio de la radikaj kategorioj en la Universala Vortaro estus iel teorie helpa, sed en la praktiko tio postulus uzon de formoj jam tute ekster kompreno de la E-istoj ĝenerale. Tial, kvankam liaj rimarkoj pri la derivado meritas atenton, saĝe estus, ke ilian validecon pricidecnu nur la Lingva Akademio, konsiderante ilin antaŭ oficialaj decidoj.

La libreto kun letero de S-ro Gasse prunte sendiĝus kontraŭ afranko al interesato(j).—Redaktoro.

### BESTKALENDARO 1967

30 x 42 cm. Pentraĵoj pri birdoj kaj aliaj bestoj kun detala priskribo. Kvankam la eldonejo, Reinsteg-Verlag, 7261 Gechingenüber Calw, Germany, ne estas E-ista, la kalendaro uzas egalrajte E-on apud la germana. E-istoj povas akiri ĝin kontraŭ pago de nur la kostoj de produkto-ekspedo. Pagojn sendu post ricevo al A. Burkhardt (del. UEA), D-7261 Gechingen (kontoj: poŝtĉekkonto 102549 Stuttgart, aŭ Kreissparkasse Calw 3434). 1 ekz. 4 DM; 2 ekz. 7 DM. Simile pri Florkalendaro 1967, 28 x 30 cm. 2 ekz.; 3 DM. Unuope ne liverebla.

La plej granda parto de la tuta eldonkvanto de ambaŭ kalendaroj iras en manojn de ne-Espistoj, do servas por diskonigi la Int. Lingvon. Sed necesas viaj mendoj por garantii la uzon de E-o ankaŭ dum venontaj jaroj.

### "FAKTOJ PRI GERMANUJO"

Tria ĝisdate aktualigita eldono. Kompilita de Helmut Arntz. Eld. sub aŭspicio de la Federacia Regis-

taro. 94 paĝoj. Prezo 4 DM. ĉe Ludwig Pickel, Postfach 2113, 85 Nurnberg 2.

Jen tre impresive impona ĉia-informilo pri la Federacia Respubliko Germanujo. Dekone pli ampleksa ol la dua eldono, ĝi estas plena de fotoj, grafikoj; kun indekso, historia tabelo kaj faldmapo plus notoj.

Meritas laŭdon la eldonejo Limburger Vereinsdruckerei pro prestekniko perfekta; la kompilinto pro artisma aranĝo de la materialo; la E-istoj koncernaj, kiuj strebe subtenis aperigon de la libro.

Jam de Art-kulturo ĝis Zorgado sociala, ire tra cent naciaj vivaspektoj, oni ricevas deziratan sci-lumon pri la Germana socio — mana, mensa kaj spirita. Aparte interesas filatelistojn la multaj bildoj de p. markoj.

### "OOMOTO"

Owing to risen costs of printing and postage the subscription for this paper is now \$1.60. The publishers trust that they may receive readers' understanding of the situation and their continued support for the magazine. The Editor of The A.E. is agent.

ETERNECO: Navarra Legendo. Verkis F-ino A. Nunez Dubus. Eld. Hispana Esp. Federacio, P.O. Marina Moreno 35, Dcha. 4, Zaragoza. 14 cendoj.

19-strofa poemo rakonta pri stranga transformiĝo de abato de la 10-a jarcento. Sajne, originala artformajo bazita sur antikva teksto. Valora folklorajo.

Waringhien kaj Albault akceptis "Novara" siavortare.

### FLAVAJ FOLIOJ

Ankoraŭ diversloke sur la tero troviĝas malnovaj E-gazetoj. Ekzemple, en Ĉeĥoslovakio iu foliumis la gazeton "Tra la Mondo" de Okt. 1906 ("Her. de E.", 1 Sept.). Japano havas la gazeton "Lingvo Internacia" de 1900 k.a. kaj verkis per ĝi artikolon por "Omnibuso" (Sept.).

Devas esti, ke pro la du mondmilitoj, miloj da E-gazetoj kaj libroj iris en fajron kaj paperpulpigan maŝinon, pro papermanko kaj konflikta detruado.

Ni konservu la reston de nia bibliografia trezoro.

### PARENCECO DE LINGVOJ

La Slavaj lingvoj havas pli multe da ligiloj inter si ol la plimulto de la ceteraj Indoeŭropaj branĉoj. Italo kaj Hispano kaj Portugalano, parolante la propran gepatran, nur malfacile interkomprenas unu la alian. Neniu el ili komprenas Francon aŭ Rumanon, sen aparta studo. Germano, Nederlandano, Anglo kaj Svedo ne povas kompreni inter si, se ĉiu parolas la propran (1). Sed Ruso, Polo, Ĉeĥo kaj Jugoslavo povas inter si atingi iom bonan gradon de interkompreno.

La Romanidaj lingvoj diferencas inter si pli multe fonetike ol strukture. La skribataj Portugala, Hispana kaj Itala estas grandgrade reciproke komprenataj de iliaj uzantoj.

La Franca estas, fonetike, en klaso aparta, kaj homoj de la ceteraj Romanid-lingvoj ne komprenas ĝin sen studado; la Rumana, ĝi ankaŭ, estas, pro sia strukturo, ekster ilia kompreno.

La Usona Angla havas tri ĉefajn dialektojn: Orienta, Suda, kaj Meza-okcidenta (la Ĝenerala Usona). Krome estas grandurbaj kaj pro-migrulaj lokismoj, ekz. la Brooklyn kaj Pensilvania Nederlanda.

La dialektoj de Britujo estas multe pli nombraj kaj pli diferencaj inter si ol la Usonaj. Naŭ ĉefaj en Skotlando, tri en Irlando, 30 en Anglujo kaj Kimrujo — tio ĉi tute ekster la Skot-Gaŭla, antikva Irlanda kaj Kimra (apartaj lingvoj de la Kelta branĉo de la Indoeŭropa.) — (Mario Pei, "La Rakonto pri la Lingvo," 1953.)

(1) Bodmer ("Loom of Language") tamen diras, ke "kiu povas legi la Norvegan, tiu povas ankaŭ la Svedan kaj Danan; Norvegoj povas kompreni Svedojn kaj Danojn, kiam tiuj parolas la propran lingvon".

### KOMENTO DE LA RED.

Estas rimarkinde, kiel malmulte radio, televido efikas sur la dialektojn de Britoj kutime ilin uzantaj. Sajnas, ke homoj ne sin lasas lange influigi, malgraŭ multa aŭdado de la "kriteria" Angla per tiuj medioj. Certe, ke la tipa Aŭstraliano, parolante sian propran idiomon, retenas ĝin ne farante konscian aŭ nekonscian imiton. (Kompreneble, en nia hodiaŭa tempo oni aŭdas, krom la "klasikan", ankaŭ aliajn formojn de la Angla — de Afri-

kaj, Hindaj, Pacifikaj instruoj, kaj, pliofte, de Usonaj.)

En Anglujo plaĉis al mi la evidenta konservo de dialektoj sur lipoj de ankoraŭ junaj homoj.

Estus interese, rilatigi la supran al la demando pri Esperanta uz-unueco. Komprenble, antaŭ ĉio staras la neceso esti komprenata. Dekomence en nia literatura historio kaj ankoraŭ ĉiam oni legas en niaj E-verkoj kaj-artikoloj la produkton de la plumoj de homoj loĝantaj ĉie sur la civilizita mondo. Tio en si mem evoluigas la lingvon pli-malpli certe al unueca internacia stilo kaj uzmaniero. Per kvazaŭ eklektika procedo oni imitas la plej klare trafikajn esprimojn kaj rifuzas la neĝustajn, kaj per tio grade alproksimiĝas al konsistajo da ideale uzinda lingvomaterialo.

En E-o la alegorioj, figuroj, metaforoj estas ordinare kompreneblaj; se ne, ili baldaŭ neuziĝas. La celo de tia esprimformo estas doni "koloron" super nura informvaloro.

### LINGVA KOREKTECO

"Multaj kandidatoj estis malfortaj pri la gramatiko . . . la ekzamena folio avertis, ke gramatika korekteco estas rigardata kiel grande grava . . . (raporto pri ekzamenoj de la Reĝa Societo de l'Artoj; p. 315, "British E-ist", 9/65).

Sed indulge diras recenzanto sur p. 313: "la brilaj poetoj rajtas esti superaj al la rigoreco de la gramatikaj reguloj; tiaj detaloj interesos nur . . . pedantojn".

Kiom da latentaj poezimajstroj malsukcesas ĉe tiaj ekzamenoj?

### TRADUKO — P. 140

Kiam kolera, li ne bezonis uzi sakrajajn. Liaj vortoj similis akrajn sagojn, kiuj funde pafiĝis en la koron mem. Malforto lia estis, ke li troemfaze sin esprimis (kiun emon ankaŭ mi heredis), tamen nur por priskribi kaj doni humuran efekton.

Li estis viro de rigida, eĉ tre skrupula veramo. Iufoje kiam li sentis, ke liaj vortoj estas iel miskomprenigaj, mi rimarkis, ke li moderige reformis ilin ĝis ĝuste mezurita senc-esprimo.

### UNESKO - NOVAĴOJ

**Kaktoj sen dornoj:** En Galileo oni jam tre bone sukcesis kulturi kaktospecojn, por nutrado de ŝafoj kaj kaproj. La kaktaj, kiuj enhavas multe da vitaminoj, tute ne bezonas akvumadon. Oni planas planti la kaktajn sur grandaj areoj da neplug-ebla tero.

**Pri Papirusoj:** D-ro Anton Fackelmann (Nacia Biblioteko en Vieno) eltrovis rimedon por deĉifri antikvajn papirusojn, kiuj tiel nigriĝis, ke ili alie ne estas legeblaj. Li sukcesis forigi per eltkre ŝargita plato maldikegan tavolon de la surfaco de la papiruso kaj tiel videbligi la skribaĵojn. Antaŭ iom da tempo li elpensis teknikon moligi per freŝa papirusa suko malnovajn papirusojn sekiĝintajn kaj nenalvolveblajn. Li ankaŭ retrovis la metodon, perditan, en la Mezepoko, por fabriki "pergameno Goldschlag" — tre maldika pergameno kalkumita, uzata por protekti antikvajn papirusojn kontraŭ malseko.

**Nova Brajla Biblio.** Rotaciaj maŝinoj, kiuj presas brajle per solidaj plastaj punktoj, estas nun libere aĉeteblaj el Britujo. Kompare kun la tradicia metodo uzanta kavajn punktojn, ĉi tiu nova plastopunkta tekniko signifas gravan malpliigon de la materia amplekso de brajla literaturo. La Biblio, presita per kavaj punktoj, konsistas el 74 okdek-paĝaj volumoj kaj bezonas du metrojn da bretoj; nur unu metron bezonas la novaj volumoj presitaj per solidaj punktoj. Alia avantaĝo de la nova sistemo, inventita de la Reĝa Instituto por Blinduloj, estas la daŭremo de la solidaj punktoj; ili ne platiĝas nek difektiĝas per ofta uzado. Kvankam la ekipaĵo mem kostas pli ol tiu por kavaj punktoj, ĝi funkcias pli rapide kaj malmultekoste. (Laŭ Unesko Features kaj Informa Servo de U.E.A.)

En la Federacia Respubliko Germanujo ĉiujare oni konstruas ĉ. mil pontojn. Tion postulas la moderna trafika situacio. Kun nuna cirkulado de 12.5 milionoj de aŭtoj kaj ŝosea reto de 370,000 km okcidenta Germanujo disponas pri la plej densa strata trafiko enmonde. ("Okcidentgermana Revuo.")